

# SPIOPOLA i CINIO

3  
1961

人民中國報道

VERDA VOJCI  
ESPERANCI... KWARZYSKI



La Swaythling-pokalon gajnis la Vira Tablotenisa Teamo de Ĉinio.



La lasta momento de la kolektiva konkurso

## La 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro de Tabloteniso

(Daŭrigo sur la antaŭlastapaĝo)

### La Kolektiva Konkurso de 47 Tablotenisaj Teamoj el Krin Kontinentoj

Je la 5-a de aprilo 27 viraj kaj 20 virinaj tablotenisaj teamoj komencis la kolektivajn konkurson, kiu atingis kulminon la 9-an vespere. En la vira konkurso Ĉinio gajnis la ĉampionecon, Japanio, la duan lokon, Hungario, la trian. En la virina konkurso Japanio gajnis la ĉampionecon, Ĉinio, la duan lokon. Rumanio, la trian.



La Corbillon-pokalon refoje gajnis la Virina Tablotenisa Teamo de Japanio.




Spektatoroj entuziasme ĝojkrias pro la brila arto de la tablotenisistoj.

# AGRIKULTURO

## BAZO DE LA NACIA EKONOMIO

TAN HI



**A**GRIKULTURO estas la bazo de la ĉina ekonomio, dum industrio, la superrega faktoro. Tio ĉi estas konkrete deklarita antaŭnelonge denove de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong kiel fundamenta politiko, sub kiu antaŭeco por konstruado de peza industrio devas esti kombinata kun rapida disvolvo de agrikulturo. Tiu ĉi politiko estis elmetita kiam sub la gvidado de la Ĝenerala Linio por Socialisma Konstruado de la Komunista Partio de Ĉinio — streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismon — la ĉina socialisma ekonomia konstruado eniris novan fazon en sia altrapida kaj proporcia disvolvado. Tio ĉi estas la fundamenta politiko gvidanta la ĉinan nacian ekonomion en la antaŭensaltego kaj grava ekzemplo de la kreiva apliko de la principoj de marksismo-leninisma politika ekonomio al la konstruado en Ĉinio.

Jam en januaro 1934, en *Nia Ekonomia Politiko*, Prezidanto Maŭ atentigis, ke “agrikultura produkto okupas unuan lokon en nia ekonomia konstruado”. Li reasertis tiun ĉi tezon en 1948, dirante: “La forigo de feŭdismo kaj disvolvo de agrikultura produktado metas la bazon por la disvolvo de industria produktado kaj la transformo de agrikultura lando en industrian landon” (Parolado ĉe Konferenco de Kadroj en la Ŝanhi-Sujjuan-a Liberigita Regiono).

Tio estas vera, ĉar, kiel li jam atentigis kelkajn jarojn pli frue en sia *Pri Koalicia Registaro*, raporto farita en 1945 kaj difinanta la estontan direkton de ĉina revolucio, la kamparanoj estas:

1. La fonto de industriaj laboristoj de Ĉinio. Estonte, dekoj da milionoj da kamparanoj iros al la urboj, al fabrikoj. Por establi siajn proprajn potencajn industriojn kaj grandnombrajn modernajn urbojn, Ĉinio



La unua sekretario (dekstre 2) de la Partia Komitato de Longtang-komunumo, Hjuven-gubernio, Guangdong-provinco partoprenas riz-plantadon por kontroli produkton. Foto de Hinhua

nepre trapasos daŭran procezon de transformado de la kampara loĝantaro en urban loĝantaron.

2. La ĉefsubteno de la merkato de la ĉina industrio. Nur la kamparanaro povas provizi la plej grandan kvanton da nutraĵoj kaj materialoj, kaj konsumi la plej grandan kvanton da fabrikaĵoj.

Post la liberiĝo, tio ĉi ankaŭ estas la gvida vidpunkto dum la periodo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Prezidanto Maŭ tiam elmontris, ke la disvolvo de agrikultura produktado devas servi la bezonon de socialisma industriigo. La unua paŝo por disvolvi agrikulturan produktadon estis la movado de kooperativigo, kaj la dua paŝo estis la komenco de teknika transformo de agrikulturo, kiu tuj sekvis.

En 1957, resuminte la atingojn de la Unua Kvinjara Plano, kaj konsiderante la spertojn de frataj socialismaj landoj, Prezidanto Maŭ en *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* montris, ke en la socialisma ekonomio de Ĉinio, "industrio kaj agrikulturo devas disvolviĝi samtempe", kaj ke "agrikulturo provizas gravan merkaton al peza industrio". Okazaĵoj, precipe post la efektivigo de la Ĝenerala Linio por Socialisma Konstruado en 1958, pruvis ke tio estas tute prava.

Nun, por renkonti la novan situacion — la antaŭensaltegon kaj la transiron al popolkomunumoj, kaj por ebligi plenan funkciadon al la avantaĝoj de la komunuma organizo — Prezidanto Maŭ difinis pli konkrete la politikon de samtempa disvolvo de industrio kaj agrikulturo. Li faris tion per formuligo de la politiko trakti agrikulturon kiel la bazon kaj industrion kiel

la superregan faktoron, kombinante la antaŭecon por disvolvo de peza industrio kun la rapida disvolvo de agrikulturo.

Kial ni traktas la disvolvon de agrikulturo kiel la ĉefan problemon de nia ekonomio?

Ĉar nur per rapida disvolvo de agrikulturo Ĉinio povas provizi la necesajn kondiĉojn por sia industria disvolvo. Tio povas esti montrita en kelkaj flankoj:

**PROVIZO DE LABORFORTO:** Industrio kaj ĉiuj aliaj branĉoj de la nacia ekonomio ne povas kreski sen laborforto, kaj la ĉina kamparo estas ĝia ĉefa fonto. Inter 1949 kaj 1957, la lastjaro de la Unua Kvinjara Plano, la nombro de laboristoj kaj oficistoj triobliĝis; en 1958 kaj 1959, la nombro ree pliiĝis je pli ol 85 procentoj kompare kun tiu de 1957. La plejmulto de tiuj ĉi homoj venis de la kamparo.

**PROVIZO DE NUTRAĴO:** En lastaj jaroj, la konsumkvanto de greno konsiderinde kreskis kun la kreskanta loĝantaro en urboj, industriaj kaj minejaj regionoj, la kreskanta areo de tero por kulturado de industriaj plantaĵoj, kaj la senĉesa altiĝo de vivnivelo. Tial, estas necese antaŭenpuŝi agrikulturon kaj precipe la produkton de greno por kontentigi la senĉese kreskantan bezonon de la popolo.

**KRUDAJ MATERIALOJ:** Agrikulturo estas grava fonto de industriaj krudaj materialoj. En Ĉinio, la produktovaloro de tiuj branĉoj de industrio, kiuj uzas agrikulturajn produktaĵojn kiel krudajn materialojn, nun konsistigas pli ol trionon de la tuta industria produktovaloro kaj kvar kvinonojn de la valoro de fabriko-faritaj por konsumaj varoj. Tial, la disvolvo de agrikulturo havas senperan efikon sur la disvolvo de la tuta industrio.

**LA KAMPARA MERKATO:** La vasta ĉina kamparo kun loĝantaro de pli ol 500 milionoj provizas tiel al la malpeza kiel al la peza industrio ekstreme vastan enlandan merkaton, kaj sekve estas stimulo al la tuta industrio. Ĉirkaŭ 70 procentoj de la produktaĵoj de la malpeza industrio de Ĉinio vendiĝas en la kam-

La traktorostacio de Huangpu-komunumo, Ĝongŝan-gubernio, Guangdong-provinco plugas rizkampon por produkta brigado. Foto de Hinhua



paraj regionoj. Estas pli kaj pli evidente, precipe post la apero de popolkomunumoj kun ilia pli granda totala aĉetpovo, ke la kamparo estas ĉefa merkato ankaŭ por la produktajoj de peza industrio.

Depost la komenco de la granda antaŭensalto en agrikultura produktado kaj la energia efektivigo de la Ok-punkta Ĉarto por Agrikulturo, estiĝas kreskanta bezono de laborforto en la kamparo. La amasoj de kamparanoj urĝe bezonas ĉiujn specojn de maŝinoj kaj ekipaĵoj por pograde sin liberigi de peza manlaboro kaj altigi laborproduktivon. Nun, dank' al la provizo de materialaj kondiĉoj fare de la komunumoj, la plena teknika transformo de agrikulturo estas ne nur urĝa bezono, sed ankaŭ praktika ebleco. En 1958, la kvanto de maŝinoj, instrumentoj, kaj ekipaĵoj liveritaj al la kamparo estis ses-kaj-duonoblo de tiu en 1952. Finfine, la teknika transformo de la agrikulturo de Ĉinio postulas milionojn da traktoroj, ŝarĝaŭtoj, grandajn kvantojn da aliaj terkulturaj instrumentoj, dekojn de milionoj da tonoj da kemia sterko, grandan kvanton da transportaj kaj elektroproduktaj ekipaĵoj, brulaĵoj kaj konstruaj materialoj.

La plano por akceli la mekanikigon de la agrikulturo de Ĉinio elmetita de Prezidanto Maŭ en 1959 postulas "malgrandan solvon en kvar jaroj, mezan solvon en sep jaroj, kaj grandan solvon en dek jaroj". Kun la rapideco de mekanikigo akcelita, agrikulturo fariĝos ĉiam pli granda merkato por peza industrio.

FONTO DE FONDUSO: Agrikulturo estas unu el la ĉefaj fontoj de fonduso por altrapida disvolvo de la tuta nacia ekonomio. Tio ne estas tiom de la fonduso rekte akumulita en la formo de imposto sur agrikultura produktado, kiu formas tre malgrandan parton de la nacia enspezo, sed tra aliaj ŝaneloj rilate al agrikulturo. Ĉirkaŭ duono de la nacia financa enspezo devenas pere aŭ rekte de la kamparo. Multo de tio enspeziĝas per industria, komunikaj kaj komercaj fakoj kiel imposto aŭ profito el procedado, transporto kaj vendo de terkulturaj produktajoj. Agrikulturaj produktajoj ankaŭ konsistigas nuntempe pli ol 70 procentojn de la eksportajoj de Ĉinio, kiuj interesanĝiĝas por tiaj maŝinoj kaj ekipaĵoj kiajn ĝi bezonas aĉeti alilande.

## Antaŭenpuŝi Unu la Alian

La politiko trakti agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel superregan faktoron, kaj kombini la antaŭecon por la disvolvo de peza industrio kun la rapida disvolvo de agrikulturo, plene spegulas la koncepton de Prezidanto Maŭ, ke socialisma konstruado en Ĉinio devas "marŝi per ambaŭ kruroj". Sub tiu ĉi politiko, industrio kaj agri-

kulturo estas interrilatigitaj, antaŭenpuŝante unu la alian, kaj reciproke provizante kondiĉojn por la kresko de ili ambaŭ. Industrio, precipe peza industrio, estas sektoro kiu faras la rimedon de produkto, aŭ la mekanikigitajn ekipaĵojn necesajn por la ekspansio de la tuta industria kaj agrikultura produkto. La nivelo de la produkto de peza industrio decidas tiun de la tuta ekonomio. Tial, la rimedo de produkto devas esti produktata en pli granda rapido ol konsumado, kio postulas ke antaŭeco estu donita al la disvolvo de peza industrio. Sen emfazo pri peza industrio, estas ne eble konstrui Ĉinion en potenca socialisman landon kun modernaj industrio, agrikulturo, scienco kaj kulturo.

Sed, kiel la supra analizo montras, ne povas esti rapida kresko de industrio, se ĝi ne estus kombinita kun la rapida disvolvo de agrikulturo kaj malpeza industrio. Tial, forta antaŭenpuŝo de agrikulturo ne malhelpas la progreson de industrio, sed estas fakte decida rimedo stimuli daŭran antaŭensalton en tiu fako kaj la tuta nacia ekonomio.

En kapitalisma socio, nesolveblaj kontraŭdiroj ekzistas inter industrio kaj agrikulturo. La postlasiteco de agrikulturo post industrio en la disvolvado estas la propra karakterizaĵo de ĉiuj kapitalismaj landoj, kaj tio estas unu el la fundamentaj kaŭzoj de la malproportia disvolvo de diversaj branĉoj de la nacia ekonomio kaj ekonomiaj krizoj. Tamen, surbaze de la socialisma publika posedanteco, la kontraŭdiroj inter industrio kaj agrikulturo povas esti venkitaj, la postlasiteco de agrikulturo post industrio povas esti evitita, kaj la samtempa disvolvo kaj antaŭenpuŝo de agrikulturo kaj industrio laŭ plano povas esti faciligita, tiel ke ambaŭ disvolvu en senprecedence alta rapideco.

(Daŭrigo sur 132 p.)

*La mato-fabrika de Doŝan-komunumo, Tajŝan-gubernio, Guangdong-provinco produktas matojn por kontentigi bezonon de merkato.*

*Foto de Hinhua*




# La Maj-kvara Movado kaj Fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio

*Verkita de Vang Ŝihan, asociata esploranto de la Instituto de Moderna Historio, Ĉina Akademio de Sciencoj.*

**J**E la 4-a de majo, 1919, eksplodis revolucia movado de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Ĉi tiu movado naskiĝis responde al la alvoko de la Oktobra Revolucio de Rusio. La ĉina laborista klaso, ekakceptis la influon de marksismo-leninismo dum la movado, montris sian grandiozan forton, kaj akcelis la sukceson de la movado. Tial, la Maj-kvara Movado sukcesigis la kunligon de la ĉina laborista movado kun marksismo kaj helpis al la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio.

Ekde la Opia Milito de 1840 ĝis la antaŭvespero de la Unua Mondmilito de 1914, Ĉinio jam paŝon post paŝo falis en staton de duon-kolonio, fariĝante komuna objekto de prirabado de diversaj imperiismaj landoj. La imperiistoj unuflanke subigis la reakciajn feŭdajn regantojn de Ĉinio per agresaj militoj, faris ilin siaj lakeoj kaj devigis ilin plenumi politikojn naciperfidajn fidele servante imperiismon; aliflanke ankaŭ faris politikan trompadon, propagandante al la ĉina popolo sloganojn de falsa burĝa demokratio kaj libero, kreante iluziojn ĉe burĝaj revoluciuloj kaj burĝaj intelektuloj sin apogi sur la "helpo" de imperiismo kaj "pace kunekzisti" kun imperiismo kaj realigi sendependecon kaj demokration en Ĉinio laŭ la vojo de burĝa parlamenta sistemo. Kvankam la ĉina popolo senĉese batalis kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo dum la jaroj inter la Opia Milito kaj la Unua Mondmilito, ĉiuj bataloj kaj revolucioj malsukcesis. La kaŭzoj kuŝis en tio, ke la gvidantoj de la tiamaj revoluciaj bataloj aŭ reflektis



*Tiangin-aj studentoj kaj urbanoj sieĝas la ĉefpolicejon je la 15-a de okt., 1919.*

la vidpunkton de kamparano-etproduktantoj (kiel la kamparana milito, kiu kondukis al la starigo de la Tajping-a Ĉiela Regno) ne vidante la perspektivojn de la bataloj, ne lertante en unuigo de ĉiuj fortoj unuigebaj por persista batalo kontraŭ la malamiko; aŭ reflektis la malfortecon de la burĝaro (kiel la burĝa revolucio de 1911), kiu timis kaj la leviĝon de la laboristoj kaj kamparanoj kaj la potencon de la imperiismo kaj feŭdismo, kaj absolute ne kapablis solvi la problemon kontraŭbatali imperiismon kaj feŭdismon.

La eksplodo de la Unua Mondmilito en 1914 plene malkovris la internajn kontraŭdirojn de la imperiismaj landoj kaj la agresan naturon de imperiismo, kaj altigis la politikan konscion de la popolo tra la mondo. La venko de la granda Oktobra Revolucio en Rusio plie kuraĝigis la mondan proletaron kaj la popolojn de la subpremitaj nacioj al bataloj por soci-liberigo kaj naci-liberigo. Komenciĝis nova epoko de monda

revolucio kun la proletara socialisma revolucio en la gvidanta rolo.

Dum la Unua Mondmilito, pro tio, ke la plejparto de la imperiismaj landoj sin okupis en milito eŭropa kaj por-tempe malintensigis sian agreson al Ĉinio, la nacia industrio de Ĉinio akiris pluapaŝan disvolviĝon, kaj kreskiĝis la forto de la ĉina burĝaro kaj de la ĉina proletaro. La kresko de la forto de la ĉina laboristaro preparis klasan bazon por la devastigo de la influo de la Oktobra Revolucio.

La influoj de la Unua Mondmilito kaj la Oktobra Revolucio kaŭzis novan skismon inter la modernaj intelektuloj de Ĉinio. En la vasta amaso de pli malriĉaj intelektuloj aperis grupo da intelektuloj kun elementa komunisma penso. Ili estis la unuaj, kiuj levis la standardon de marksismo-leninismo kaj ekzamenis la revoluciajn problemojn de Ĉinio laŭ la mondkoncepto proletara. En sia artikolo *La Venko de la Popolamaso* publikigita en nov. 1918, Li Daĝaŭ, ilia reprezentanto, antaŭdiris ke, "la mondo ekde nun fariĝos mondo de laboristoj", prikantis ke, "la rusa revolucio en 1917 estas la heroldo de mondrevolucio en la dudeka jarcento", kaj alvokis la ĉinan popolon "bonveniĝi" kaj "sin adapti" al tiu ĉi nova tajdo de mondrevolucio. Ankaŭ en alia samtempe publikigita artikolo *La Venko de Bolŝevismo*, li tre konkrete kaj vive priskribis la potencecon de la sukcesa disvolviĝo de la monda proletara revolucio, kio fakte estis alvoko al la ĉina popolo imiti "la rus-tipan revolucion", kaj per amasa revolucia movado detruu ĉiujn en- kaj ekster-landajn reakciajn fortojn pezegantajn sur la kapo de la ĉina popolo. "Rigardu, la mondo estonta nepre estos mondo de ruĝaj standardoj!" per tiel kuraĝiga frazo li esprimis en tiu ĉi artikolo sian firman kredon al la brila estonto de mondrevolucio.

Dank' al la antaŭenpuŝo de la monda situacio kaj la influo de Li Daĝaŭ, radikalaj demokratoj etburĝaj, kun Ĉen Duĥiu kiel sia reprezentanto, ankaŭ eksimpatii la rusan revolucion. Ekde 1915 Ĉen Duĥiu jam estis gvidanta la kontraŭfeŭdisman kulturalan revolucionan movadon. Tiam li estis adoranto de la parlamenta politiko kaj burĝa individualisma moralo de la Okcidento; post la finiĝo de la Unua Mondmilito kaj la profunda penetro de la influo de la Oktobra Revolucio en Ĉinion, li ankoraŭ nutris iluzion, ke Ĉinio povus akiri sendependecon dank' al la konferenco por dividi rabajojn okazigota de la imperiismoj en Parizo. Sed la evoluo de la Pariza Pac-konferenco tuj malkovris la esencon de imperiismo. Ĉinio, kiu partoprenis la konferencon kiel "venkinta lando" trovis ke, sub la direktado de Usono, Britio, Francio, Japanio, Italio kaj aliaj imperiismaj potencoj, la Konferenco tute rifuzis pritrakti la justajn postulojn de la ĉina



*La ĉesigo de negoco ĉe Nankin-strato de ŝanhajo dum la Maj-kvara Movado.*

delegitaro: la nuligo de la "21 Artikoloj"\*, la forto de imperiismaj armeoj el Ĉinio, la nuligo de "influfseroj", la dogana aŭtonomio k.a. Ĝi eĉ rifuzis la postulon de Ĉinio ke privilegioj de Germanio en Ŝandong-provinco estu abolita. La imperisma bloko kun Usono ĉe sia kapo kategorie subtenis Japanion en ĝia forrabo de ĉina teritorio en Ŝandong-provinco. La kruela realo vekis eĉ ankaŭ Ĉen Duĥiu, kiu ekde tiam post iom havis simpatian al la rusa revolucio kaj pli kaj pli aktiviĝis en la gvidado de la batalo kontraŭ imperiismo kaj kontraŭ la naciperfida registaro militarista, alvokante la amason efektiviĝi sian patriotajn postulojn per direktaj agadoj.

La burĝaj intelektuloj kun Hu Ŝi kiel sia reprezentanto firme kontraŭstaris la Oktobran Revolucio. Post la Oktobra Revolucio Hu Ŝi publikigis sinsekve la reakciajn artikolojn *Eksperimentismo*, *Senmorteco* ktp, kiuj distrumpetis reakcian filozofion de imperiismo kaj koruptajn moralvidpunktojn de burĝa individualismo por oponi la vojon de marksismo kaj la Oktobra Revolucio. Por influu la amason per sia programo, Hu Ŝi kaj la aliaj daŭrigis sian kamuflitan agadon en la novkultura movado, kaj fariĝis la dekstra alo de la movado.

En la antaŭvespero de la Maj-kvara Movado, la ŝanĝo en la pensoj de la intelektuloj, kiu rezultigis en tio, ke la antifeŭdisma kulturmovado kun malnova demokratio kiel gvidilo ekfariĝis nov-demokratia kultur-movado radikale kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo kun elementa komunisma penso kiel gvidilo, faris ideologian preparon por la amasa patriota movado de la 4-a de majo.

Je la 4-a de Majo, 1919, pli ol 3.000 studentoj en Pekino, kun studentoj de la Pekina Universitato, la ĉefstabejo de la nov-kultura movado, kiel la iniciatan-

\* 21 postuloj altruditaj de Japanio al la reĝimo de Juan Ŝikaj kiuj reduktis Ĉinion al virtuala protektorato.

toj, manifestaciis sur la Tian'anmen-placo kontraŭ imperiismo kaj la perfida militarista registaro. Akre kontraŭ la Pac-konferenco de Parizo, ili elmetis la sloganojn "Redonu nian Kingdaŭ!", "Nuligu la 21 Artikolojn!" k.c. alvokis la tutan popolon "batali por suvereneco en eksterlandaj aferoj kaj forigi la naci-perfidulojn en internaj aferoj", kaj postulis ke la por-japanaj naciperfiduloj, Caŭ Ĵulin, ministro de komunkado, Ĝang Zonghiang, Ĉina Ministro al Japanio, kaj Lu Zongju, ĉiuj kiuj rekte rilatis al la naciperfida kontraktado de la "21 Artikoloj" kaj la vendo de rajto de Ŝandong-provinco. En justa indigno, tiu-tage la studentoj forbruligis la domon de Caŭ Ĵulin kaj batis Ĝang Zonghiang. La naciperfida registaro tuj sin turnis al subpremaj rimedoj. Pli ol 30 studentoj estis arestitaj. Kvankam laŭ la postulo de la publika opinio la arestitaj studentoj estis baldaŭ liberigitaj, tamen la batalo disvolviĝis daŭre. La 21-an de majo, la studentoj en universitatoj kaj gimnazioj komencis amase forlasi la lernoĉambrojn en ĝenerala striko kaj disvastigis la patriotan propagandon kaj bojkoton de japanaj varoj. Tiam la japana imperiismo elpaŝis por rekte interveni la patriotan movadon. La 21-an de Majo, la japana ministro al Ĉinio informis la ĉinan registaron ke "rezultiĝos serioza traktado inter la du landoj" se drastaj rimedoj ne estos prenataj kontraŭ la studenta movado. Sub la minaco de la japana registaro, la ĉina militarista registaro ekuzis subpreman rimedon en granda skalo. La 3-a kaj 4-a de junio vidis arestadojn de pli ol mil studentoj patriotaj. Sed la patriotaj agadoj de la studentoj pli kaj pli ampleksiĝis. La studentoj portis valizon kun si dum la agadoj,

esprimante siajn decidemon kaj sentimecon eĉ antaŭ enkarcerigo, kio tute vanigis la polican arestadojn. Dum la movado, tiuj intelektuloj kun elementa komunisma penso kaj la etburĝaj radikalaj demokratoj ĉiuj aktive partoprenis en la batalo. Pere de la gazeto *Semajna Revuo Li Daĝaŭ* kaj Ĉen Duhui ludis gvidantajn rolojn en la movado. Dume, Hu Ŝi, reprezentante la burĝajn intelektulojn, jam en la komenco de la amasa movado ekkondamnis la amason, ke ĝi transpaŝis la limon de burĝa demokratio, dirante ke al la studentoj "mankas la stilo de britiaj kaj usonaj politikistoj." Estas videble, ke en la patriota movado la batalo inter la du linioj de proletaro kaj burĝaro estas tre akra tuj ekde la komenco.

La patriota agado de la pekinaj studentoj reflektis ia postulojn de la tuta popolo. Tial, rapidaj respondoj tuj leviĝis inter la studentoj tra la tuta lando. Ekde la 10-a de majo, patriotaj studentoj de Pekino kaj Tiangin ekiris al la diversaj lokoj por patriota propagando al ĉiuj rondoj de la popolo, disvastigante la influon de la patriota movado al ĉiuj socitavoloj kaj precipe al la laborista klaso de Ŝanhajo. Ekde la 3-a de junio, fakte komenciĝis la kunligiĝo de la studenta kaj la proletara movadoj, formante tutnacian patriotan movadon, kun la proletaro kiel la ĉefa forto, inkluzive la et-burĝaron kaj burĝaron. Kaj la centro de la movado translokiĝis de Pekino al Ŝanhajo.

Ŝanhajo estis la industria centro de Ĉinio, kie koncentriĝis kelkcent mil industriaj laboristoj. Samtempe, ĝi estis la ĉefa bazo de imperiisma agreso al Ĉinio.

(一期星) 日一月七年八國民華中 (版一第)

# 湘江評論

The Shian Kiang Weekly Review

號二第  
期星五期一分二第  
期星五期一分二第  
期星五期一分二第

發行所長沙落星田湖南學生聯合會  
本報每週一週價目如下  
大津號 每份二分  
郵費在內  
本報每週一週價目如下  
大津號 每份二分  
郵費在內  
本報每週一週價目如下  
大津號 每份二分  
郵費在內

**本報申明**  
本報創辦於前年十月，即自開辦以來，今特重印前年十月之印局，以期更趨完善，以便出版。前年十月，本報創辦於前年十月，即自開辦以來，今特重印前年十月之印局，以期更趨完善，以便出版。前年十月，本報創辦於前年十月，即自開辦以來，今特重印前年十月之印局，以期更趨完善，以便出版。

**本報申明**  
本報創辦於前年十月，即自開辦以來，今特重印前年十月之印局，以期更趨完善，以便出版。前年十月，本報創辦於前年十月，即自開辦以來，今特重印前年十月之印局，以期更趨完善，以便出版。前年十月，本報創辦於前年十月，即自開辦以來，今特重印前年十月之印局，以期更趨完善，以便出版。

**本報申明**  
本報創辦於前年十月，即自開辦以來，今特重印前年十月之印局，以期更趨完善，以便出版。前年十月，本報創辦於前年十月，即自開辦以來，今特重印前年十月之印局，以期更趨完善，以便出版。前年十月，本報創辦於前年十月，即自開辦以來，今特重印前年十月之印局，以期更趨完善，以便出版。

La 2-a n-ro de "Hiang-giang-revuo" publikita je la 21-a de julio, 1919.

之投稿 無物質上之限制  
助之好友 能多傳播者 特別減少取費



Tial ĝi estis urbo de tre akraj klasaj kaj naciaj kontraŭdiroj. La 3-an de junio, la sciigoj pri la grand-skala aresto de patriotaj studentoj en Pekino atingis Ŝanhajon kaj la 5-an de junio, jam ekstrikis parto de la kvin japanaj teksejoj n-roj 3-a, 4-a, 5-a, Ĵihua kaj Ŝanhajo kontraŭ la reakciaj rimedoj de la imperiismo kaj la militarista registaro, respondante al la patriotaj agadoj de la pekinaj studentoj. La 6-an kaj 7-an de junio daŭre grandiĝis la striko kaj pli ampleksa striko estis en preparo. Puŝate de la komizoj kaj studentoj ankaŭ la burĝaro en Ŝanhajo anoncis ĉesigon de negoco en la 5-a de junio. La strikoj en fabrikoj, lernejoj kaj vendejoj de Ŝanhajo devigis la pekinan registaron anonci liberigon de ĉiuj arestitaj studentoj je la 7-a de junio. Sed la 8-an, 9-an kaj 10-an de junio eĉ pli disvastiĝis la striko, inkluzive ne nur la laboristojn de la ĉefaj fabrikoj, sed ankaŭ tiujn de la publikaj servoj kiel akvo-provizado, elektro-lumigo, tramoj, aŭtoj, vagonaroj kaj ŝipoj. La fervojoj Ŝanhaj-Nankin-a kaj Ŝanhaj-Ĥangĝou-a paraliziĝis, la urbaj publikaj servoj, industrioj kaj komerco ĉio ĉesis funkcii. La prospera Ŝanhajo fariĝis urbo morte silenta. La imperiismoj ektimis antaŭ la strikoj en Ŝanhajo kun tiu de la laboristoj kiel la kerno, kaj ilia "imponco" vaporiĝis antaŭ la unuiginta batalo de la popolo. *North China Daily News* (jurnalo de la brita imperiismo) ne povis ne konfesi en sia ĉefartikolo: "Ŝanhajo estas en senleĝeco". Vere, la reakciaj leĝoj, kiuj katenadis la ĉinan popolon tute senefikiĝis antaŭ la potenco de la popolo. La brita kaj franca imperiismoj eĉ provis timigi la popolon per perforta interveno, sendante siajn militsipojn al Ŝanhajo. La polico de la Ŝanhaj-koncesioj ordonis perfortan malfermon de la Ŝanhaja Studenta Asocio. La ĉinaj militaristoj kaj la poliestro en Ŝanhajo, ĉiuj mem kontrolis la arestadon, subpremante la patriotojn perforte kiel "banditojn". Ili devigis per minacoj, ke oni rekomencu lernadon en lernejoj kaj laboradon en fabrikoj kaj faru negocojn en la vendejoj. Jam en la komenco de la vendo-striko, la burĝaro proponis "bojkoton sen barbarajo" timante ofendi la imperiistojn. Kiam la batalo rapide disvolviĝis, ili pli ŝanceliĝis kaj eĉ elmetis la absurdan sloganon ke "konservo de la socia ordo signifas patriotismon" provante bridi la amasan movadon. Sed nek la interveno kaj subpremo, nek la ŝanceliĝo de la burĝaro malhelpis la disvolviĝon de la batalo de la tri strikoj. Ĝis la 10-a de junio ĝin partoprenis jam pli ol cent mil laboristoj en industrioj kaj metioj. La strikoj de komizoj kaj studentoj daŭre persistis. Ĉi tiu batalo en Ŝanhajo tuj ekflamigis samajn strikojn tra la lando. La fervojistoj en Tangŝan de la Pekin-Fengtian-a Fervojo kaj en Ĉanghindian de Pekin-Hankou-a Fervojo, la laboristoj en Ĥangĝou kaj Ĝiugiang ekstrikis unuj sekvante la aliajn, kaj ankaŭ la laboristoj en Tiangin preparis strikon. Vendostriko okazis en multaj urboj, kaj striko de studentoj en des pli multaj. Tiel, la militarista registaro estis devigita aprobi je la 10-a de junio la



*La ĉambro, en kiu okazis la Unua Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio la 1-an de julio de 1921.*

rezignojn de Ĉaŭ Ĵulin, Ĝang Zonghiang kaj Lu Zongju, kaj la 28-an de junio la ĉina delegitaro al la Pariza Konferenco, sub la premo de la publika opinio rifuzis subskribon sur la Versajla Kontrakto. Tiamaniere la maj-kvara amasa movado patriota rapide gajnis sian venkon.

La venko de la Maj-kvara Movado pruvis la pravcon de marksismo-leninismo kaj la vojo de la Oktobra Revolucio, kaj ĝi pruvis, ke venko estas akirebla nur dank' al la komuna batalo de ĉiuj unuigeblaj fortoj kun la proletaro kiel la centro kaj la gvido de marksismo-leninismo. Post la Maj-kvara Movado la intelektuloj ekiris al la vojo de kunligo kun la kamparanoj kaj la laboristoj. La trupo de komunistaj intelektuloj kreskis rapide kaj la propagando pri marksismo-leninismo ankaŭ atingis pli altan nivelon. Parto de la revoluciaj intelektuloj kun Maŭ Zedong kiel reprezentanto ekfaris paŝon al kunligo de la vojo de la Oktobra Revolucio kun la praktiko de la ĉina revolucio, formante la penson, ke la plena liberigo de la ĉina popolo estu realigita per la granda unuigo de la subpremataj laboruloj. Maŭ Zedong kaj liaj kamaradoj publikigis *Ĥianggiang-revuon* kaj alvokis la popolon al batalo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. En marto, 1920, reprezentantoj de la Komunista Inter-

*(Daŭrigo sur 117 p.)*

# *Ili Vivas en Amikeco*



Hua Ven


## — Notoj pri la 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro de Tabloteniso en Pekino —

**E**N la brile iluminata Laborista Sporthalo eksonis la vigla melodio de “Unuanima Estas la Tutmonda Popol’”. La 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro de Tabloteniso finiĝis kun plena sukceso. La eminentaj tablotenisaj sportistoj el ĉiuj kvin kontinentoj de la mondo, kiuj verkis en tiu dektaga turniro neforges-ebla la novan paĝon de la monda historio tablotenisa per sia komuna strebado, ĝojkriis, manklakis, man-premis kaj ĉirkaŭprenis unu alian kun iom da ĉagre-no pro la baldaŭa disiĝo. . . . Ili ĉiuj ĝoje festis la fermon de la sukcesplena ĉampionec-turniro kaj festis, ke la amikeco, kiun ili semis dum la renkontiĝo dis-floros kaj fruktiĝos en la koroj de la popoloj tutmon-daj.

### Koraj Amikoj sur la Tablotenisa Areno

Inter la partoprenintoj de la ĉampionec-turniro, sin trovis instruisto veninta de la bordo de la bela

Danubo, milicano de la batalanta Karibea Maro, studento el la vasta stepo mongolia kaj laboristo el la brule varmega regiono ekvatora. . . . Ili ĉiuj havas komunan inklinon al la sporto de tabloteniso, kaj ili scias, ke sporto estas neapartigebla de paco kaj ami-keco inter la popoloj ĉiulandaj. Pri tio ĉi la historio donis klaran pruvon per la fakto, ke la konkursado por la tutmondaj ĉampionecoj de tabloteniso inter-rompiĝis dum pluraj jaroj kaŭze de la Dua Mond-milito. S-ro Ivor Montagu, prezidanto de la Inter-nacia Tablotenisa Federacio diris kun kora deziro kaj vorta emfazo, ke li esperas, ke la ĝoja kunveno de tablotenisaj sportistoj en Pekino antaŭenpuŝos la san-ktan aferon de paco de la homaro. La gvidantoj de la tablotenisaj teamoj de Nepalo, Birmo, Ghano k. a. landoj diris foje kaj refoje, ke ili venis partopreni la ĉampionec-turniron por “intersanĝi spertojn kaj inter-amikiĝi”, ke “gravas ne la nomvico sed la amikeco”. Kaj tiu ĉi ĝenerala bondeziro de la sportistoj divers-



Ĉefministro Ĝou Enlaj, Vicĉefministro He Long kaj Ivor Montagu (maldekstre 5, 7, 1) kun sovetiaj tablotenisistoj ĉe la bankedo je la 4-a de aprilo. Foto de Hinhua

landaj pretigis fekundan grundon por la semoj de amikeco internacia.

Dum la pasintaj tagoj, streĉa kaj intensa konkurso iris samtempe kun viglega interamikiĝo de la tablotenisaj sportistoj en la sporthalo. Je sia unuajfoja apero sur la konkursejo, la ĉina teamo donacis sian teamflagon al la teamo de Ghano el la malproksima kontinento afrika. La teamoj de Sovetunio kaj Kubo, Svedio kaj DDR, Hungario kaj Novzelando, Mongolio kaj Ghano k. a. interŝanĝis memorigajn insignojn. La pola sportistino C. Noworyta dupartigis, dum ripozo, la oranĝon, kiun al ŝi donacis iu membro de alia teamo, kaj donis ĝian duonan al sia konkurantino C. Bannach el la teamo de DDR; kiam la juna sovetunia sportisteto Z. Kalninj estis klopodonta sin levi post glitfalo en konkurso, helpan manon al li jam eletendis lia konkuranto Loh Heng Chew, membro de la teamo Singapora. . . . Multaj el la interkonkurantoj sin pozis ĉe la ludotablo por esti kune fotitaj tuj post la finiĝo de sia konkurso. Kvankam malsamaj estas iliaj lingvoj, tamen ili ankoraŭ klopodis interkomprenigi sin per ridetoj, manpremoj kaj diversaj gestoj. Kaj iuj eĉ klopodis komuniki sian koran amikecon spitante la ĝenon de reinterpretado tra pluraj lingvoj.

Dum tiu ĉi ĉampionec-turniro ĝoje kunvenis elitaj novuloj kaj fame konataj veteranoj. Pli profundigis la amikeco inter la malnovaj konatoj kaj kora amikeco kunligis la novajn. T. Sido, la fama hungara tablotenisisto ofte babilis kun E. Andreadis el Ĉeĥoslovakio pri novaĵoj de la tablotenisa areno post sia lastfoja disiĝo; Z. Berczik, la ĉampiono de Eŭropo, kaj E. A. Quaye, la ĉampiono de la Okcidenta Afriko, plurfoje ludis kune ĉe sama tablo por plialtigi sian arton. Ankaŭ la novuloj fratinoj Akueteh el Ghano, V. R. Rosales el Kubo kaj Le Tuan Dung el Vjetnamio ŝatis interŝanĝi spertojn kaj lerni unu de alia. Ĉiun novan sukceson en tablotenisa arto de iu ajn kolego ili kune

ĝoje ĝuis. Venko de Ĝuang Zedong super la ludmaniero de arke suprenturna frapado per siaj rapidaj refrapoj, la brava ofensivo de G. Averin, kiu tenas la batilon transversa, la forte turnaj vipofrapoj kaj startofrapoj de T. Murakami, ĉio ĉi ricevis streĉan atenton kaj rikoltis entuziasman laŭdon. "Ni povas multon lerni de la aziaj elituloj, kiuj lertas en ofensivo," diris I. Harrison, la ĉampiono de Britio, "kaj mi estas klopodanta transiri de la defensiva ludmaniero al la ofensiva por ilin venki en la estonteco." Ĝuste tiu ĉi konkursado, interlernado kaj la arda deziro por plialtigi la sportarto donis antaŭenpuŝon al la disvolvo de la amikeco inter la sportistoj diverslandaj.

### Profunda Amikeco inter la Gastoj kaj la Gastigantoj

Hinkiaŭ-hotelo, kie loĝis la sportistoj diverslandaj, fariĝis varma hejmo de amikeco, kie la servantoj elmontris la koran gastamon de la ĉina popolo per sia entuziasma kaj zorgema servado al la amikoj el la kvin kontinentoj. Kelkiam, iuj sportistoj revenis en ĝin je la 1-a matene post tutnokta streĉa ludado kaj trovis, ke la bufedo ankoraŭ ilin atendas lasante la pardon malfermita. Nur kelkajn minutojn poste ili jam povis ricevi varmajn manĝon kaj supon, kaj post la manĝo ili povis dormi senzorge, ĉar certe oni venos ilin vekti, kiam estos ilia konkursa vico. . . . Por, ke la diverslandaj atletoj ĉiam estu energiplenaj, dum la konkursado, la kuiristoj preparis por ili ne nur abun-

K. Macuzaki (Japanio) interŝanĝas opiniojn pri batilo kun ĉinaj tablotenisistinoj. Foto de Hinhua





*La 10-an de apr. tablotenisistoj diverslandaj vizitis la Someran Palacon de Pekino. Sur la foto sportistoj de Ĉinio, Kubo kaj Ekvadoro. Foto de Hinhua*

dajn manĝaĵojn sed eĉ "hejmlandajn pladojn" laŭ la malsamaj gustoj de la gastoj. Kiam la sportistoj el Kubo ricevis manĝojn speciale faritajn por ili, ili diris kun ĝojo, ke tio gustas tute kiel la hejme faritaj, kaj nepre deziris venigi la kuirinton por lin danki.

En la granda familio amika, memorinda tago de iu el la membroj, fariĝis komune celebrinda festotago por ĉiuj ceteraj. Dum la grandioza kunveno, sian naskiĝtagon pasigis Vasili Pop, la gvidanto de la rumana teamo, D. Lukina, sportistino de USSR, kaj N. Gomolla, sportisto el la Germana Federacia Respubliko; kaj la arĝentan jubileon de sia geedziĝtago celebris s-ro A. Bergamini, la gvidanto de la brazila teamo, kune kun sia edzino. Multaj fremduloj venis por ilin gratuli kaj iuj el ili eĉ donis al ili donacajojn. S-ro E. Gomolla kutimis celebri sian naskiĝtagon kune kun sia ĝemelfrato. Ĉifoje li devis ĝin festi for de sia hejmo, tamen la kuiristoj speciale faris por li naskiĝtagan torton kun lia nomo kaj la ĉina ideografio "寿" (vivu). "Mi sentas apartan honoron kaj signifon," li diris emocie al sia amiko, "ke mi povas festi mian 26-an naskiĝan datrevenon je la 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro en Pekino."

La atentema kaj prizorgema akceptado fare de la ĉina popolo al la diverslandaj amikoj rikoltis varman amikan eĉon ĉe ili. En iu profunda nokto Huangpu Junĉang, servanto de Hinkiaŭ-hotelo, aŭdis tusadon el la ĉambro de Hoang Thuc Anh, sportistino el Vjetnamio. Li venigis kuraciston al ŝi tuj post la ektagiĝo kaj ŝin resanigis. Unu horon antaŭ sia konkursa tempo, angla sportisto B. Merrett denove eksuferis de sia malnova malsano hernio. Ĝuste en tiu kriza momento, ĉina flegistino aĉetis speciale por li kuracinstrumenton kaj ĝin instalas al li, por ke li povu partopreni la konkurson senĝene. M. Alagbala, la gvidanto de la nigeria teamo, foje sentis sin ne tre bone, sed rapide reboniĝis lia sano dank' al ĝustatempa kuracado kaj zorgema flegado. Kaj nigeriaj teamanoj diris kortuŝite: "Ni nepre raportos al la afrika popolo pri la profunda amikeco, kun kiu la ĉina popolo nin traktas."

### Interamikiĝo Pere de la Poŝto

Dum la pasintaj dek tagoj, la prezentado de eminenta tablotenisa arto de diverslandaj sportistoj fariĝis nerezistebla spektaklo por la tuta Pekino. Ĉie aŭdiĝis laŭdoj pri la altega artnivelo de la tablotenisistoj. La sensacia ĉampionec-turniro alportis novan ĝojon al la vivo de la pekina loĝantaro. Dum la lastaj tagoj, la Laborista Sporthalo altiris al si ĉiutage kvazaŭ grandega magneto 3-40,000 spektatorojn de la konkursado. Entuziasmaj rigardantoj eĉ ne volis hejmen iri tuj post la finiĝo de konkursoj kaj svarmante ĉe la elirejoj mansvingis kaj ridetis al la diverslandaj sportistoj. Kiam oni renkontis la eksterlandajn gastojn surstrate, oni ofte varme ilin salutis kaj manpremis kun ili. Kvankam ne tre longe, tamen vivante inter la entuziasmaj kaj gastamaj ĉinaj popolanoj, la diverslandaj tablotenisistoj ne povis ne senti la altan valoron de amikeco. "Intimega estas la ĉina popolo." diris Y. P. Lohani, membro de la nepala teamo. "Kiel bone estus, se mi scipovus paroli ĉine. . . ." Por lerni la ĉinan lingvon, li speciale aĉetis lernolibron kun fonetikaj literoj kaj rapide ellernis paroli **joŭji** (amikeco), **tŭangĝje** (solidareco), **heping** (paco), **ni haŭ** (bonfarton) ktp. La hungara teamo faris specialan viziton al la popolkomunumo "Ĉina-hungara Amikeco" kaj reportis du vazojn da floroj kaj multajn bondezirojn.

Dum la irado de la konkurso, laboristoj, popolkomunumanoj, gestudentoj kaj soldatoj de la Popola Liberiga Armeo skribis unuj post aliaj leterojn al la amikoj diverslandaj por komuniki al ili siajn bonvenigon kaj deziron pri ilia sukceso en la konkurso. El tiuj leteroj, iuj estis plenaj de varmaj gratuloj, dum aliaj portis invitojn al la ricevantoj, ke ili vizitu la sendintojn por esti iliaj gastoj. Sovetunia sportistino N. Ramanauskaite diris al mi kun emocio, ke ŝi ricevis kolektivajn leterojn de 12 studentoj el la Ferŝtala Kolegio de Pekino, kiuj skribis interalie: "Ven-

## Du Enigmoj

### I

Por la popolo de l' tutmondo ĝi estas vivbezono,  
 Afero grava por homrondo havebla nur per lukto,  
 Celanta falon kapitalan, la morton de l' Mamono —  
 Onklo Sam, fortenu l' manojn de homa laborfrukto!

### II

Mortigado  
 Intencata,  
 Luktofoto  
 Instigata . . .  
 Tempopaso —  
 Ostamaso.

(Solve sur p. 148)



Laŭlum:

*Saltas l' Arto, Pac' en  
 Sving'*

### Salute al la 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro de Tablotenisio

Pingpong-pilko, pingpong ping!  
 Viglas frapo, salto, sving'.  
 Flugas fulme l' tablotenisio,  
 Faras kison ĝi post kiso:  
 Kis' al li, kis' al ŝi,  
 Kis' al ĉiuj sen parti'.  
 Dolĉe sonas ĝia ŝmaco,  
 Ŝmac' amika, ŝmac' de paco.  
 Pingpong ping! Pingpong ping!  
 Saltas l' arto! Pac' en sving'!

inte al al Pekino, vi sentu vin kiel hejme, kie vi povas partopreni la konkurson agrable. Sciu, ke sidas ĉirkaŭ vi 15,000 gefratoj. . . ." Priparolante la amikecon de la ĉina popolo, ekbrilis la okuloj de la hungara sportistino I. Kerekes. Ŝi diris, ke Gaŭ Najhiang, 19-jara batalanto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, pentris ŝian portreton laŭ foto aperinta en iu ĵurnalo, verkis varman poemon dediĉe al ŝi kaj ilin sendis al ŝi. "La portreto tre similas al mi," ŝi diris kor-


*Li Fuĵong kaj svedaj tablotenisistoj ĉe la Somera Palaco.*

Foto de Hinhua



tuŝite, "kaj ĝi restos por mi altvalora memoraĵo dum la tuta vivo." O. M. Navarro, la gvidanto de la kuba teamo, foje eltiris tri leterojn el sia poŝo kaj ilin montris al mi. Unu el ili estis alsendita de knabo el la tria klaso sesa-jara de iu popolkomunuma elementa lernejo en Hebej-provinco, kiu skribis, ke ilia klaso eldonis specialan murgazeton titolitan per "Kubo" por bonvenigi la kubajn amikojn kaj ili varme invitis la kubajn sportistojn gastigi ĉe ili. Per alia letero, Ĝang Hingguo, lernanto el Nankaj-gimnazio en Tiangin, petis al O. M. Navarro, ke li transportu la amikecon de la 650,000,000 ĉinaj popoloj al la heroo popolo de Kubo. O. M. Navarro diris, ke multe da tiaj leteroj ili ricevas ĉiutage, kaj ke li tre deziras havi ŝancon intervidi kun ĉi tiuj varmkoraj ĉinaj popoloj. . . .

Jam finiĝis plensukcese la sensacia tutmonda turniro tablotenisa, tamen la mallongaj dek tagoj konserviĝos poreterne en la memoro de ĝiaj partoprenintoj kiel tagoj tre tre karaj. Mi esperas, ke la semoj de paco kaj amikeco ĝermiĝos, kreskados kaj produktos senvelkajn florojn ĉie en la kvin kontinentoj tra la tuta mondo.



Fang Ĝou:

## La Pekina Laborista Sporthalo

**N**E malproksime ekster Ĉaŭjangmen, orienta urbopordo de Pekino, oni trovas la Pekinan Laboristan Sporthalon, bonegan en instalaĵo kaj modernan en stilo. Ĝi estas konstruita por okazigi la 26-an Tutmondan Ĉampionec-turniron de Tabloteniso. Ĝia ekstero similas al ronda kvaretaĝa domo. Malmulte da ornamaĵoj troviĝas sur ĝia ekstera ronda muro, kaj tio donas impreson de modesteco kaj simpleco. La laktoflava plinto kaj helverda mursurfaco kune kun fortikaj kolonoj kaj originalaj ŝtuparoj faris la tutan konstruaĵon hela, freŝa kaj vigliga.

Laŭ klarigo de la arkitekto, ĝi estas la plej granda sporthalo en Ĉinio, kiu povas esti utiligata por diversaj sportoj. La diametro etendiĝas je 120 metroj kaj la volumeno atingas 320,000 kubmetrojn. Interne, la ĉefa konstruaĵo estas konkursejo kun volumeno de 170,000 kubmetroj, kiu povas enteni 15,000 spektatorojn, kaj konvenas al grandiozaj maĉoj de tabloteniso, korbopilko, volejbalo\*, volano, gimnastiko, pezlevado ktp, oni povas ankaŭ okazigi tie koncerton kaj prezenti akrobataĵon. Ĉirkaŭ la konkursejo, sintrovas pli ol tridek salonoj kaj ĉambroj, por ripozo, ekzerco kaj amuzo de la spektatoroj kaj atletoj. La projektistoj precipe dediĉis sian atenton al simpla kolora hela lumo kaj vasta areo, por ke la spektatoroj kaj atletoj sin sentu agrable kaj komforte. Ĉio ĉi tio konformas al la principo de ekonomio, celkonformeco kaj belaspekto.

\* *Speco de pilkoludo, angle kaj france: volley-ball; germane: der Wurfball.*

### Konkursejo

Antaŭ ĉio mi vizitis la centron de la domo — la konkursejo. Ĝia formo similas al pelvo. La plafono estas formita de la plej moderna tipo de aerkabla strukturo, kaj en la supra parto de la konkursejo ne estas videblaj grandaj ŝtaltraboj kiel oni kutime vidas en aliaj sporthaloj. Se oni supren rigardas demalsupre, la novtipa strukturo similas al malfermita ombrelo kun radiantaj etendigaj vergetoj sed sen tenilo. Se oni ĝin rigardas “anatomie”, oni trovas ĝin kvazaŭ grandan radon de biciklo horizontale kuŝantan. La akso de la “rado” estas la centra ringo, formita el ŝtalplatoj kun 16-metra diametro kaj 140-tuna pezo. De ĝia ĉirkaŭaĵo elradias en du vicoj supre kaj malsupre po 144 ŝtalkabloj ĝis la cirkla trabo kun diametro de 94 metroj en la supra parto de la konstruaĵo kaj tie interligiĝis kun ĝi. La supra vico de ŝtalkabloj estas plene kovrita de ventsirma kaj akvorezista tavolo kaj sub ĝi oni metis “plafontabulojn” sonabsorbajn kaj varmokonservajn. Sur la nudaj ŝtalkabloj de la malsupra vico estas bonorde dismetitaj multe da rondformaj mikrofonoj. Sur la oranĝkolora centra ringo estas instalitaj lumigiloj por lumigi la tutan konkursejon de la supro kaj por fotografi kinematografan filmon. Kiam ĉiuj lampoj estas lumigitaj, la oranĝkolora centra ringo, la helverdaj kabloj kaj la ĉielblua plafono prezentas kune tre belan kaj harmonian tuton.

Ĉirkaŭ la konkursejo estas etaĝigita podio por spektatoroj en cirkloj, malgrandigitaj de-supre malsupren unu post la aliaj, kaj ili estas dividitaj per du

cirklaj trapasejoj en tri partojn: la supran, la mezan kaj la malsupran. De la supra ĝis la malsupra estas 36 vicoj da lignaj brakseĝoj. Ĉar la dekliveco de la spektatora podio estas konvena, la spektatoroj, kiuj sidas eĉ en la plej supra vico, povas vidi klare ĉion en la areno.

La areno en la mezo de la konkursejo estas rondforma, 40 metrojn en diametro. La planko estas pavimita, per fortikaj sed iom elastaj lignaj tabuletoj en du tavoloj. Se oni forportas moveblan parton de la spektatora podio ĉe la rando, la areno fariĝos oblongforma. Tiam oni povas enmeti dek tablojn por ludi tablotenison samtempe.

La ĉirkaŭa barilo de la areno estas malhele verda. Ĝi formas fonon klare reliefigantan la blankan pilkon de tabloteniso, kaj tute ne ĝenas la vidon de la atletoj en la maĉo. Aeruma ekipaĵo de la konkursejo ĉiam freŝigas la aeron kaj tenas ĝustan temperaturon kaj samtempe povas reguligi la ventumadon en ĝusta rapideco, por ke la maĉo de tabloteniso ne estu malhelpata.

En la orienta kaj okcidenta flankoj de la konkursejo sin trovas ĉambroj por transsendo de televido kaj por radioelsendo de ĵurnalistoj. Okaze de internacia ĉampionec-turniro la ĵurnalistoj el ĉiuj landoj povas rapide kaj ĝustatempe ekspedi novaĵojn al ĉiuj anguloj de la mondo per telefonoj kaj telegrafoj.

### Ripozejoj

Elirinte el la okcidenta pordo de la konkursejo oni atingas la ripozsalonon por spektatoroj. La plafono, kolonoj kaj planko estas helverdaj. La koloro estas tre freŝa kaj eleganta. Estas sep grandaj kaj malgrandaj ripozsalonoj, kaj du cirklaj ripozkoridoroj, kies cirkonferenco estas ĉirkaŭ 300 metrojn longa, lokitaj respektive en la tera, dua kaj tria etaĝoj, kiuj povas enlasi la tutan spektantaron por ripozi. La stilo de la ripozsalonoj estas preskaŭ la sama, la koloro kaj lumado estas sufiĉe milda kaj plaĉa. La salonoj lokitaj ĉe la orienta, suda kaj norda enirejoj en la tera etaĝo, estas ornamitaj respektive per helflava, helverda kaj helruĝa koloroj. Havante enirbiletojn de respondaj koloroj, la spektatoroj povas facile trovi la sektoron de siaj seĝoj. La konkursejo havas entute 24 enirejojn, tra kiuj la tuta spektantaro povas eliri en kelkaj minutoj.

Elirinte el la ripozsalono kaj turnante sudflanken, oni venas al la ripozejo kaj amuzejo de la atletoj. Ili lokiĝas en la plej konvena parto de la tuta sporthalo. En la plej malsupra etaĝo sin trovas du ekzercoĉambroj, kun areo po 250 kvadrataj metroj por ekzercado de la atletoj en ludado de korbopilko, volejbalo, tabloteniso kaj en gimnastiko antaŭ la maĉo. Kontraŭ la ekzercoĉambroj estas kvar ripozĉambroj, vastaj kaj helaj, por ke la atletoj tie ripozu antaŭ aŭ post la maĉoj. Apude troviĝas ankaŭ sanitarajo kaj duŝejo.

Suprenirinte la unuan etaĝon, oni trovas klubon kun ĉielbluaj muroj kaj flavaj plafonoj speciale aranĝitan por atletoj. Post maĉo la atletoj povas veni ĉi tien por ludi ŝakon, bilardon aŭ ĝui pejzaĝon ĉe la balustrado de balkono ekster la ĉambro. Laŭlonge de la cirkonferenco estas vico da ĉambroj, preskaŭ en sama vasteco, kiuj povas esti utiligataj por ripozado, instruado aŭ ekzercado. La areo de ĉiu ĉambro estas ĉirkaŭ 30 kvadratmetroj, kun ĉielbluaj plafonoj kaj flavaj muroj, plene de sunlumo kaj kun balkono ekstere. Dum la tutmonda ĉampionec-turniro de tabloteniso, tiuj ĉi ĉambroj fariĝis la ripozĉambroj de la atletoj el ĉiuj landoj.

Estas planite planti iom poste diversajn arbojn en la ĉirkaŭo ke la sporthalo kaj la najbara stadiono estu ĉirkaŭitaj per densa verdo. Tiam, la spektatoroj kaj la atletoj povos post la maĉoj promenadi inter la densaj boskoj, remi sur la klara akvo de la lago, aŭ ĝui pejzaĝon ĉe la balustrado apud la artefarita lago, por rapide sin refreŝigi.

### *For, Kapitalisma Usono!*

*Ho, kapitalisma Usono!  
Via ekspluatanta mono  
malfeliĉigas la homaron.  
Tuj for la fiegan dolaron!*

*Ho, fia kapitalisma Usono!  
Via registaro estas fripono,  
kiu sklavigas mizerajn landojn.  
Forigu de ili viajn plandojn!*

*Usono, ho fia Usono!  
Kiam la malfeliĉa mondo  
liberiĝos el via mono?*

*Okcidenta Eŭropo — ho Usono! —  
Latina Ameriko kaj tiel plu,  
ili tre suferas pro via mono,  
vi ekspluatas ilin kun granda ĝu'!*

*Vi mokas pri la "satelitoj" sovetiaj,  
sed ĉu la landoj de Okcidenta Eŭropo  
ne estas vere nuraj satelitoj viaj?*

*Milionoj da senlaboruloj ne krias,  
ke via politika reĝimo jam fias?*

*Ho, ekspluatanta Usono!  
For de la mondo via mono!  
Jam treege fetoras via putra reĝimo!  
Al la homoj naŭzas via vultura animo!*

Diderto Freto (el Brazilo)

Rio, 8—11—1960


# Tablotenisa Sporto en Ĉinio

**L**A ĉina tablotenisa teamo komencis sian partoprenon en la konkurso por la mondaj ĉampionejoj en 1953, kaj post nur 7 jaroj, ĝi jam fariĝis forta teamo bone konata tra la mondo. En 1959, okazis la 25-a Monda Ĉampionec-turniro de Tabloteniso en kiu la teamo gajnis por si la mondan ĉampionecon de vira unuopa konkurso. Ĉijare, en la 26-a Monda Ĉampionec-turniro de Tabloteniso, ĝi atingis la ĉampionecon de vira kolektiva konkuro kaj sub-ĉampionecon de virina kolektiva konkurso, ankaŭ en la vira kaj virina unuopaj konkursoj ĉinoj sportistoj akiris ĉampionecon. (vidu 154 p.) Jen riĉa frukto de la amasa tablotenisa sporto de Ĉinio post la Liberiĝo.

Antaŭ ĉ. 40 jaroj, la tablotenisa sporto ekestis en malmultaj grandaj urboj en Ĉinio, kiel Ŝanhajo, Kanton, Nankino kaj Tiangin, sed dum la 30 jaroj antaŭ la Liberiĝo la sporton partoprenis nur malmultaj riĉuloj kaj parto de la lernantoj — fundamento malfortika kaj la sporta arto nealtigebla. Ĝis la Dua Mondmilito, ĉinaj tablotenisaj ludantoj uzis ĉiam lignajn batilojn kaj diversaj estis la normoj de la pilko; eĉ la iom pli famaj el ili scipovis nur la ordinarnajn manierojn de atako kaj repuŝo. En 1948, la kuomintang-a registaro okazigis en Ŝanhajo la t.n. Sepan Tutlandan Sportkunvenon, en kies tablotenisa konkurso partoprenis nur kelkdekoj da homoj. Kaj por kontaktiĝo kun alilandaj sportuloj la ĉinaj tablotenisaj sportuloj havis ja malmulte da ŝancoj.

*Jang Hiĉang, instruisto de Maĉangdaŭ-a elementa lernejo de Tiangin klarigas al siaj knaboj fundamentajn teknikojn pri tabloteniso.*

*Foto de Hinhua*



*Sperta tablotenisisto helpas amatorojn de Honghin-a Plastika Fabriko en Ŝanhajo dum ilia ekzercado.*

*Foto de Hinhua*

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia tablotenisa sporto disvolviĝas vige kaj vaste. En la pasintaj 11 jaroj post la Liberiĝo, la tablotenisa sporto rapide disvastiĝis en multajn urbojn kaj vilaĝojn. Same kiel la aliaj, ankaŭ tiu ĉi sporto iom post iom fariĝis unu el la ŝatataj aktivadoj de la popolamaso kaj la konstantaj ludantoj nombras milojn kaj dekmilojn. Multaj fabrikoj, minejoj, institucioj, lernejoj, popol-komunumoj, kaj eĉ kelkdek-personaj fabriketoj kaj bazorganizoj havas siajn tablotenisajn instalaĵojn kaj amatorojn.


En 1952, la unuan fojon okazis en Pekino tutlanda konkurso tablotenisa, kiu okazis poste preskaŭ ĉiujare. En 1958, la partoprenantoj kreskis jam ĝis pli ol 300 diversnaciaj gesportuloj el 27 provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj. Ekde la jaro 1959, oni okazigis pli grandskalajn amasajn tablotenisajn konkursojn en multaj lokoj de la lando. En 1960 en diversaj kvartaloj de Pekino okazis unu post alia amasaj konkursoj kiujn partoprenis po 10,000-50,000-100,000 personoj. En Ŝanhajo, pasintjare, la partoprenantoj en bazaj tablotenisaj konkursoj atingis 600,000 personfojojn. En tiuj ĉi amasaj konkursoj ŝtatoficistoj, laboristoj, instruistoj, lernantoj, komizoj, triciklistoj, membroj de urbaj popolkomunumoj k. a. La gejunuloj



kaj geknaboj en Harbino mem faris el forjetajoj dek mil parojn da batiloj kaj pli ol 2,300 tablojn por tablotenisita ludo.

Surbaze de la vasta disvolviĝado de tablotenisita sporto en la amaso, sur la tablotenisita areno de Ĉinio elkreskis unuj post aliaj novuloj kiel buntaj floroj printempaj. Neniu el la ĉampionoj viraj aŭ virinaj de la tutlandaj tablotenisitaj konkursoj povis daŭre teni la honoran titolon de landa ĉampiono por tri jaroj. Nuntempe, krom Ĵong Guotuan, Vang Ĉuanjaŭ, Hju Jinseng, Jang Ĵuj-hua, Ĝuang Giafu, Kiu Ĝonghuj, Sun Mejjing k.a. famaj spertoriĉaj ĉampionoj, aperis talentaj novuloj kiaj Ĝuang Zedong, Li Fujong, Hu Keming k.a. Tiuj ĉi junaj tablotenisistoj gajnis brilajn venkojn en konkursoj kaj enlande kaj eksterlande.

La fundamenta kaŭzo de la rapida disvolviĝo de nia tablotenisita sporto kuŝas en la bona prizorgo pri ĝi de la Partio kaj Registaro. Nia fama sportisto Vang Ĉuanjaŭ ŝatis ludi tablotenison jam antaŭ la Liberiĝo sed tiam li eĉ ne havis monon por aĉeti batilojn. Nur post la Liberiĝo, lia arto povas esti plene disvolvita. En la pasinteco Ĵong Guotuan suferis de ftizo pro malriĉeco de sia familio, sed dank' al zorgado de la Partio li rapide resaniĝis, kaj gajnis la plej altan gloron en la monda tablotenisita ĉampioneco. La progreso de ĉiu el niaj eminentaj tablotenisistoj, entenas ankaŭ la saĝon de siaj kunbatalan-



Konkurso de junaj gesportistoj de diversaj bazaj organizoj de Ŝanhajo. Foto de Hinhua

toj. Kiel ĝuste diris Ĵong Guotuan: "mia sperto venis de la kolektivo".

La alta batalspirito, bonaj moralo kaj sinteno kaj la lernemo de la ĉinaj tablotenisitaj sportistoj ĝuas bonan reputacion ankaŭ en la internacia tereno de tiu ĉi sporto. Ĉifoje en la 26a Monda Ĉampionecturniro de Tablotenisita, ili vere ĝojas havi eblon renkonti amikojn el la tuta mondo kaj pli alten levi la nivelon de la tablotenisita sporto kaj la amikecon inter ĉinaj kaj alilandaj tablotenisitaj sportuloj al nova kulmino.

(Daŭrigo de 109 p.)

nacio venis al Ĉinio por interrilatiĝi kun la ĉinaj komunistoj, en majo de la sama jaro la Komunista Grupo, t.e. la iniciata grupo de la Komunista Partio de Ĉinio fondiĝis en Ŝanhajo, la centro de la laborista movado. Pli poste komunistaj grupoj fondiĝis sinsekve en Pekino, Vuhano, Ĉangŝa, Kantono, Ginan kaj aliaj lokoj. Post sia stariĝo la komunistaj grupoj, aktive propagandis pri marksismo inter la laboristoj, organizis revoluciaj sindikatoj kaj preparis por fondo de komunista partio. Maŭ Zedong estis respondeculo de Hunan-a komunista grupo. Krom okupiĝo pri la laborista movado, propagando pri marksismo kaj serĉado de fidelaj kamaradoj por prepari la fondon de komunista partio, li ankaŭ korespondadis kun Caj Heseno, komunista intelektulo studanta en Francio sin vivtenante per laboro, por diskuti pri komunismo kaj fondo de partio komunista. El la korespondadoj estas videble, ke Maŭ Zedong jam tiam fariĝis firma marksisto. Li opiniis, ke la materiisma koncepto de historio estas la teoria bazo de la komunista partio, ke proletara diktaturo estas neevitebla regulo de so-

cialisma revolucio, kaj la ĉina revolucio devas iri la vojon unuigi la subprematajn kamparanan amason kaj ĉiujn unuigeblajn fortojn kun la laborista klaso kiel la kerno, por ĝisfunda batalo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Kaj la gvidado de la Maj-kvara Movado en Hunan-regiono kaj de la batalo por forpeli la militariston Ĝang Gingjaŭ en Hunan fare de Maŭ Zedong estis konkreta praktikado de ĉi tiu strategia penso de marksismo. La teoria laboro kaj revoluciaj agadoj de Maŭ Zedong metis firman bazon por la starigo de la Partio.

La 1-an de julio, 1921 okazis en Ŝanhajo la Unua Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio en kiu partoprenis 12 delegitoj, inkluzive de Maŭ Zedong, Dong Bivu, Ĉen Tankiu, He Ŝuheng kaj aliaj, reprezentantaj ĉirkaŭ 50 membrojn de la komunistaj grupoj. La unua kongreso aprobis ĝian unuan statuton de la Komunista Partio de Ĉinio kaj elektis ĝian centran organizon kaj fondis la Komunistan Partion de Ĉinio. Ekde tiam brave batalas en Ĉinio la unuiginta partio de la laborista klaso, tute novtipa, kun komunismo kiel sia celo kaj marksismo-leninismo kiel la gvidilo por siaj agadoj.

# Mi Fariĝis Modelo de Metilernanto

**M**ENG Fanĝi estas mia nomo. Antaŭ tri jaroj, forlasinte la vilaĝo, mi advenis al Pekino kaj fariĝis metilernanto de la muldejo en Pekina Aŭtomobilo-fabriko. Nun, la kvinan fojon oni elektis min modelo de metilernantoj.

Rememorinte mian travivaĵon dum tiuj ĉi jaroj, mi kore dankas la partion pro ĝia gvidado kaj edukado kaj miajn majstrojn pro iliaj helpoj. Alie mi ne povus havi la nunan progreson.

Ankoraŭ klare restas en mia memoro tia malagrablaĵo kiam mi venis al la muldejo:

Antaŭ ol mi venis al la fabriko, mi jam aŭdis tian malican parolon: "muldisto, malpura kaj laca, la tutan vivon ne povas sin vesti bone." Enirinte la muldejon mi vidis, ke en la ĉambro ja vere estas malhele, plene de fumo kaj vaporo. Kunpremante la dentojn mi pacience portis la kuleregon de fandita fero la tutan tagon. Vespere, mi ne povis plu min deteni de ĉagreniĝo. Mi pensis, ke fininte la lernon de mal-supera mezlernejo, almenaŭ mi devas labori kiel tornisto en la fabriko, sed nun tute neatendite, mi devas la tutan tagon porti kaj portadi! Se daŭrus tia laboro, ĉu ne vane forportiĝus mia tuta juneco? Mi skribis petskribon, por eniri lernejon por plua lernado.

La sekvintan tagon, la sekretario de la Partikomitato de la muldejo He Julin vizitis min kaj afable diris: "Kio? Ĉu junulo ne volas labori ĉi tie? Ekpensu, sen muldisto ĉu oni povas fari kaldronon? Ĉu vi povas manĝi vian rizajon? . . . se ĉiu volus fariĝi tornisto, sed ne muldisto, de kie venus la tornilo? Kiel do, oni povus fariĝi tornisto? Se neniu muldus la pecojn, de kie venus eleganta aŭtomobilo?" Kaj li daŭrigis: "Vi diris ke en lernejon vi volas lerni pli multe por servi la popolon, tamen vi ankaŭ povas lerni en la fabriko, ĉu ne? Ĉi tie ni havas majstrojn kiuj neniam lernis en lernejo sed multaj el ili jam atingis en klereco la nivelon de universitato, iuj eĉ fariĝis inĝenieroj. Vi povas lerni de ili multe da aferoj utilaj." Tiam mi nenion parolis sed mi tute ne estis konvinkita. Mi pensis, kian kapablon havas tiuj majstroj? kion mi povas lerni de ili?

Iun tagon, kiam mi portis la kuleregon, preterpasante la fornegon, subite antaŭ fornego disŝprucis fajreroj, krakante kvazaŭ krakfajraĵoj. Tute surprizita, mi forjetis ĉion el la manoj kaj turninte min kuregis eksteren. Ĉar la fandita fero elfluis tro multe, la spiltruo de la fornego ne povis esti ŝtopita kaj la fandita fero fajreruĝa elfluis sur la malvarmegan cementan teron kaj aŭdigis bruon kvazaŭ eksplodo. Konsternite, mi subite vidis homon tenanta ferbaston kun koto kuri antaŭ la fornego, kaj mi kriegis timigite: "Danĝero! ne iru antaŭ la fornego!" Sed la homo, ŝajnante nenion aŭdinta, ignoris mian atentigon. Maltrankvila pro li mi tie staris, sed la muldejo tuj

kvietiĝis. Ĉiuj venis antaŭ la fornego, kaj trovis ke majstro Tian Ŝiĝeng jam ŝtopis la spilejon. Ĉirkaŭinte la majstro ni premis al li la manojn kaj esprimis nian respekton. Majstro Tian kapskuis: "Nenio estas! Nur tio kion ni laboristoj devas fari!" Mi nenion diris sed la unuan fojon mi aplaŭdis en mia koro la majstron.

Iun tagon, majstro Ĉang Gonju instruis al mi kaj iu alia metilernanto fari turbinon por aŭtomobilo. Ĉar la majstro klarigis senfine, mi tute malpacientiĝis. Mi pensis ke homoj maljuniĝintaj ĉiam emas tede babilaĉi. Efektive, kio malfacila estas en ĝi? Foriris la majstro kaj babilante ni du baldaŭ elmuldis unu turbinon, sed kiu atendis ke provado montris ĝin ne kvalifikita, kaj denove ni faris alian sed same netaŭga. Tiam ni ambaŭ estis tute senhelpaj, nur stulte larĝigis la okulojn. Dum ni estis en granda embaraso, venis la majstro kiu, levinte la farajon, ekrigardis ĝin kaj sulkigis liajn brovojn. Mi pensis, ke ĉi foje la majstro nepre koleros, sed tute neatendite li diris trankvile kaj milde: "Ĉu mi ne ripete diris al vi, ke dum la farado vi devas ofte kontroli per la termometro? La temperaturo devas esti nek pli nek malpli alta, sed ĝuste ĉirkaŭ sep cent gradoj. Pro nebona regado de la temperaturo, dufoje via produktaĵo pruviĝis nekvalifikita." La majstro daŭris: "Ne malestimu muldistan laboron. En tio ni ja havas multon por lerni."

Post kelka tempo, mi iom lertiĝis en mia laboro. Tiam mi denove fariĝis iom fiera. Mi sentis min jam kapabla en laboro sed mia salajro ankoraŭ ne plialtiĝis, kaj ĉiam mi ne havas sufiĉe da mono.

Iun tagon, okazis kunsido de maljunaj laboristoj de la muldejo kaj mi ankaŭ partoprenis. Multaj majstroj rakontis pri sia vivo en la pasinteco. Majstro Tian diris, kiam li estis ĉirkaŭ sep jaraĝa, li fariĝis metilernanto sed nenion li ellernis. Ĉiutage li zorgis pri infanoj kaj pretigis manĝojn por la mastro. Kiam li estis malbonhumora, li ofte senkaŭze lin batis. Hejmen reveninte ĉe la printempa festo li ne kuraĝis etendi sian manon por preni manĝopelvon, ĉar liaj manoj estis plenaj de sangofendetoj pro frostiĝo. Trovinte ke li estis tiel turmentita, la patrino ekploris kaj ne lasis lin reiri al la mastro. Tamen, se li ne reirus, li devus repagi al la mastro la manĝokoston de du jaroj. Kiel malriĉulo povus pagi tiom multe da mono? Devigite, la patrino plorante denove lin forsendis al la mastro. Majstro Ĝang Ĝinĝong diris ke li fariĝis metilernanto dum sia infanaĝo. En la unuaj tri jaroj li ankaŭ ĉiutage preparis manĝojn kaj zorgis pri infanoj por la mastrino. Fininte la tri jarojn, li komencis kribri sablon kaj kolekti neeluzitan ŝtonkarbon kaj li devis labori ĉiutage ĝis profunda nokto ĉirkaŭ la unua horo. Li apenaŭ fermis la okulojn por ripozi momenton, baldaŭ li devis eklabori je la kvara. La mastro kutime forpelis metilernantojn

el sia ĉambro kiam li faris teknikan laboron. Se iu demandis lin: "Kiel fari ĉi tiun laboron?" Li tuj rebate respondis: "Ne demandu, vi scios estonte." La metilernantoj povis nur rigardi ŝtele tra pordofendo, aŭ ellitiĝinte en nokto rigardi la farajon de la mastro kaj mem pripensi kiel ĝi estis farita. Poste li ellernis kaj havis iom da kapablo, li edziĝis kaj fariĝis patro de kelkaj infanoj. Sed la salajro de unu monato sufiĉis nur por aĉeti duonsakon da maizfaruno. Kiel vivteni la familion el kvar-kvin personoj? Li devis ĉien vagi por almozoj.

Aŭskultinte tion mi korprome ekploris. Mi pensis ke mi ĉiutage manĝis tiel bone, vestiĝis tiel varme kaj neniam mankis al mi ĉiutagaj necesajoj. Malgraŭ tio, mi ofte plendis pri malmulta salajro. Tio estas ĉiutage manĝante sukeron ne scii ĝian dolĉecon.

Post tio, la partio mobilizis ĉiujn lerni la verkojn de Prezidanto Maŭ. La sekretario He diris ke bone lerni la verkojn de Prezidanto Maŭ estas la sola kondiĉo por bone fari la laboron. Ĉiuj lernis serioze. Mi dum lernado pensis: Ĉio disvolviĝas kaj transformiĝas. Ĉu la laboro de muldado ne estas transformebla? Ne, mi ne kredas, mi devas pripensi kiel oni povas fari revolucion en muldado.

Mi trovis ke tre malrapide iras la laboro de sablokribristo en la muldejo kaj post la tuttaga laboro oni sin sentas tre laca. Ĉu estas eble meti la kribrilon en keston kaj kribri per maŝino? Tiel la cindro ne povus elŝpruci kaj la homo ne estus laca. Sed kiel fari? Mi vidis ke en la fabriko estas karbokribra maŝino kiu ŝajnis al mi tre bona, kaj ĝin imitante mi faris modelon de sablokribra maŝino per argilo. Kvankam la modelo estis jam elfarita, sed la maŝinpecoj estis aŭ tro grandaj aŭ tro malgrandaj, kaj post nelonge ili sekiĝis kaj fendigis. Kelkfoje mi volis konsulti la teknikistojn sed kiam mi eniris ilian laborĉambron, vidinte ke ĉiuj estas okupataj de desegnado kaj ke ili desegnas ja koloson — projekton de muldmaŝino, mi nenion povis fari krom desegni per mi mem. Sed la desegnon de maŝinoj mi tute ne scipovas eĉ rigardi, tial mi devigite desegnis nur laŭ ĝia eksteraĵo. Mi desegnis tage kaj nokte. Tiam iu diraĉis: "Mi jam vojaĝis tiom multe da lokoj, sed neniam mi vidis ke oni kribras muldsablon kaj portas fanditan feron sen manlaboro de homoj!"

Mi absorbite desegnis kelkajn tagojn kaj fine ĝin findesegnis. Sed oni komprenis kion ĝi prezentas, nur post mia longa klarigo. Sciinte la aferon, sekretario He tuj venis al mi kaj instigis min: "Junulo, ne mal-esperu, la partio vin subtenas." Kaj li sendis iun majstron speciale por min helpi. La majstro helpis min kaj elpensis ok malsamajn angulojn de kliniĝo per kiuj oni povas aparte elkribri la grandajn kaj malgrandajn sablerojn. Mi finis jam la desegnon sed kiel fari? Mi nur scipovas fari krudajn muldadojn, sed la masjtro diris, ke tio ne gravas. Li instruis min pri elektra kunforĝado, borado de truoj kaj baldaŭ estis preta la sablokribra maŝino simila al ligna kesto. Se oni ŝaltas



*Kablo-instalistoj sukcese solvas la ŝlosilan problemon.  
Kolektive verkita de studentoj  
de la Lusin-a Belarta Kolegio*

la komutilon, ĝi tuj aŭtomate kribras kaj laboras ĉudek kvinoble pli rapide ol homa forto.

Post tio, la intereso de ĉiuj pligrandiĝis. Kiam ni rememoris la laboron de portado de kuleregoj, kiuj okupis tuttage dekdu homojn, ni demandis nin, ĉu estas eble ankaŭ elpensi ian rimedon por anstataŭigi homan forton per maŝino en tio? Ĉi foje, la afero iradis pli glate. Dank' al la helpo de la partio kaj maljunaj laboristoj, baldaŭ pretiĝis tuta transporta linio por fandita fero, kaj oni povas transporti la kuleregon nur per neforta puŝeto de unu aŭ du homoj. Tiel ni efektivigis transportan flulinion kiu aŭtomatigis la tutan laboron de muldado, versado, sablokribrado kaj sablotransportado.

Tiam la partio denove alvokis ĉiujn per nova slogano: "Elpensu rimedojn por ke ĉiuj muldistoj laboru en blankaj vestoj!"

Bolis la tuta muldejo. Pli ol mil homoj envolviĝis en plena aktiveco de teknika revolucio. Ili ĉiurimede plibonigis la modelon kaj ŝelmodelon. "Kiom da kapoj, tiom da saĝoj", post nelonge, ĉio bone sukcesis. Nun se vi vizitus la muldejon, vi povus heziti ke vi vojeraris. Ĉu ne? Vi vidus la neĝblankajn murojn, kelkdek potojn da floroj sur la fenestrobretoj, diversajn botelojn kaj bokalojn, ĉio ĉi tio donos al vi la aspekton de laboratorio.

# Sonrido de la Novedzino

**S**ENDINTE sian filon al lia bopatrino, tiam Onjo Lu ekspiris jam libere de multaj zorgoj. Ŝi forŝovis al si la hararon, purigis la veston, kaj sidiĝis sur la benkon ĉepordan.

La novedzino morgaŭ venos edzinigate. Onjo Lu foje vidis la fianĉino de sia filo, kiu estis vere bela kaj lerta knabino, se ne la unua, certe la dua en la tuta popolkomunumo, kiel la samvilaĝanoj laŭdis. La koro de Onjo Lu ja dolĉis kvazaŭ banate en mielujo. Ĉu la multjara revado ne efektiviĝas jam nun antaŭ siaj okuloj? Kiel ŝi povus ne ĝoji? Antaŭ pli ol dudek jaroj, ŝia filo estis naskita en kaduka bovĉara ŝedo de bienulo. Pro manko de vesto, la etulo estis envolvata en ĉifona pantalonon. La patrino post akuŝo havis nenion grasan por sin nutri. La monavida bienulo eĉ avidis iom profiti el la ŝedaĉo por pagi matenmanĝon. Ĉar ili ne povis pagi la "luprezon", li devigis ŝian tutan familion transloĝi. Ŝi, sekvante la edzon kaj kunprenante la filon, vagadis en senlima neĝego. . . . Tiam ŝi neniel kuraĝis pensi pri edziĝo de la filo. Se ne alvenus la Komunista Partio, estus forjetitaj jam en flavan teron la ostoj junaj kaj maljunaj. Nun, per la emociaj okuloj rigardante la portreton de Prezidanto Maŭ, ŝi sentas ke li ankaŭ ŝin ridete rigardas, kaj kunĝuas ŝian ĝojon.

Lumo de la subiranta suno rekte radiis en la pordon, kaj varmetigis la korpon de Onjo Lu, kiel agrable! Ŝi turnis sian rigardon al la edziĝo-ĉambro, kaj aprezis sian delikatan aranĝon. . . . Ĉio kontentigis ŝin, nur la muro ĉe la ŝranko montriĝis senorname malplena, kio al ŝi ne plaĉis. Ŝi denove plendis en la koro pri sia edzo, sentaŭga maljunulaĉo. Plezura afero estas al iu ajn la edziĝo de filo, kaj plie, la familio ja sin levis el terura mizero. Tamen, ŝajnas al la maljunulo ke nenio okazos, ĉiumatene ellitiĝinte li aŭ akriĝis siajn ĉizilon kaj hakilon, aŭ kun malmiopaj okulvitroj legis ĵurnalon, post matenmanĝo li iris al sia produktbrigada riparfabriko de agrikulturaj instrumentoj; kaj vespere post lia reveno, oni nur aŭdis lin rakonti pri konkursoj en sia fabriko kaj bonaj novaĵoj el ĵurnalo. Foje, ŝi intence diris kolerŝovante la buŝon:

"La filo naskiĝis ne de mi sola, ĉu lin devas zorgi nur mi mem?"

"Ĉu indas du laborfortojn tia bagatelo?" la maljunulo humore respondis, "La afero estas facila, aĉetu iom da sukerajoj, preparu glasojn de vino por la edziĝa festo, tio jam sufiĉas."

Efektive Onjo Lu bone komprenis la animstaton de la maljunulo, ŝi sciis ke la tasko de ripari agrikulturajn instrumentojn estas tre granda en la fabriko, ŝi neniel volis disigi la energion de la mal-

junulo! Ne estis multa ŝia postulo al la maljunulo. Estis nur tio, ke ŝi aĉetis el la urbo kelkajn pecojn da vitro, kaj deziris peti la maljunulon kaptante iom da tempo fari kelkajn lignajn kadrojn, por enmeti la honordiplomojn gajnatajn de la tuta familio de post la Antaŭensaltego, kaj ilin pendigi en la edziĝoĉambro, tiel ke ili povos unuflanke beligi la ĉambron, kaj aliflanke donos al la novedzino bonan impreson — ke la edzo estas modelo de la popolkomunumo, kaj ankaŭ la bogepatroj estas progresemuloj! Ŝi diris al la maljunulo:

"La proverbo diras: alveninte la domon bopatrinan, la novedzino pli taksas la homojn ol la kamp. . . ."

"Ve, vi maljuna sencerbulo," rompante ŝian parolon la maljunulo diris: "Blanka kolombo flugas ĉiam al luma loko. Pri ĉiuj detaloj de nia familio jam delonge informiĝis la knabino."

"Bone, do ni elpendigu kaj montru al ŝi la honordiplomojn!" diris Onjo Lu.

"Ne incitu mokridojn de la knabino, la honordiplomoj kiujn ŝi gajnis estas pli multaj ol kiom nia familio el tri personoj ĉiuj kune havas. Ĉu vi ne aŭdis? Ŝi konkuras la heroinon Mu Gujĵing\*."

Onjo Lu iam aŭdis, ke la knabino estas vere elstara en produktado, gajninta multe da honordiplomoj. Sed ĝuste pro tio ŝi des pli sentis necesaj la lignajn vitrokadrojn, kaj insiste petadis la maljunulon ilin fari.

"Tio ja estas laboro delikata kaj temporaba. . . ." diris la maljunulo.

"Sed ĉe la komenco ni devas doni al la novedzino bonan impreson!" ekscitiĝis Onjo Lu.

"He! Vidu, ĉu mi ne estas okupata dum la tuta tago?" dirante la maljunulo foriris.

Ju pli pensanta, des pli maltrankvila, Onjo Lu stariĝis kaj eliris ferminte la pordon. Nun ŝia koro estis plene logata de la sceno de sterko-kolektado antaŭ siaj okuloj: En la larĝa rivero antaŭ la vilaĝo svarmis ŝlimoĉerpantaj boatoj, miksiĝis la babilbruo de homoj, la plaŭdado de riverakvo kaj interfrapa klakado de boatopostajoj, kaj ŝajne havis la homan senton ankaŭ la fluanta akvo, sur kiu ĝoje dancetas trembrile arĝentaj ondetoj. Tion vidinte Onjo Lu sentis sin kaj gaja kaj maltrankvila, ŝajne ŝi aŭdis la interparolon de la estroj de brigadoj dua kaj tria en kiu ili primokas ilian brigadon unuan: "Post dek tagoj venos la jaro 1961, la brigado unua elsendas kutime malpli multe ol ni je unu boato, ŝajne ĝi ne povos plenumi la planon surverŝi ŝlimsukon sur la tritikon antaŭ la jarfino. . . ."

\* *Nomo de popolrakonta heroino, per ĝi oni nun nomas heroinon en produktado.*

Tiam Onjo Lu preskaŭ forgesis ĉion pri la edziĝo de sia filo, ŝi sentis ke ŝi havas multon por paroli al la aliaj kaj rapidigis siajn paŝojn sur la vilaĝa strato. Homoj renkontantaj ŝin tiel diris:

“Aj-ja-ja, vere okupata estas la aviniĝonto! Ĉu la edziĝo-ĉambro jam estas bele aranĝita kiel flora palaco?”

Je tiu parolo, Onjo Lu ekmemoris denove la lignajn vitrokadrojn, kaj ne povis deteni sin de plendo kontraŭ la maljunulo, kaj ŝi sin direktis al la fabriko de agrikulturaj instrumentoj. Ekstere de la fenestro ŝi aŭdis ke en la laborejo oni ŝercis kun la maljunulo:

“Majstro, vi devas peti kelktempan forpermeson por prepari iom da donaco por la novedzino ĉe via unua renkontiĝo!” “Alie ŝi ne nomos vin bopatro!” “.....”

“Hm, kompreneble, ĉu mi ne estas okupata ĝuste pro tio?”

Onjo Lu ekĝojis en la koro, proksimigante siajn okulojn al la vitra fenestro kaj trarigardis internen, sed tuj malvarmiĝis denove ŝia koro, ĉar la maljunulo estis riparanta kadukan boaton! Tiun boataĉon ŝi bone konis, antaŭ du jaroj kelkaj malzorgemaj junuloj konsideris ĝin sentaŭga, kaj de tiam lasis ĝin senokupa en fosajo, antaŭ ne longe la produktabrigado ellevis ĝin, kaj la maljunulo memvole akceptis la taskon ripari tiun ĉi boaton.

Nun Onjo Lu vere volas enpaŝi la ĉambron kaj hejmenigi la maljunulon por fari la kadrojn, tamen ili ĉiuj laboras entuziasme, kiom ne dece se ŝi tiel agus?

Jam estis antaŭtagmezo de la tria tago post alveno de la novedzino. La filo, pasiginte jam sian libertempon, frumatene iris labori en kampo, kaj la maljunulo laŭkutime eniris sian fabrikon de agrikulturaj instrumentoj. Ankaŭ la novedzino volis iri al kapolaboro, tamen retenite de la proksimuloj ŝi ripozis unu plian tagon, oni restigis ankaŭ Onjon Lu por akompani kaj interparoli kun la novedzino, iom konigante al ŝi la aferojn de sia propra produktabrigado.

Onjo Lu kvazaŭ sciema infano sin turnis ĉirkaŭ la novedzino. Ne estas mirige, ke vere aminda estas tiu ĉi knabino, unue belaspekta, kaj due bonhumora, ĉiam plaĉe nomas la bopatrinon panjo, tiel intime kiel al sia propra patrino.

La novedzino alportis aron da libroj kaj kantlibretoj, kiujn ŝi estis nun ordiganta. La okulgloboj de Onjo Lu turniĝis laŭ movoj de la lertaj manoj de la bofilino. Subite trafis la okulojn de Onjo Lu kelkaj koloraj honordiplomoj, ŝi tuj ekmemoris la kadrojn, ŝi pensis ke se la maljunulo vidus la honordiplomojn de la novedzino, certe ĉiu lia lipharo ridos pro ĝojo, kaj li nepre faros la kadrojn senprokraste eĉ dum nokto, kaj ŝi ĝoje kriis:

“Ho, kiel belaj honordiplomoj, ĉu ni ilin pendigu?”



“Panjo, ĉi tiuj jam estas malnovaj,” ridete diris la novedzino. “Por venigi la jaron 1961, ni klopodu fariĝi avangardaj en produktado, iom poste ni pendigu la novajn!”

“Pendigu la novajn?”

“Jes!”

“Hm...” Onjo Lu sentis sin korporema kaj diris serioze, “Nia brigado havas unu boaton malpli ol la aliaj brigadoj. Jam ne parolu pri alio, ja en la surversado de ŝlimsuko nia brigado postrestos post la aliaj.”

“Unu boaton malpli?” la nova edzino levetis siajn maldikajn brovojn, senpacience manfrotis kaj ŝerce diris: “Se troviĝus boato, mi povus montri mian kapablon. Panjo, via filo ne nepre estas mia rivalo en produktado!”

“Ah!” rigardante la vizaĝon de la novedzino rozan kaj junece radiantan, Onjo Lu ankaŭ frotis la manojn imitante sian bofilinon, “ankaŭ miaj manoj estas jukantaj por ekfaro. . . . Ve! Boato! Boato!. . . .”

Dum la interparolado de la bopatrinino kaj la bofilino, aperis ĉeporde la maljunulo, kun fiera rido sur la vizaĝo, kiel venkinta generalo kiu revenas en la ĉefurbon.

“Maljunuleto, ĉu la boataĉo estas finriparita?” vigliĝis Onjo Lu.

“He! Eĉ la ŝlim-ĉerpiloj estas pretaj!”

“Panjo, ni iru!” tion dirante la novedzino kuris eksteren, kaj gaje sonridis. . . .

La ridoj de la junulino kaj maljunuloj ĝoje jukigis ankaŭ gorgon de pigoj sur la arboj, ankaŭ ili ekkriis bonaŭgure. . . .

# Biblioteko en la Popolamason

— Skizo pri la Strata Biblioteko de Bansongjuan-avenuo, Ŝanhajo —

UNU tablo, du benkoj kaj tricent libroj, jen la “kapitalo”, kiun havis inaŭgure antaŭ du jaroj, la popolamase entreprenata biblioteko de la Antaŭstacia Strato en Nanshi-kvartalo de Ŝanhajo.

Kiel la vojo estas trairita, de la tiama popolamase entreprenata biblioteko al la nuna Strata Biblioteko? Nun ni turnu la “objektivon” de rememoro al la periodo de sept., 1958:

La biblioteko estis ĵus establita. La unuaj infanolegantoj enpuŝiĝis en la legejon, iuj kaptis librojn por legi, aliaj foliumaciis bildlibretojn, kelkaj eĉ kverelis inter si pro la legajoj. Nova libro tuj fariĝis makulita kaj difektita, post tuŝo kaj tiro per tiuj nigraj malpuraj manetoj. Tio ege ĉagrenis la administrantinojn. Ili laciĝis en ordigado de libroj: kiam la libroj ordiĝis ĉi tie, denove tie disjetiĝis.

“Ĉu ĝi aspektas biblioteko? Ĝi aspektas fakte ‘tetrinkejo!’” iuj diris indiferente.

La diro ke la biblioteko aspektas “tetrinkejon” kompreneble estas iom troigita. La ordo ja estis malbona. Kvankam la administrantinoj kriis per sia plej laŭta voĉo “amiketoj ne kverelu”, tamen ili ne sukcesis ŝanĝi la tumultan situacion en la biblioteko.

Estis vere malfacila problemo. Ĉu longe restos sensanĝa ĉio en la biblioteko? La partio indikis ke biblioteko estas frukto de la kultura revolucio amase

*La biblioteko de Dahin-strato de Kantono.*

*Foto de Hinhua*



kaj arde partoprenita de la laboruloj, oni devas daŭrigi ĝian funkciadon kiel eble plej bone.

Ili faris vizitojn al siaj konatoj kaj al aliaj bibliotekoj por lerni ties sukcesajn spertojn, iom post iom ili komprenis ke por forigi la malordon de la biblioteko oni devas sin dediĉi al bona prizorgo kaj instruado de la infanoj.

Ĉe la enirejo de la biblioteko nun aperis lavujoj, mantukoj, kaj tondiloj. Al ĉiu infano alveninta, onjo Ŝen, la ĉefadministrantino, unue zorgis ilian purecon kaj pacience lavis al ili la manetojn kaj fortondis al ili la ungetojn. Kaj post kelktempa kutimigo la infanoj komprenis ke oni ne devas legi librojn kun malpuraj manoj, kaj dank’ al tio ili alvenis nur post manpurigado kaj tiel al kutimiĝis al la higiena vivo. Estis infanoj, kiuj enirante en la bibliotekon etendis siajn manetojn kaj diris “Onjo, ĉu puraj estas miaj manoj?”

Iutagon, la patrino de Ĝongbaŭ rapidis anhelante en la bibliotekon, ŝi tre ekscitita, venis por esprimi sian dankon. Ŝi diris: “Antaŭe Ĝongbaŭ petolis kiel strata bubo kaj ne sciis lavi al si la vizaĝon kaj manojn, sed nun la manojn lavis purpuraj per si mem kaj helpas ankaŭ la purigan laboron en la hejmo. La biblioteko ja sukcese edukis la infanon.”

Kelkdekoj da rigardoj fokusis sur la vizaĝon de onjo Ŝen, kiu estis rakontanta historiojn al la infanoj. La rakontado allogis multajn infanojn, kiuj estis tute absorbitaj en la aŭskultado, kaj komprenis kion oni devas oponi kaj kion subteni; kiel elfluigis sian lastan guton da sango por la revolucio la martirino Liu Hulan kaj kiel oferis sian vivon sur la korea fronto la batalanto Huang Giguang por elpeli la usonajn invadantojn. . . . La noblaj virtoj de herooj eksaltadis en la infanaj koroj. Naivaj infanoj faris decidon lerni de tiuj oĉjoj kaj onjoj. Ili prizorgas atente ĉiun objekton de la publiko, konscie observas sociordon kaj reciproke kontrolas pri sia bonkonduito kaj avidas legadon de rakontoj. En la biblioteko ekestis jam la atmosfero kvieta.

Profitinte el la unua sukceso de rakontado, onjo Ŝen ĝin aplikis ankaŭ al la plenaĝuloj. Ŝi instigis la legantamason elekti inter si aron da rakontantoj kiuj penetris en la loĝanto-grupojn, produktajn grupojn kaj servajn grupojn por vaste rakonti pri revoluciaj historioj.

Foje ĉe la domo de Ĝang oni rakontis pri *La Senmorteco en la fajrego*. La kruela masakro fare de la reakciularo kontraŭ la revoluciuloj igis multajn mal-

junulinojn indigni kun dentoj forte kunpremataj kaj larmoj elfluantaj. La maljunulinoj diris ke aŭskultinte la rakontojn ili komprenis pli bone la malfacilecon en efektivigo de la hodiaŭa feliĉa vivo kaj kompare kun la revoluciaj martiroj ili sentis sin tro malgrandaj kaj hontindaj. Kiam en la produktaj grupoj oni rakontis la historion de Hiang Hiuli pri la sinofero de l'heroino savinta la proprajon de la ŝtato, la grupanoj diris: oni oferis eĉ sian vivon por la ŝtata posedajo, ni nepre ŝparu la materialon en produktado kaj ne produktu difektitajon!

Guto da progreso de la legantoj alportis al la administrantinoj instigon antaŭeniri por ĉiam pli bona laborado. Ĉu la bibliotekistino nur zorgas pri en- kaj el-prenado de libroj kaj gazetoj kaj rakontas historiojn ĉiutage? Ne, en la progreso ne ekzistas fino. Por ke la libroj donu pli multajn latentajn utilojn, estas necese malfermi la pordegon de la biblioteko, viziti la legantojn kun libroj kiujn ili deziras.

“Legu ĉiuj, entreprenu ĉiuj kaj administru ĉiuj!” jen estas la devizo de la biblioteko kiu iom post iom kolektis ĉirkaŭ sin aktivulojn kaj volontulajn servantojn el la legantoj. En la loĝantogrupoj ili fondis 67 cirkulajn librostaciojn, laŭ diverseco de legantoj kaj iliaj bezonoj oni aparte portis librojn en la manĝejoj, kudrejojn kaj la infanvartejojn. Kien iras la virinamaso, tien sekvas la libroj. Estis loĝantoj laborantaj en la konstruejo de Ĵihujgang, kien ankaŭ sekvis libroj, kaj dum interlabora ripozado, oni tuj vigliĝis ĉe la librokesto. La legantoj laŭdis unuvoĉe: la biblioteko jam enradikiĝis en la popolamason.

Ankoraŭ multaj estas la ĉiutagaj laboroj de la biblioteko. Kiam okazis politikaj kampanjoj, ili kunage akurate faris siajn servojn: fondi bildkoridorojn, organizi ekspoziciojn, eldoni nigratabulajn gazetojn, skribi sloganojn, alglui detonditajn materialojn el ĵurnaloj, organizi raportkunvenojn, studkursojn kaj

diskut- kaj babil-kunsidojn ĉe la loĝantoj, kaj tiel multe vigligis la kulturen vivon de la loĝantoj en la kvartalo.

Nova situacio postulas novan agmanieron, la popolamase entreprenata biblioteko de Antaŭstacia Strato tiutempe elsaltis el la rondo de la apudaj loĝantoj, kaj grandigis la nombron de ĝiaj legantoj, etendante la servemajn manojn al la laboristoj kaj komizoj de la malgrandaj fabrikoj kaj butikoj. Kunlabore kun la najbaraj malgrandaj fabrikoj kaj butikoj ili kolektis librojn kaj gazetojn de ĉiuj bazorganizoj sub sia administrado kaj “revivigis” arojn da “mortintaj libroj”. Por faciligi la libropruntadon al la laboristoj kaj oficistoj, ili puŝis cirkulan libroĉaron en fabrikojn por rekomendi novajn librojn dum la ripoztempo de la laboristoj. La laboristoj laŭdis ke la biblioteko jam “vivas” sub la bona administrado.

Nun la biblioteko de Bansonjuan-avenuo jam havas pli ol 22,000 volumojn da libroj, pli ol 3,600 hejmajn legantojn kaj ĉiutage akceptas vizitantojn je 700 homfojoj. La legtempo de la biblioteko ankaŭ longiĝis de du horoj al dek kaj duono da horoj ĉiutage. Nun ĝi fariĝis la centro de la ok bibliotekoj de la stratetaj komitatoj en la kvartalo de Bansonjuan-avenuo kaj sursultrigis la respondecon gvide helpi la aliajn bibliotekojn de la stratetaj komitatoj.

Nun enirinte la bibliotekon oni rimarkis ke ĉio estas en ordo kaj la atmosfero tiea donas al la vizitantoj fortan inspiron de la nova epoko: sin montras tie la verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj tie la libroj pri la popolkomunumo, pliprodukto kaj ŝparo, la tradicia revolucia edukado kaj la batalado kontraŭ imperiismo. La sloganoj kaj murgazetoj pompe elmontriĝas en la ĉambro kaj inter ili precipe okulfrapas slogano el dek du grandaj ideografoj signifanta: Kion faras la partio, tion propagandas la biblioteko. Jen estas la celo de tiu ĉi biblioteko.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## “LA UNUAJ” DE TIBETO

**LA UNUA HIDROELEKTRA CENTRALO** — Finkonstruiĝis la unua granda hidraŭlika elektra centralo en la antaŭurbo de Lhasa en Tibeto kaj ĝia povo atingas 7500 kv.

**LA UNUAFOJA SUKCESO DE DU RIKOLTOJ DE HORDEO** (Hordeum sativum) **EN UNU JARO** — Malgraŭ ke Tibeto situas en alta kaj malvarma terzono, tre mallonga estas la sezono taŭga por kreskado de cerealoj, tamen la tibetaj kamparanoj sukcesis en

1960 unuafoje en eksperimento akiri du rikoltojn de hordeo en unu jaro.

**LA UNUA FERŝTALA FABRIKO** — La unua malgrandtipa ferŝtala fabriko de Tibeto elfluigis jam en 1960 fanditan ŝtalon kaj ŝanĝis la fizionomion de Tibeto kie neniam antaŭe estis ferŝtala industrio.

**LA UNUAFOJA ELKORA ĜOJO** — La unuan kolorfilmon “Jubilanta Tibeto”, kiu dokumentis la vivon de la tibeta popolo antaŭ kaj post la Liberiĝo, bonakceptis

kun granda entuziasmo la vasta popolamaso de Tibeto. Jam 1,080,000 personfojojn oni spektis ĉi filmon en Tibeto. Filmoprezento, en la pasinteco, estis ekstreme malofta por la tibeta popolo.

**LA UNUA FOJO KIEL MASTROJ** — La liberigitaj tibetanoj la unuan fojon elektis siajn diversrangajn popoldelegitojn per demokratia balotado. Nun en ĉiuj 72 gubernioj de tuta Tibeto, fondiĝis la popola registaro kaj multaj tibetaj popolanoj fariĝis laborantoj de la registaraj institucioj.

## LIBROJ

**E**STIS la tria tago de post kiam mi fariĝis ĉefinstruisto respondeca por la dua klaso de la kvina jaro.

En la tagmezo, subite enkuris iu lernanto anhelante. "Sinjoro instruisto Ĝeng," li diris al mi, "Vu Ŝujŝeng denove interbatis kun aliulo!"

"Pro kio?" Mi tuj elkuris sekvante la lernanton kiu donis al mi la raporton.

Ekster la pordego de la lernejo du infanoj estis nedisigeble interkroĉigantaj kaj la pli malaltkreska lernanto de la kvara jaro estis forte premata al la tero sub Vu Ŝujŝeng.

"Haltu!" mi laŭtkriis kaj demandis al Vu: "Kial vi batas lin?"

"Li ne redonas al mi la libron, kiun li depruntis!" Li respondis tute sinpravige, ektornante la vizaĝon flanken.

"Kie estas la libro?" mi demandis.

"La instruisto diris, ke la libro estas malbona," respondis la malgranda lernanto. "Tial li jam ĝin formetis."

Kun granda indigno mi venigis Vu-n en la laborĉambron por havi apartan interparolon.

Kiel en la du antaŭaj tagoj, la "bubo-lernanto" konata tra la tuta lernejo ankoraŭ sintenis tre arogante kontraŭ mi, kun kapo oblikve tenata restante surda al mia parolo. Ju pli ĉagrenita mi estis, des pli indiferenta li montriĝis. Poste li eĉ ekfajfis.

Kion fari? Mi nur povis denove kritiki lin severe kaj lasis lin reiri hejmen.

Nokte, mi neniel povis endormiĝi. Ondiĝis en mia cerbo la komplikaj okazintaĵoj dum la pasintaj tri tagoj: La unuan tagon mi eniris la klasĉambron kun ekscitita sento. Kiu atendis ke tuj kiam mi turnis min por skribi sur la nigra tabulo, ekaŭdiĝis rideksplodo. Mi rigardis returnen kaj vidis ke Vu Ŝujŝeng estas pentranta testudon per kretostumpo sur la dorso de la lernanto kiu sidas antaŭ li. Rimarkinte ke mi alpaŝas al li, li nur aplombe forĵetis la stumpon kun neniom da bedaŭro. Post la fino de la leciono mi venigis lin por aparta interparolo. Ĝuste kiel hodiaŭ, li tute ne atentis kion mi diris al li.

Sed estas mirinde, ke tia petolema bubo kontraŭe ĝuas tre altan prestiĝon inter la lernantoj. Kiam la klasa komitato estis elektota, pluraj infanoj eĉ proponis elekti lin kiel komitatanton por lernado.

"Kiel tio povas esti?" Mi enpeniĝis profunde. Subite brilis en mia cerbo la vortoj de la partia sekretario: "Komprenu la infanojn kaj zorgu pri ili! Tiamaniere vi trovos la ŝlosilon por malfermi la animon kaj bone edukos ilin. . . ."

La sekvintan tagon mi faris viziton al la hejmo de Vu Ŝujŝeng. Malbonŝance lia patrino estis for por ĉeesti kunvenon de la komitato de la loĝantoj. Okaze de tio mi demandis la najbarojn. Ekaŭdinte min menciis lian nomon, la najbaroj tuj skuis la kapon kaj ĝemis, plendante al mi unu post alia. Ili diris ke nenium momenton li estas kvietaj hejme, aŭ interbatante kun alia knabo, aŭ ludsvingante sian bastonon. Iufoje li rompita pesil-vekon de alia familio kaj senkulpigis sin per la aserto ke li estis "sin ekzercanta".

Dum nia interparolo revenis la patrino de Vu Ŝujŝeng. Ŝi sciigis al mi ke krom petoli de tempo al tempo, li iam ankaŭ trankvile legas en fermita ĉambro. Mi demandis kiaj estas la libroj. Ŝi eniris en la dormoĉambron kaj revenis kun tirkesto, en kiu sin trovis malnovenhavaj bildrakontoj pri genioj, fantomoj kaj migrantaj kavaliroj kun supernatura povo. Mi kalkulis kaj trovis sume dudek tri ekzemplerojn. Tiam mi komprenis ke estas ĝuste tiuj libroj kiuj ruinigas lin.

Unue mi intencis konfiski tiujn librojn, sed tuj sentis ke tio estos iom tro kruda kaj eble vekos lian pli grandan antipation anstataŭ solvi lian pensproblemon. Sekve mi remetis ilin al la antaŭa loko.

Ekde tiam mi pli atentis pri li. Iom post iom mi ankaŭ trovis ke li havas multe da bonaj kvalitoj: honesteco, senpartieco, justeco, kapablo de sinesprimo per vortoj, k. c. Lia interbatado estis ĝenerale kaŭzita de lia venĝo por la maljuste traktitaj; ekzemple, se iu granda lernanto interbatas kun malgranda, li senhezite iras helpi la malgrandan lernanton por kontraŭbatali la grandan. Li kuraĝas fari kion la aliaj ne kuraĝas kaj ne timas kion la aliaj timas, ĉie manifestante la spiriton de feŭdisma kavaliro.

Iun vesperon, la ĉielo estis plena de steloj. La luno ankoraŭ ne leviĝis. Ĉio sur la tero kuŝis en krepusko. Ĵus reveninte de la strato, mi aŭdis iun parolanta sur la razeneto antaŭ la lernejo. Per malpeza paŝado mi alproksimiĝis por aŭskulti kaj trovis ke estas Vu Ŝujŝeng kiu faras rakontadon al dekelkaj lernantoj. Tiam li rakontis ĉapitron pri la aranĝo de sorĉa formacio en la feŭdisma kavaliro romano *Sep Kavaliroj kun Fluglavoj kaj Dek Tri Aliaj*



*Kavaliroj.* Li rakontis tiel vivece ke ĉiuj aŭskultantoj vidiĝis absorbitaj kun etenditaj koloj. Kelkaj malgrandaj lernantoj, verŝajne pro iom da timo, firme sin apogis al la korpoj de la grandaj lernantoj. Mi ja admiris lian paroltalenton kaj samtempe ricevis grandan inspiron.

De tiam mi ĉiam utiligis la postlecionajn horojn por rakonti al la gelernantoj rakontojn pri revolucia luktado. Komence mi rimarkis ke Vu Ŝujseng ĉiam sidas sola tre malproksime. Poste pli kaj pli multiĝis la aŭskultantoj kaj li ankaŭ venis por aŭskulti. Fine li eĉ petis min rakonti laŭ lia propra iniciato kaj pliboniĝis ankaŭ en la obeemo al disciplino. Kiam mi vidis ke mia labormetodo efikis, mi estis senlime ĝoja kaj donis pli multe da tempo por proksimiĝi al li. Ĉiutage mi rakontis al li historiojn pri ĉinaj kaj sovetuniaj heroaj gejunuloj. Por kulturi lian intereson en legado, iam mi intence interrompis iun rakonton en ĝia mezo.

“Do, kia estos la rezulto?” li ĉiam demandis min tiel maltrankvile.

“Ĉio estas detale skribita en la libro. Vi povas mem legi ĝin.” Mi diris kaj transdonis la libron al li.

Post kiam li finlegis la libron, mi interŝanĝis kun li niajn impresojn pri la libro kaj diris al li ke la herooj kaj modeluloj ne fariĝis hazarde, sed ilia eminenta karaktero laŭgrade formiĝis de la infaneco.

Iom post iom li trovis fortan intereson en revoluciaj libroj. Dum pli ol unu monato li legis dekkelkajn librojn kaj bildrakontojn, inter kiuj troviĝis la *Batalrakonto pri Dong Cunĵuj*, kiu priskribas batalheroon de la Popola Liberiga Armeo kaj *Mia Familio*, kiu prezentas la revolucionan luktadon en la blanka regiono. Samtempe, li ankaŭ estis ne plu tiel laŭvole petolema kiel antaŭe. Kvankam kelkfoje li ankoraŭ faris negravajn erarojn, tamen tuj kiam vi atentigis lin pri tio, li povis tre rapide korekti sin.

Iutage, la komitato de la klasa grupo de la Junaj Pioniroj permesis lin partopreni en la aktivado de la grupo pro lia progreso. Mi vidis tiutage ke li estas tiel ekscitita ke lia vizaĝo plene ruĝiĝis pro ĝojego kaj iam li eĉ eksaltetis sola nereteneble.

Tiun vesperon, kiam mi malfermis la pordon de mia dormoĉambro, mi vidis ke kuŝas sur la tablo pakajo, sub kiu estas metita nete skribita slipo kiu legiĝis jene:

*Kara sinjoro instruisto Ĝeng:*

*La kaŭzo kial mi ĉiam interbatis kun la samlernejanoj kaj ne aŭskultis kion vi diris al mi estis pro tio ke mi legis tro multe da malnovenhavaj libroj. Dank' al via helpo mi nun scias ke tiuj libroj estas venenaj.*

*Depost hodiaŭ, mi nepre legos pli multe da bonaj libroj kaj aŭskultos kion vi diros al mi,*



*por ke mi povu pli frue aliĝi al la Junaj Pioniroj.  
Tiujn ĉi malbonajn librojn bonvole forbruligu!*

*Via lernanto,*

*Vu Ŝujseng*

Mi malfermis la pakajon kaj trovis en ĝi difektitajn flavigintajn malnovenhavajn librojn, kiuj nombriĝis, laŭ mia kalkulo, ĝuste dudek tri.

S. J. Zee:

### *La Sofisto*

*Dum granda ŝvelo de somero  
Iu riĉulo dronis en rivero  
Kaj la kadavron savis malriĉulo.  
Nun ties filo volis reaĉeti  
Terura sumo estis la postulo:  
Oni ne povis eĉ la aŭdon kredi.  
La fil' konsilon petis de Deng Ŝi, la  
Saĝulo, kiu argumentis ĉiam  
Prete kaj lerte. “Estu nur trankvila!  
Neniu ja aĉetos varon tian  
Krom vi.” Kaj la junulo hejmeniris  
Kontente. Nun la malriĉulo miris  
Pri l' nereveno de la aĉetanto  
Kaj forte ĉagreniĝis. Do li petis  
Konsilon de la sama konsilanto  
Kaj la situacion al li metis.  
Sed tiu diris: “Kial ĉagreniĝu?  
Nenie li ricevos krom ĉe vi  
Tiun kadavron. Endome sidiĝu,  
Najbaroj jam vin gapas kun envi.”*

El “Ljuŝi Ĉunkiu”

# Memorigo pri Dek Majstraj Pentristoj de Antikva Ĉinio

**E**N la kuranta jaro, la 17-an de la unua monato lunkalendara okazis la 660-a datreveno de la naskiĝtago de nia granda pentristo de Juan-dinastio s-ro Ni Junlin.

Estas interese, ke tiu ĉi jaro havas hazarde intiman rilaton al la pentristoj.

Pluraj el niaj fame konataj plej eminentaj pentristoj de pasinteco havas sian rondnombran\* naskiĝan aŭ forpasan datrevenon en la kuranta jaro. Krom la 660-a naskiĝa datreveno de Ni Junlin de Juan-dinastio, tiu ĉi jaro enhavas ankaŭ la datojn por memorigo de naŭ aliaj grandaj pentristoj: s-ro Gu Kajĝi, pentristo de Ĝin-dinastio, havas sian 1620-an naskiĝan datrevenon; Generalo Li, la pliĝa, pentristo de Tang-dinastio, havas ne nur sian 1310-an naskiĝan datrevenon, sed ankaŭ la 1245-an datrevenon de la morto; s-ro Vang Ginking, pentristo de Song-dinastio, havas ĉijare sian 925-an naskiĝan datrevenon; kaj alia pentristo de Song-dinastio Mi Nangong atingas ĉijare sian 910-an naskiĝan feston kaj lia filo Mi Jouĵen, ankaŭ majstro de pentrarto, atingas la 875-an naskiĝan datrevenon; kaj pentristo Li Longmian havas la 855-an datrevenon de sia morto. Ĉiuj la supre menciitaj pentristoj vivis antaŭ Ni Junlin. Kaj el la eminentaj pentristoj post Ni Junlin, Vang Mengduan de Ming-dinastio havas ĉijare la 545-an datre-



**Hju Vej:** Versfarado Surdorse de Azeno




**Ĝu Da:** Baŝoo kaj Ŝtono

\* La nombroj divideblaj per 5 aŭ 10 estas rigardataj de ĉinoj kiel rondaj nombroj en kalkulado de aĝo.



Fiística Vilaço post Negeto (parto)


*Vang Ginking (1036-? p.K.)*



La 26-a Tutmonda Ĉampioneo-turniro de Tablotenis




*Înstila pentrajo de Li Hu*




Kvin Ĉevaloj (parto)

Li Gonglin (1049-1106 p.K.)



**Ni Junlin:** *Kvietaj Laŭbo kaj Arboj en Aŭtuno*

venon de sia morto; Hju Kingteng atingas sian 440-an naskiĝan datrevenon; kaj s-ro Ĝu Da, kromnomita Badaŝanjen, havas sian 335-an naskiĝan datrevenon. Mi pensas, ke sufiĉas la mencio de la dek majstroj por montri, ke la kuranta jaro estas celebrinda por la pentristoj kaj aliaj artaj kaj kulturaj laborantoj en Ĉinio pro la grava historia signifo de tiuj datrevenoj.



**Gu Kajĝi:** *Liuto-farado*

La grava historia signifo de la datrevenoj kuŝas en tio, ke tiuj pentristoj estas elstaraj reprezentantoj de ĉiuj epokoj en la pentrarta historio de Ĉinio, ke gravajn lokojn la publiko jam antaŭ longe prijuĝis al iliaj brilaj atingoj en arto. El la nun konservataj majstroj pentraĵoj de antikva Ĉinio, tiuj de s-ro Gu Kajĝi estas la plej antikvaj. Se liaj verkoj estus vicigitaj kun tiuj de la aliaj naŭ majstroj supre menciitaj, kun Badaŝanjen ĉe la fino, (tiuj dek personoj travivis unu post alia ses ĉefajn dinastiojn), formiĝus el tio historia miniaturo de la ĉina pentrarto, kiu povas pli malpli komplete prezenti la ĉefajn skolojn kaj stilojn de la klasika pentrarto de Ĉinio.

La ĉinaj antikvaj pentraĵoj havis homfigurojn kiel la ĉefan objektomaterialon, kaj tiuj de s-ro Gu Kajĝi okupas la plej eminentan lokon en pentrado de homfiguroj. S-ro Gu (341-402 p. K.) naskiĝis en Vuhi. Oni diras, ke li ofte lasis la homfigurojn en siaj verkoj senpupilaj por pluraj jaroj. Responde al la demando kial li tiel faras, li diris: "La viveco de pentrita homfiguro ĝuste

kuŝas en tio ĉi." Li enamiĝis al iu najbara knabino, kaj ankaŭ lia amhistorio prenis portretopentradon kiel sian kernon. Ja tre rafinaj estas liaj hombildoĵoj. La plej fruaj kopiaĵoj de liaj verkoj "Virinoj" kaj "Kanto pri Luoŝen" nun konservataj en la Historia Muzeo de Pekino kaj la Muzeo de Ŝenjang, estas valoregaj.

Koncerne pentradon pri pejzaĝoj, s-ro Li Sihjun, konata kiel Generalo Li, la pliĝa (651-716 p. K.) devas esti rigardata kiel la unua reprezentanto. Li devenis de la imperiestra domo de Tang-dinastio kaj servis en la kortego kiel Granda Generalo. Li estas la iniciatinto de la pentrostilo nomata de la posteuloj "pejzaĝo en oro kaj smeraldo". Nun ni ankoraŭ povas vidi bonegajn kopiaĵojn de liaj ĝis nun konservataj verkoj.

Kvar el la menciitaj 10 majstroj estas de la dinastio Song. S-ro Vang Ginking (1036-? p. K.) sekvis en pejzaĝpentrado la skolon de Generalo Li, la pliĝa; li ĝin disvolvis kaj formis sian propran skolon. "Fiŝista Vilaĝo post Neĝeto" estas lia majstraĵo. Mi Fej, alinomita Mi Nangong (1051-1107 p. K.) kaj lia

filo Mi Joŭjen (1086-1165 p. K.) estis nomataj la Granda kaj Malgranda Mi-oj. Iliaj pejzaĝobildoj kun ŝvebanta nebulo versimila dank' al majstra uzado de ĉina inko prezentas apartan stilon. La rulpentraĵo "Blankaj Nuboj super Hiaŭhiang\*", nun konservata en la Historia Muzeo de Pekino, povas esti rigardata kiel reprezentajo de iliaj majstraj verkoj. S-ro Li Gonglin (1049-1106 p. K.), kiu sin kromnomis Ermito de Dormanta Drako, estis majstro kaj de homfiguroj, pejzaĝoj kaj rajdĉevaloj, kaj li estis honorita siatempe kiel la plej eminenta pentristo. Ambaŭ liaj verkoj "Paŝtado", konservata en la Historia Muzeo de Pekino kaj "Societo de Lotusfloroj", nun konservata en la Muzeo de Ŝenjang, estas rafinaj majstraĵoj.

La pentristo Ni Junlin (1301-1374 p. K.) de Juan-dinastio estas pentristo pli bone konata en Ĉinio. Li estas majstro en pentrado de pejzaĝoj, kaj liaj ĉefaj

temoj estas kadukaj arboj, bambuoj, ŝtonoj kaj scenetoj kun samnivelaj vidaĵoj. Li iniciatis la t. n. skolon de intelektuloj. Multaj el liaj verkoj estas konservataj ĝis hodiaŭ.

Alia majstra pentristo vivinta dum la periodo de la fino de Juan-dinastio kaj la komenco de Ming-dinastio estas s-ro Vang Fu, alinomita Vang Mengduan (1362-1416 p. K.). Li daŭrigis la vojon de la skolo de intelektuloj. Li estis tre justama kaj havis strangajn emojn. Nur malmultaj el liaj verkoj estas konservataj, kaj la "Ok Vidindaĵoj de Janging (Pekino)", nun konservata en la Historia Muzeo de Pekino, kaj "Lago, Montoj kaj Legĉambro" konservata en la Muzeo de Ŝenjang, ambaŭ estas bonegaj.

S-ro Hju Vej, alinomita Hju Kingteng (1521-1593 p. K.) estas pentristo de Ming-dinastio. Li havis karieron eksterordinaran, kaj multaj anekdotoj tradicias pri li. Li scipovis ĉion pentri, kaj

konsiderinde multaj el liaj verkoj estas ankoraŭ konservataj por nia aprezo. Lia elstara majstraĵo estas floroj per la stilo de la t. n. verŝo de inko, t. e. pentrado per maldelikataj kaj bravaj penikstrekoj inksaturaj. Sin liberiginte de la tradiciaj tabuoj en pentrado, li plene aplikis sian kreivon kaj formis sian apartan vojon de arta kreado kaj donis tre profundan influon al la pentrado de la tempo sekvanta.

Fine mi menciuj la des pli bone konatan pentriston Badaŝanjen s-ro Ĝu Da (1626-1705 p. K.) de King-dinastio. Li devenis de la imperiestra domo de Ming-dinastio. Li havis stilon tute malsaman ol tiuj de la antaŭuloj, kaj malfermis tute novan vojon al la ĉinstila pentrado. Nun ni povas vidi multajn el liaj verkoj, kiuj estas ĉiuj tre gustoriĉaj.

\* *Kunfluo de du riveroj Hiaŭ kaj Hiang troviĝantaj en Hunan-provinco.*

(Daŭrigo de 105 p.)

Estas grava leĝo de la socialisma ekonomia disvolvo, ke la disvolvo de agrikulturo antaŭeniras samtempe kun tiu de industrio. La fakto, ke Prezidanto Maŭ klarigis tiun ĉi gravan leĝon de socialisma ekonomia disvolvo, ludas grandan gvidan rolon en la progreso de la socialisma konstruado en Ĉinio, kaj tiu ĉi rolo estos ĉiam pli konfirmita en praktikado.

## Helpas Agrikulturon Kuratingi

Nun la tuta nacio estas aganta por pli fortigi la fronton de agrikulturo kaj subteni ĝian altrapidan disvolvon. De la lasta duono de 1960, dekoj da miloj da oficistoj kaj laboristoj, studentoj kaj demobilizitaj militistoj iris al la kamparo por partopreni la produktajn brigadojn kaj grupojn de la popolkomunumoj. Multaj el ili alprenis la plej malfacilajn taskojn labori en la malrapide progresantaj produktaj brigadoj por helpi ilin ŝanĝi siajn postrestintajn kondiĉojn. Tiel, la politiko de la Partio por agrikulturo estas profunde eniranta la koron de la popolo. Agrikultura laborado estas rigardata kiel glora tasko, kaj la konstruado de nova socialisma kamparo kiel

nobla afero. Tio ĉi estas potenca nova socia tendenco, precipe inter la junuloj.

Sub la alvoko al la tuta popolo helpi agrikulturon en granda skalo, organizaĵoj en la kampoj de industrio, komunikado, financo kaj komerco, kulturo, edukado kaj medicino plifortigis siajn strebojn por la kamparo. La vastaj amasoj de industriaj laboristoj havas precipe gravan rolon en tiu ĉi amasa movado. Faciligante sian propran produkton per teknika renovigo kaj teknika revolucio, industraj entreprenoj asignis grandajn kvantojn da laborantoj, materialoj kaj ekipaĵoj al taskoj por helpi agrikulturon. Tiamaniere, la alianco de laboristaro kaj kamparanaro en Ĉinio, kiu establiĝis surbaze de agra reformo kaj surbaze de socialisma posedanteco de agrikulturaj kooperativoj kaj popolkomunumoj, eniras novan stadion bazitan sur la teknika transformo de agrikulturo.

La politiko de la Komunista Partio trakti agrikulturon kiel bazon estas longtempa strategio por socialisma konstruado. Efektivigata sub la gvidado de la Komunista Partio kaj per la unuigita penado de la tuta popolo, ĝi certe elmontros ĉiam pli klare sian grandan kaj ĝismalproksiman signifon en nia socialisma konstruado.



**Maŭ Zedong: *Pri Praktiko***

24p. 13 × 18.5cm.

**Maŭ Zedong: *Pri Popol-demokratia Diktaturo***

24p. 13 × 18.5cm.

**Maŭ Zedong: *Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong***

16p. 13 × 18.5cm.

***Ĉina Antologio***

412p. 15.3 × 23cm.

12rb., 2us\$, 10ŝil., 7gld., 500yen, 28steloj

***Postmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko***

83p. + 16p. rezervataj por aldoni novajn,  
19 × 26.5cm.

6rb., 1.20us\$, 8½ŝil., 4.25gld., 400yen, 17steloj

***Floroj kaj Birdoj***

8 plurkoloraj presitaj poŝtkartoj en broŝuro  
80kop., 0.20us\$, 1ŝil., 0.50gld., 50yen, 2steloj

***Jarkolekto de EPĈ (1960)***

Mendu tuj ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia administracio: poŝtkesto 313, Pekino, Ĉinio



86-a serio kun 4 intajle plurkoloraj pecoj emisiita (5-4-1961) de Ĉinio por memorigi la 26-an Tutmondan Ĉampionec-turniron de Tabloteniso okazigita en Ĉinio. Emblemo de 26-TĈTT kun fono de jasmeno 1-281 8c.

La Ĉiela Altaro simbolanta la urbon Pekino kie la ĵurniro prenis lokon. 2-282 10c.

Vira unuopa konkurso 3-283 20c.

La Pekina Laborista Sporthalo — loko de la ĉampionec-turniro 4-284 22c.



85-a serio kun 2 intajle dukoloraj pecoj emisiita (28-3-1961) de Ĉinio por memorigi la 90-an datrevenon de la Pariza Komunumo.

Hisado de ruĝstandardo super la Panteono 1-279 8c.

Deklaro pri la fondiĝo de la Komunumo 2-280 8c.


# *Nova Kanto pri Lhasa*

*Verkita laŭ la tradicia literatura formo de Tibeto "Ciglhuggelma" de Ĉang-ĉan Sodnamgjalpo, tibeta poeto 65-jara, nun estro de la Sekcio de Kulturo kaj Eduko de la Prepara Komitato de Aŭtonoma Regiono de Tibeto.*

**P**PROMENANTE mi trapasis la larĝan Okangulan Straton. La tegmentoj de Potala-palaco baniĝas en ora sunbrilo. Zefiro karesas la Tang-salikon (saliko plantita de princino Venĉeng de Tang-dinastio) antaŭ Culakang-templo. Fajre ruĝaj standardoj kvinstelaj flirtas sur fono de blua firmamento. Kortuŝe sonas la kantoj "Oriente Ruĝas Sun'" kaj "Bona Estas Socialism'". Ho, Lhasa, vi antikva urbo de Tibeto, vi estas priskribita jam en la historia verko *La Libro de Tang-dinastio*, sed neniam estis tiel juna kaj impone bela kiel hodiaŭ.

En via sino mi fordonis la karan junaĝon, sed ricevis nur arĝentan prujnon ĉe la tempioj. Viajn elegiojn mi aŭdis en la pasinteco propraorele, kaj vian versadon de sango kaj larmoj mi vidis proprakule. Tiam vian firmamenton malpurigis alarmaj fumkolonoj pro imperiismaj invadoj. Tiam vian teron superregis la demono de l' servuta sistemo. Tiam ofte kuŝaciis kadavroj de almozuloj sub tegmentrandoj

*Sian unuan riĉan rikolton ĝoje celebras kamparanoj en la ĉirkaŭurbo de Lhasa.*



ĉe stratanguloj kaj tage kaj nokte aŭdiĝis grincado de ĉenoj kaj katenoj en la ĉirkaŭaĵo de Nangceŝjak (t.e. la malnova urbodomo de Lhasa). Tiam laborantaj popolanoj estis fikulpigitaj je diversaj kontraŭleĝaĵoj kaj kruele torturitaj, se nur ili iom tuŝis la intereson de la mastrosinjoroj. La laborantaj popolanoj vivaĉis kvazaŭ starante surkape en venena dornejo.

Sed hodiaŭ:

*L' estinta malluma krimplena infero  
Fariĝis Edeno de beno kaj belo.  
De kies potenco ja estas la faro magia  
Se ne de l' potenco la Ĉina-Kompartia?  
Sur klara spegulo de l' kor' kaj okuloj  
Sin montras la nova-Lhasa-a figuro:  
Langsen-oj\* rapidas sur siaj bonegaj ĉevaloj;  
Jam plen-likvidiĝis la Dek Ses Reguloj.\*\**

Mi marŝis tra stratoj kaj stratetoj, kaj foje kaj refoje kortuŝiĝis de l' vidaĵoj. Kiu estas tiu? Eksklavino de servutmastro. Sed nun, vicdistriktestro elektita de la popolo, energiĝinta kun ruĝa brilo sur la vizaĝo — unu el la miloj kaj miloj da tiaj liberigitoj. En la sunlumo de Prezidanto Maŭ, laboranta popolo de Lhasa, kiu estis subpremata kaj sklavigita de generacio al generacio, nun jam fariĝis vera mastro en politiko. Jen, denove ekridas la maljunulo, li ridas tiel serene. Pli ol duonon de sia vivo li trabaraktis sub alies tegmentrandoj, sed nun jam enloĝigita de la Popola Registaro en novan domon, kie ŝvebas bonodoroj de butero kaj zamba-oĝ. Jam malaperis por ĉiam la sennombraj loĝkavoj de mizeruloj tie kaj ĉi tie dissemataj ĉe la rancaj rubejoj kaj fiodoraj akvokavoj. Pli ol du mil vaguloj, kiuj almozpetadis de pordo al pordo, komencis sian novan

\* La plej malsupera el la tri klasoj de servutuloj en malnova Tibeto, kiu servis en la hejmo de sia mastrosinjoro de generacio al generacio.

\*\* Feŭd-sklava leĝo de malnova Tibeto.

† Tibeta manĝaĵo el horde-faruno.

vivon. Jen alvenas amaso da gajuloj fortaj kaj sanaj kantante kaj dancante kaj disradiante brilon de feliĉo. Hodiaŭ, la unuan fojon en sia vivo, ili prenis bambu-plumojn kaj librojn per la manoj, kiujn ili uzadis por surmeti vestojn kaj demeti ŝtrumpojn por la mastrosinjoroj, kaj ili komencis kune kun siaj gefiloj la historion de memklerigado de la tibetaj servutuloj.

Nun plene likvidiĝis la servuta sistemo, kiu super-regis la tibetan popolon por dekelkaj jarcentoj.

*La sun' de l' nova vivo marŝas en Ĝambudripa\*.*

*Ho, tiel vasta kaj brilega estas vojo ĝia!*

*Atako al ĝi sur ĉevalo de sonĝ-iluzio*

*Estas kvazaŭ al Sumeru\*\* frap' per la kranio.*

Longaj vicoj da ŝarĝaŭtoj plenplenaj de vivbezonaĵoj kaj konstruaj materialoj preterkuris fulm-rapide. Lhasa, la koro de Tibeto, jam ne plu estas loko malproksima de Pekino, la ĉefurbo de la granda patrolando. La ĉielarko-similaj ŝoseoj Siĉuan-Tibeta kaj Kinghaj-Tibeta estas kvazaŭ du ekonomiaj aortoj

\* *Laŭ sutro unu el la kvar kontinentoj de la mondo, al kiu apartenas nuna Azio.*

\*\* *La centra monto de la mondo laŭ la budhistoj, t. e. Himalajo.*

*Smdrublhamo, servutulino en la pasinteco, sed nun labormodelo kaj vicedirino de interhelpa grupo.*



*Al Prezidanto Maŭ prezentas katak-ojn la liberigitaj servutuloj en la antaŭurbo de Lhasa dum rikolto.*

tage-nokte pulsantaj kaj la malfermo de la Pekino-Lhasa-a Aviadlinio reduktis la dekmil-lian† distancon al veturo kelkhora.

Sub la vartado de la granda Komunista Partio de Ĉinio, Lhasa prosperadas kaj ĉiam parfumas la aeron per sia aromo kvazaŭ velkinta arbo reviviginta kaj ĝoje disfloranta dank' al printempa pluvo. Ho, Partio, kara Partio! Vian bonfaron ĉiam memoros la tibeta popolo generacion post generacio!

*Kvankam Vi ne estas nia vivdoninta panjo,  
Sed Vi havas pli ameman ol la panjan koron.*

*La eterna lumo de l' ĉionpriluma luno —  
La Kompartio, ĉiam per bonoj servas la  
popolon.*

*Vian amon al la tibeta popolo povas porti  
Nur la flu' de Campo l' ondeganta;  
La ĝojo kaj feliĉo, kiujn vi donis al la  
altebeno*

*Pli altas ol Ĝomo Langma la giganta.*

Ho, Lhasa! Ĉasideleg‡! Akceptu miajn korajn bondezirojn! Mi deziras, ke vi ĉiam disfloru kiel la lotusfloro en la neĝo kaj glacio de Himalajo!

† 1 lio = ½ kilometro.

‡ "Feliĉon!" en la tibeta lingvo.


# Jarfina Vespere Neforgesebla

**D**UM mia vivo, jam multajn vesperojn jarfinajn mi travivis, sed la plej neforgesebla estas tiu kiun mi pasigis en la hejmo de Lepkovskaja en Leningrado en 1958.

Mi konatiĝis kun Lepkovskaja tute hazarde duonmonaton antaŭ la jarfina vespero de tiu jaro. Tiam mi estis ĝuanta mian vintran libertempon en iu "Domo de Ripozo" apud Leningrado. Iun tagon promenante kun kelkaj sovetiaj amikoj ĉe la stacio mi vidis iun virinon malfacile sin trenantan al la stacio. Laŭ diro de la amikoj, ŝi estis reiranta al Leningrado por kuraci kormalsanon kiu ree ŝin atakis. Ekvidinte min, ŝi rapidis al mi, kvazaŭ ŝi vidu sian intimulon kaj alparolis min ĉine: "Bonfarton!" Tuj mi respondis ŝin ankaŭ ĉine. Mi vidis ke ŝiaj okuloj subite ekbrilas. Ŝi preme tenis min je la mano kaj diris: "Mi laboris du jarojn en la Ŝanhaja Dramaturgia Instituto. Nur antaŭ kelke da monatoj mi revenis en mian landon, tamen jam treege sopiras al miaj amikoj en Ĉinio." Preskaŭ ĉion ĉi tion ŝi parolis en prononce korekta ĉinlingvo. Nur tiam, mi eksciis ke ŝi estas neniu alia ol Lepkovskaja, la specialistino en dramarto, pri kiu ni ofte menciis. Kun ĝojo mi demandis ŝin, kiu instruis al ŝi la ĉinan lingvon. Ŝi diris ĉine: "Mi memlernis, ĉar mi amas Ĉinion." Kaj ŝi flue kantis unu ĉinan kanton. La vagonaro enstaciĝis. Mi helpis ŝin eniri la kupeon kaj sciigis al ŝi ke mi libertempas en la "Domo de Ripozo". Ŝi diris, ke ŝi baldaŭ revenos, ke mi atendu ŝin tie.

Post kelkaj tagoj, ŝi venis, sed post nelonge ŝi reiris pro ia afero. Ĉe la adiaŭo ŝi petis min rigardi en la kalendaro, kiu tago estos la jarfina vespero laŭ la luna kalendaro. Ŝi aldonis: "Mi neniel povas reciproki eĉ milonon de la varma akcepto, kiun faris al mi la ĉinaj amikoj. Mi intencas nur gastigi ĉe mi kelke da ĉinaj amikoj en la jarfina vespero, por ke ili ĝoje ĝin pasigu kvazaŭ en sia propra hejmo, kaj se mi sukcesos, mi jam estos kontenta." Ŝi ankaŭ invitis min al si du tagojn pli frue antaŭ la vespero jarfina. Kaj tion mi akceptis. Kiam mi vizitis ŝin, ŝi ankoraŭ ne revenis de sia laboro. Ĉio en la ĉambro spiris modestecon.

La duan tagon, ŝi donis al mi ĉion de ŝi portitan el Ĉinio kaj uzeblan por ornami la ĉambron, dirante,



*Profilo de la Sovetia Ekspoziciejo en Pekino*

*Skulptaĵo de Liu Njan*

ke ĉio estu aranĝita kiel oni pasigas la jarfinan vesperon en Ĉinio. Mi komencis la aranĝadon laŭ ŝia postulo. Ŝi mem okupiĝis pri farado de kukoj kaj malvarmaj pladoj.

Alvenis la jarfina vespero. Ĉirkaŭ la 6-a vespere, kelkaj ĉinaj studentoj de la Leningrada Belarta Instituto venis. Ili ekridis vidinte la versparon algluitan sur la pordo, kvazaŭ ili vidus sian konatulon. Kiam ili enpaŝis la salonon, ili ĉiuj kriis pro ĝojo: "Ho! ni estas jam en Pekino!" "Jen vera festo de la jarfina vespero!" Mi kaŝe sentis ĝojon por Lepkovskaja, ke ŝia deziro efektiviĝis. Kun miro la kolegoj ĉirkaŭrigardis ĉion en la ĉambro: Sur la muro kontraŭa al la pordo pendas ora ideografo "福" (feliĉo) pli granda ol unu kvadrata futo; sur la blankaj fenestrokurtenoj gluiĝis ruĝeruĝaj papertranĉaĵoj, el incensujo ambro disparfumis la aeron per densa bonodoro. La kolegoj profunde enspiris la bonodoron el la patrio. Malgrandaj ĉinaj palac-lanternoj disradiantaj varman ruĝan lumon, plintensigis la ĝojan etoson de novjara festo en la salono. La ĉinstilaj tetasoj kun kovriloj kaj okangula nigrelakita fruktoplado estas pli intimaj al la ĉinaj gastoj. La mastrino ankoraŭ ne revenis de sia laboro,

la kolegoj tamen jam sentis sin intime akceptataj de la mastrino en la atmosfero de la salono.

Lepkovskaja revenis. Ŝi laŭte parolis ĉine: "Bonfarton al vi!" Sed ĉiuj ridante respondis: "Feliĉan Novjaron!" Momenton ŝi restis en miro, sed ŝi tuj komprenis kaj korektis sin: "Feliĉan Novjaron!" Je tio ĉi ridis ĉiuj. Ŝi diris; "Mi esperas, ke vi ne pensos ke vi estas en Leningrado malproksime de la patrio, ke vi pasigis la novjaron en mia hejmo — la hejmo de sovetiano. Imagu ke vi estas en Pekino pasigantaj la novjaron kune kun viaj plej karaj proksimumoj, vi gajgaje ĝuu la horojn per distrajoj." Ŝi aldonis ĉine: "Estu senĝenaj kiel hejme." Ŝia diro ridigis ĉiujn. Dume alvenis ŝiaj filo kaj bofilino, kaj ĉiuj altabliĝis. Mi kaj k-do Vang Baŭkang iris en la kuirejon por prepari la ĉinajn pladojn. Subite aŭdiĝis ĝojkrio el la salono: "Maŭtaj-drinkaĵoj!" Por regali la ĉinajn amikojn ŝi elprenis la faman ĉinan drinkaĵon jam longtempe konservatan. "Hodiaŭ estas ĉina festotago," ŝi diris, "ni manĝu laŭ la ĉina kutimo: uzu la manĝbastonetojn, kaj unue oni surtabligu la pladojn kaj fine la supon." Malfacilo prezentigis al ŝiaj filo kaj bofilino: ili pinĉe prenis kun peno iom da manĝaĵo per la manĝbastonetoj, sed kaj la manĝbastonetoj kaj la manĝaĵo, ĉio falis duonvoje.

Vidante kun admiro ke Lepkovskaja povas lerte uzi la manĝbastonetojn, ili diris: "Ankaŭ ni ellernos!" "Ni kantu!" iu proponis. Iu ekzumis la kanton *Moskvo-Pekino*, kaj tuj sekvis ĉiuj: "Veraj fratoj estas la popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio. . .". Sonis kanto post kanto kio fariĝis granda ĥoro de Ĉinio-Sovetia amikeco. "Aplaŭdu al Lepkovskaja por kanto!" iu ekkriis. Ĉiuj varme manplaŭdis. Ŝi diris: "Laŭ la kutimo de ĉinoj: tuj kanti petite kaj ne esti sinĝena honteme, mi kantu." Ŝi kantis ĉine unu kanton lirikan, kun sento profunda. Kaj poste ekscitita ŝi deklamis ĉine ankaŭ sian poemon, kiun ŝi verkis en Ĉinio. Mi ne memoras ĝin precize, tamen la esencan enhavon mi ankoraŭ memoras klare:

*Ĉinio — mia dua patrio,  
kvazaŭ freŝa floro,  
vi ĉiam plene floras.  
Ĉinaj amikoj — miaj gefratoj,  
mia koro al vi inklinas,  
miaj manoj al vi etendiĝas.*

La kortuŝan scenon kaŝe fotis iu kolego kiu kunportis fotaparaton. Vidante la fotilon ŝi kriis: "Venu, venu foti nin ĉiujn kune!" Kaj kun ridoj kaj bruoj ĉiuj preme ĉirkaŭis ŝin — jen vera rondo familia, kiun neniu forto en la mondo povas disigi!

Ji Hejuan

(Daŭrigo de 154 p.)

## KAŜEBLAS JA NE LUP' KRUELA

*En unu mano olivbranto,  
en la alia ark' kaj sago;  
ŝminkado, pudro, aspektoŝanĝo;  
"Libero", "Paco" — nur buŝ-ago;  
"Afer" interna de Kublando,  
Usonon tuŝas ne l' demando!"*

*Ricevis ili de Usono  
provizon de manĝ' kaj de mono,  
el baz' usona bombard-flugis,  
Usono ilin trejn-edukis.  
Por ĉio ĉi tio ja "liberon"  
plenhavas ili — kaj nenio  
Usono-dona krom instrukcio!*

*Per vorto bela, dir' miela,  
kaŝeblas ja ne lup' kruela,  
kaŝeblas nek la sangaj manoj!  
Liberon amas la kubanoj,  
defendos ili la patrion  
kun glavoj, lancoj en la manoj.*

Trad. Laŭlum

\* **INVITO.** Estimataj Geinstruistoj kaj Inĝenieroj! En nia mezlernejo, kune kun lernantoj kaj ties gepatroj, ni solenis Mondan Tagon de Instruistoj. Inter agrablaj momentoj kaj edukaj paroloj ni salutis instruistojn de ĉiuj landoj. Estas nia espero, ke dum tiu ĉi lerneja jaro ni povu saluti Vin helpe de Via adreso kaj okaze interŝ. esp-ajn, sociajn kaj profesiajn spertojn. Ni petas skribu al ni! Minista Teknikumo en Krakovo, str. Rzezicza 4, Pollando.

\* **40 estonaj komencantoj** kun Azio kaj Sudameriko pri ĉt. interŝ. librojn, pk., pm; USSR, Estona SSR, Abja-Paluoja, str. Ata, 12. A. Mikk.

\* **Malofeev J. A.**, kuracisto 68-jara, dez. kor. pri ĉt., ul. Sturua I tup 3, Kutaisi, Gruz. SSR USSR.

\* **Edmund Jaan** (35j.) USSR, Estona SSR, ABJA, pk. 11.; kun Azio Afriko, Sudameriko pri div. temoj.

\* **Nova E-Klubo aranĝos letervesperon kaj ekspozicion.** Bv. sendi al ni propagandan materialon, salutojn. Interŝ. vi ricevos dankleterojn, ip, pm, utk, gm, prospektojn kaj aliajn interesajojn laŭ via deziro. Respondo garantiata. Anonco ĉiam valida. E-rondeto, Kroužek OB, Hermanuv Městec, Ĉeĥoslovakio.

\* **E-literaturon ĉiuspecan, ĉiutempan interŝ.** tutmonde, ankaŭ kontraŭ germana: Willi GIESE. Rupprechtstr. 19, BERLIN-Lichtenberg 4, DDR./Bv. oferti, ĉiam resp!

\* **Legu nepre!** 40 jaran jubileon festos baldaŭ **Esperanto-societo "Sukceso" en Vratza (Bulgario).** Skribu amase propagandcele je temo: "Kion mi scias pri Bulgario kaj per kiu fonto?" La skribintoj ricevos respondon. La adr. sufiĉas.

\* **Tramista E-rondeto en Taŝkent** sciigas pri sia nova adreso: USSR, Taskent, ĉefpoŝto, abon. kesto 54, Esperanto.



*Vu Hjue:*

REVOLUCIA  
FAMILIO

FILMO  
NEORDINARA

**R**EVOLUCIA FAMILIO estas vere neordinara filmo, de kies scenaro mi profunde sentas la artan forton de revolucia realismo kombinata kun revolucia romantiko. Laŭ la vidpunkto de film-direkta maniero, estas grave posedi kaj apliki la "montaĝon" al kino kiel arto ĉefe de la vidsentumo. En prezentado, elmontriĝas reliefo, ke la aktoroj ludas sian rolon tre nature kaj subtile, precipee elstara estas la interna harmonio en ilia tuta kreado, kiu plifortigas la verecon de tiu ĉi filmo.


"Revolucia Familio" rakontas pri la ŝanĝigo kiel en la revolucia batalo la malgranda familio de Giang Mejking, juna kampara intelektulo, post la Maj-4-a Movado, aspiranta la veron, iompostioe kunfandiĝis en la grandan familion de ĉina revolucio. Emfazante la figuradon de la rolo Ĝoŭ Lian, edzino de Giang, unu ordinara kampara virino, nesciopovanta legi eĉ sian nomon, kiel fine sin hardis kaj aliigis en sencedan proletaran batalantino. En tiu ĉi filmo la aŭtoro per lakona lingvo kaj rafina

stilo koncentre priskribas la ĝojon kaj malĝojon en kvarfcjaj disiĝoj kaj reunuiĝoj de la familio. Liaj roluloj estas prezentitaj tra la tuta intrigo en akraj konfliktoj. La karakteroj ne nur de Ĝoŭ Lian, sed de ĉiuj ŝia edzo Mejking, ŝia rigida filo Likjun, ŝia dorlotiĝinta filino Hiaŭlian kaj eĉ Hiaŭking ĵus ion konetanta ĉirkaŭ si, estas klaraj kaj reliefaĵoj, kiuj donas al ni neforgeseblan impreson.

Ĉe la unuafoja disiĝo, Ĝoŭ Lian ne povis kompreni pri kio en la varma familio ne kontentis ŝia edzo, kaj por kio li iris en la homamason. Ŝi nur rigardis per demandaj okuloj la ŝipon foren naĝanta sur Hiang-rivero. Kiam la norden ekspedicia armeo (de la unua granda kontraŭ-imperiisma, kontraŭ-feŭdisma revolucia milito en 1926-27) okupis la urbon Ĉangŝa, Mejking ankaŭ revenis hejmen. En la ĝoja familia rondo la aŭtoro priskribas per humorplena vivodetalajo la rilaton kaj ŝanĝon de la familio. Ekzemple, tuj post kiam Mejking revenis, li ŝercis kun Hiaŭking, kiu diris ke la patro estas falsa, ĉar li ne similas al la patro sur la fotografajo. Li fortondis la harnodon de sia edzino Ĝoŭ Lian dum lia filo kaj filino helpe ŝin sidigis perforte. Ŝi ameme koleretis: "Kiam vi revenas, en la hejmo ne plu estas kvieto!" Tiu ĉi diraĵo estas ordinara. Kvankam ĝi flanke priskribis la karakteron de Mejking, tamen ĝi estas streko tiom kolororiĉa.

La duafoja disiĝo okazis kiam Ĉiang Kajŝek perfidis la revolucion, kaj dume en Ĉangŝa regis reakcia teroro. La Partio decidis ke Mejking transiĝu al Hankoŭ. Ĝoŭ Lian tiam ne plu estis tiel surprizata kiel ĉe la unuafoja disiĝo kun ŝia edzo.

Kvankam ŝi estis ĉagrenita kaj maltrankvila pro la foriro de sia edzo, kun granda peno ŝi sin tenis kaj ne volis ke Mejking sentu sin maltrankvila. Okuladiaŭinte al Mejking forveturanta kontraŭ militfajro, kaj vidinte, ke multaj patriotoj heroe paŝas al morto pro la idealo de komunismo surstrate de Ĉangŝa, ŝi komencis kompreni vere la signifon de la laboro de sia edzo Mejking. Dufoje ĉe disiĝo Ĝoŭ Lian ne diris eĉ unu vorton. Dum la duafoja disiĝo, Mejking, montrante la fortonditan harnodon de Ĝoŭ Lian diris: "Alligu ĝin al via kapo! Mi iras for!"



Kiel koncize kaj trafe la frazo vive desegnas la ŝanĝojn en la homoj. Poste ili denove kunnestis en Hanĵang. Ĝoŭ Lian prenis sur sin la taskon gardostari kaj konservi dokumentojn, Likjun fariĝis eta kuriero, Hiaŭlian kaj Hiaŭking ankaŭ sciis helpi la patrinon forbalai la piedosignojn sur la neĝokovrita vojo. Ĝoŭ Lian jam tiam el nekonscia iom post iom fariĝis konscia revolucia batalantino kaj tiu ĉi familio ankaŭ rompiante sian individuecan rondeton kunfandiĝis en la grandan revolucian familion.

La triafoja disiĝo okazis pro la sinofero de Mejking. Tiu ĉi malgranda familio nun perdis sian ĉefan kolonon. Tio markis gravan turnopunkton sur la karaktero de Ĝoŭ Lian. Kiam ŝi aŭdis ke la respondeca kamarado de la Partio diris: "Via malfeliĉo estas ankaŭ la nia, kaj viaj gefiloj estas ankaŭ de la Partio", ŝi eksentis la varmon fariĝi membro de la granda revolucia familio. De la Partio ŝi gajnis forton daŭrigi sian vivon. Alveninte al Ŝanhajo, ŝi denove havis laboron kaj ŝiaj gefiloj kreskis sub la zorgo kaj eduko de la Partio. Kiam Likjun revenis el Sovetunio, la familianoj denove kuniĝis. La aŭtoro vivoplene bildigis al ni tion per la sekvanta priskribo, kiu rilatiĝas retroe kun tiu de la unuafoja renkontiĝo. Kiam Hiaŭking signifoplene staris sur la seĝo, kaj rigardis tra la pordo-truo la alvenanton ekstere, Eta Vang enkondukis iun en eŭropa kostumo kun nigraj okulvitroj kiu estas Likjun. Jen alia neatendita revidiĝo! Likjun ĉirkaŭbrakis kaj kisis fojerefoje Hiaŭking. Hiaŭking kriis: "Panjo, li jam havas lipharojn!" Hiaŭlian ambaŭmane frapadis Likjun. La gefratoj kune sin pretenis interkroĉiĝante. La patrino diris: "Kiam vi revenis, la hejmo bolas." Jen formiĝis la figuro de Likjun kun karaktero de lia patro. Kiom da rememoro enhavas tiu ĉi parolo! Ni vidas tie ĉi la kreskon de la tuta familio. La patra karaktero reaperas en la filo, kiu ankaŭ heredis de la patro la revolucian spiriton.

La kvarafoja disiĝo kaj revido estis la aresto de Likjun dum lia vojaĝo al la kunveno en Soveta Regiono. Pro la revolucio, la popolo kaj la Partio, Ĝoŭ Lian antaŭ la tribunalo de la malamikoj retenante sian fortan patrinamon, neis sian propran filon. Tio fine kompletigis la noblan figuron de Ĝoŭ Lian, la

#### DEMALDEKSTRE:

1. Post geedziĝo.
2. Mejking propagandas al Ĉangŝaaj amasoj revolucian veron.
3. La dua disiĝo.
4. Ŝerco de Likjun kun spiono ridigis la patrinon kaj la pli junajn gefratojn.
5. Likjun ĵus reveninta de Sovetio preparolas Sovetion.
6. Likjun adiaŭas sian patrinon antaŭ sia martiriĝo.

proletara batalantino. La eksplodo de la Kontraŭ-japana Rezistmilito ebligis al Ĝoŭ Lian eliri el malliberejo. La partia respondeculo kunportis Hiaŭlian kaj Hiaŭking por renkonti ŝin; ili vidiĝis en la bolanta tajdo de la rezista milito. Ĝoŭ Lian demandis: "Kiel fartas la kamaradoj?" Liuĉjo diris: "Ĉiuj fartas bone, la geknaboj jam plenkreskis kaj havas laboron. La nuna situacio estas tre favora, la Partio decidis sendi vin al Jen'an." Baldaŭ ŝi povas sin ĵeti en la grandan revolucian familion, kaj sur ŝia sulketita vizaĝo aperis tuj feliĉa rideto.

Sin dediĉinte al la revolucio, tiu ĉi familio dekomence-ĝisfine, sin trovis meze de la blanka teruro, kaj persistis en penega laborado sub tre malfacila cirkonstanco. La aŭtoro ne forgesis eĉ momenton priskribi la epokon kaj medion, sed en la tuta filmo regas la atmosfero de optimismo. Ĉar la aŭtoro bone prezentas ĉiujn pozitivajn faktorojn en la vivo de la reala batalo kiel ĉefan fluon, precipe tiujn de la varma revolucia tajdo ĉe la amaso kaj la venko de ruĝa armeo. La filmo lerte enkorpiĝas kion Kamarado Maŭ Zedong diris pri la tiama situacio de baldaŭ venonta alta tajdo de revolucio: "En la tuta Ĉinio sin trovas ĉie sekaj brullignoj, kiuj baldaŭ fariĝos kunflagrado." "Ĝi estas ŝipo kies mastopinto jam estas videbla malproksime stare sur marbordo; ĝi estas la leviĝanta suno en la oriento, kies disradiana lumo jam estas vidata stare sur montpinto; ĝi estas maturiĝinta fetoto kiu moviĝas en la ventro de patrino." La filmo konfirmas tiun ĉi diradon ne nur en sia fono-priskribo, sed faras ĝin ruĝa linio traieranta la tutan dramon. Ĝi stimulas la geheroojn de la filmo kaj samtempe ankaŭ la rigardantojn.

# *La Neganteblaj Manoj*

**E**N la Muelŝtonmonta Brigado de la Blanknubmonta Popola Komunumo sin trovis trejna sekcio, estis starigita kiam la brigado estis ankoraŭ altgrada agrikultura kooperativo. Ĝia tasko estis instrui tekniĝon al la novicoj en terkulturado. Kiam la altgrada kooperativo estis organizita en 1956, multaj virinoj kaj lernejoj kiuj antaŭe neniam faris ian agrikulturan laboron estis mobilizitaj al agrikultura produktado. Ilia laboro estis multe sub la normo, tial la direktoro de la kooperativo Ĉen Manhong proponis, ke trejna sekcio estu organizita, du tre lertaj maljunaj kamparanoj estu elektitaj kiel instruistoj kaj terpecoj, kiuj donis malaltan produkton kaj ne multe gravus eĉ se ili estus malbone flegataj, estu uzataj kiel trejnejo. Post kiam la administra komitato aprobis tiun ĉi proponon, kelkdek muoj da malbona grundo sur la supro de la Muelŝtona Monto kaj kelkaj parceloj de legomkampoj en la suda valo estis tiucele asignitaj. Oni elektis ankaŭ du instruistojn. Unu estis Ĉen Bingĝeng, la patro de la direktoro Ĉen Manhong. La alia estis Vang Hinĉun, maljunulo kiu kulturis legomkampon. Maljuna Ĉen estis nomita la sekciestro dum Maljuna Vang lia helpanto. La trejnatoj de la sekcio daŭre venis kaj foriris. Ordinare ili laboris en diversaj produktaj grupoj. Nur kiam Maljuna Ĉen aŭ Maljuna Vang estis instruantoj ian laboron, kiam ili ne povis fari aŭ ne povis bone fari, ili venis lerni en la sekcio. Kvankam tiuj kiuj ricevis trejnadon estis plejparte novicoj en agrikultura produktado, tamen troviĝis ankaŭ esceptoj. Unue, tiuj kiuj regule teron kulturis sed ne estis lertaj en tiu aŭ alia laborspeco, memvole sin anoncis por trejnado kiam tia laboro estis instruata. Due, tiuj, kiuj ne povis aŭ povis sed ne volis bone labori, estis senditaj tien por lerni laŭ la decido de ilia respektiva produkta grupo ke ili devas esti trejnitaj. Dum la periodo de lernado, ili ricevis nur 60% de la ĉiutagaj laborpontoj. Por tiuj kiuj intence ne bone laboris, la trejnado povis esti konsiderata kiel formo de milda puno.

Sekciestro Ĉen estis jam sepdeksejara maljunulo. Ĝenerale tia grandaĝulo devis de longe ĉesi partopreni en peza kamplaboro. Sed tiu ĉi maljunulo estis speciale fortika. Kiam li estis juna, li povis labori unu kaj duoble tiel multe kiel iu ajn el liaj kunuloj. Malgraŭ ke li estis maljuna nun, ordinaraĵoj junuloj ankoraŭ ne povis egali al li. Post la popolkomunumiĝo en la vintro de 1958 kiam la Muelŝtonmonta Agri-

kultura Kooperativo fariĝis unu el la brigadoj de la komunumo, la brigado denove elektis Manhong sia gvidanto. Ĝi starigis Hejmon de Respekto por Maljunuloj kaj post diskutado deklaris Maljunan Ĉen taŭga por ekŝi kaj tien eniri. Li restis tie nur tri tagojn kaj tuj sentis ke tiaj malpezaj laboroj kiaj deŝeligado de kanabo aŭ elektado de kotonfruktoj ne donas al li sufiĉan elirejon por lia energio. Sekve laŭ sia propra peto li forlasis la Hejmon de Respekto por Maljunuloj kaj revenis al sia laboro kiel estro de la trejna sekcio.

Maljuna Ĉen estis ne nur la plej sperta terkulturisto en Muelŝtona Monto, sed ankaŭ elektita eksterordinara labormodelo de la tuta Blanknubmonta Regiono. Neniu ŝtona terasdiĝo kiun li konstruis iam breĉiĝis; en la fumaj-keloj de li aranĝitaj neniam estingiĝis la fajro dum la fumajado de sterko. Rilate al la ordinaraĵoj laboroj kiel plugado, semado, sarkado kaj rikoltado, des pli sendube neniu povis super lin.

En la instruado al la membroj de la trejna sekcio, li postulis de ili ne nur norman laboron sed ankaŭ ĝustan korpteniĝon. Li diris ke sen ĝusta teniĝo oni ne povas fari norman laboron. Prenu la duan sarkadon kiel ekzemplon. La korpteniĝo kiun li postulis estis: kurbigi la talion ĝis difinita angulo; klini la korpon kaj paŝi oblikven, zorgante kien vi metas viajn piedojn; firme teni la tenilon de la sarkilo per ambaŭ manoj, por ke ĉiu bato de la sarkilo estu ekzakta kaj ne lasu ĝin tremi. Lia normo estis: sarki ĝis la radiko de la plantajo sen restigo de nesarkita grundo; kiam vi amasigas teron ĉirkaŭ la radiko, tion faru bonorde laŭeble per tri batoj kun ebena sed ne pinta supro. Kiam ajn li komencis ion instrui, li ĉiam donis modelan manovron unue, lasante siajn gelernantojn rigardi lin apude. Li klarigadis dum tio, kaj ofte ripetis la samon je dekelkaj fojoj antaŭ ol permesi la gelernantojn provi sub lia kontrolado. Liaj reguloj estis tiel multnombraj ke la gelernantoj ĉiam forgesis tiun aŭ alian el ili. Iam ili tenis la dorson tro rekta, iam faris paŝojn senzorge, kaj iam faris batojn de siaj sarkiloj ne laŭplane kaj tion, kion ili devis plenumi per unu sola sarkilbato, ili tamen ne povis plenumi eĉ per kelkaj batoj. Maljuna Ĉen senĉese donadis instruojn, atentigante tiun ĉi, rimarkigante tiun, kaj de tempo al tempo interrompante ilin por doni modelan manovron denove.

Iu kamparano nomata Haŭ Hehe kutimis sarki kun rekta dorso dum sia tuta vivo. Ĉiufoje kiam li



svingis la sarkilon malsupren, la klingo resaltis tri fojojn; ĝi sarkis herbaĉojn se ĝi saltis sur herbaĉojn, kaj ĝi difektis plantidojn se ĝi saltis sur plantidojn. Post la starigo de la trejna sekcio, lia grupo decidis sendi lin tien por trejnado. Ĉe lia alveno, Maljuna Ĉen instruis al li la korpteniĝon de sarkado kiel kutime. Sed tiu ĉi ulo kromnomata "Hahaha" estis iom maldiligenta. Sarkinte kelkajn batojn kun klinita dorso, li denove sin rektigis. Tamen Maljuna Ĉen estis ankaŭ iom kreema. La sekvintan tagon li prenis el sia hejmo neuzatan sarkil-klingon, alfiksitis al ĝi tenilon nur trifutojn longan, kaj ĝin donis al Haŭ Hehe, dirante: "Via kutimo de sarkado kun rekta dorso povos esti ĝisfunde korektita nur per tiu ĉi sarkilo kun mallonga tenilo." Efektive Haŭ ĝin korektis post la ŝanĝo de sarkilo — ĉar kun tenilo nur trifutojn longa, la klingo neniel povas tuŝi la teron se oni ne fleksas la korpon. Kiam la produktaj grupoj sciĝis pri tio, ili ĉiuj preparis po kelkajn mallongtenilajn sarkilojn speciale por la uzado de tiuj kiuj ne kutimis fleksi siajn korpojn.

Kiam laciĝis la lernantoj pro la korpteniĝa ekzercado, la maljuna sekciestro Ĉen ekripozis kun ili. Ok-naŭ terasojn malsupre, ĉe la bordo de fluejo, la vicsekciestro Maljuna Vang estis instruanta kulturadon de legom-kampo al alia aro da lernantoj. Dum siaj ripozoj la supra kaj malsupra aroj kutimis voki unu la alian, ke la du maljunuloj povis kune fumi kaj babili, kaj la lernantoj ankaŭ povis kolektiĝi por legi malgrandan ĵurnalon aŭ babili kaj ridadi. Ĉiufoje kiam li vidis Maljunan Vang, Maljuna Ĉen ĉiam etendis sian manon por manpremi, sed Maljuna Vang ĉiam rapideme fortiris la sian. Maljuna Vang estis dekkelkajn jarojn pli juna ol Maljuna Ĉen kaj estis lia bona amiko, sed Vang timis manpremi kun li, ĉar kiam ajn lia mano estis premita de Ĉen, ĝi dolorigis kvazaŭ pinĉata de tenajlo.

Iufoje dum ripozo, Ĉen invitis Vang veni supren por fumado. Ĉen kutimis faradi fajron per fajrilo. Vang diris: "Kiel oportune por fumado estos se ni unue bruligos amaseton da brulligno." Iu mezlernejo, kiu ĵus aliĝis al la trejna sekcio, aŭdinte tion tuj rapidis fari kolektadon en la ĉirkaŭaĵo sed sukcesis trovi nenion krom du sekaj branĉoj de persimonarbo. Maljuna Vang ridante diris: "Vi ne bezonas serĉi! Avo Ĉen havas brullignon." La junulo rigardis, sed vidis nenion. "Jes, mi havas," diris ankaŭ Maljuna Ĉen. Neurĝeme demetinte sian fajrilon, li skrapis per siaj ambaŭ manoj en la tero ĉe siaj ambaŭ flankoj eĉ ne rigardante, kaj kolektis du grandajn plenmanojn da arbŝeloj, plantradikoj, k. s. Kiam Maljuna Vang frotis alumeton kaj ekbruligis ilin, Maljuna Ĉen skrapis jam aliajn du plenmanojn kaj metis ilin sur la fajron. "Jen rimedo ne malbona!" diris la lernanto kaj ankaŭ li komencis skrapi. "Gardu vin!" kriis Maljuna Ĉen. "Tion vi ja ne povas fari!" Sed jam iom tro malfruis la malkonsilo. La meza fingro de la lernanto estis de io pikita kaj li

## *Arakis' Bongusta en la Kampa Grundo*

Popolkanto de Mjaŭ-nacio en  
Gujĝoŭ-provinco

*Dolĉa frukto kreskas sur ĉeriza arbo,  
Arakis' bongusta en la kampa grundo.  
Nun la viv' de l' mjaŭ-oj ĉerizfrukte  
dolĉas,  
Al la Parti' nia amo en la kor-profundo.*

## *Sed por Ni Mem Ni Plugas Nur Hodiaŭ*

Tibeta Popolkanto

*Jam mil mil jarojn brilis sunradioj,  
sed nian domon tuŝas nur hodiaŭ;  
jam mil mil jarojn plugo — nia metio,  
sed por ni mem ni plugas nur hodiaŭ.*

Trad. Laŭlum



tuj retiris la manon. "Kiajn manojn vi havas, infano," diris Maljuna Vang, "kaj kiajn li havas? Liaj manoj estas kvazaŭ feraj rastiloj, kiujn nenia dorno aŭ kardo povas vundi."

Frotante sian vunditan fingron, la lernanto esplorrigardis la manojn de Maljuna Ĉen kaj vidis ke ili estas vere malsimilaj al tiuj de aliaj personoj: kvadrataj manplatoj, fingroj mallongaj kaj dikaj, el kiuj neniu povas rektiĝi, kovrataj de kaloj fronte kaj dorse, rondaj fingrofinoj similaj al duonoj de dikaj kokonoj kapitaj per ungoj, donante entute la impreson de malgrandaj rastiloj faritaj el branĉoj. Sed anstataŭ alte taksi la paron da manoj, li iom malestimis ilin, kvazaŭ dirante: "Kiel oni povas tion nomi 'manoj'?"



Flegado de Burĝonoj

Papertrancĵo de Cihju

La mienon de la lernanto rimarkis ambaŭ maljunuloj. Maljuna Ĉen diris nenion. Li nur ekridetis kun fiero kaj prenis sian pipon por fumado. Ekbruliginte sian pipon, Maljuna Vang tamen komencis kritiki la junulon. “Vi ne devas malestimi tiujn du manojn, junulo!” li diris. “Sen tiuj ĉi du manoj la kampo kiun nia trejna sekcio nun kulturas eble estus ankoraŭ dezertejo. Tiu ĉi monto antaŭe apartenis al la bienulo Vang Ziju. La dekkelkaj parceloj da tero sur la montosupro, laŭ la diro de maljunuloj, estis nekulturataj ekde la tria jaro dum la reĝado de Guanghju (1877 p.K.) ĝis la tria jaro dum la reĝado de Hjuantong (1911 p.K.). En tiu periodo nek la familio de Ĉen nek la mia posedis eĉ colon da tero. Ĉen laboris ĉe la bienulo kiel jarlaborulo dum mi paŝtis ties bovojn. Poste li venis ekkulturi tiun ĉi dezertan teron. Mi plenkreskis kaj estis promociita de paŝtisteto ĝis jarlaborulo, lernante de la ĉefjarlaborulo la flegadon de legom-kampo sur la bordo de la rivero. Ĉiuj ĉi parceloj estis plugitaj per pioĉo baton post bato, kaj konstruitaj, terason post teraso, de Maljuna Ĉen kaj lia filo Manhong, la nuna gvidanto de nia produkta brigado. Ĉu tiu ĉi loko ne restus ankoraŭ dezertejo sen tiuj ĉi du manoj?”

Kvankam la lernanto iom bedaŭris ke li montris malestimon, tamen krom ne voli konfesi sian eraron, li male diris mokeme: “Estas ne mirinde ke mi lernas malrapide. La kaŭzo estas ke ni ne havas tiajn manojn!”

“Ni volas ke vi lernu labori per manoj kiel la miaj, anstataŭ kreskigi manojn kiuj aspektos kiel la miaj!” Maljuna Ĉen instruis lin serioze. “Se mi ne estus ekkulturinta la monton, miaj manoj ne aspektus tiaj kiaj ili nun estas. La pli maljuna generacio jam ekkulturis la monton. Kaj iam ni mekanikigos la kulturadon, tial vi junuloj ne bezonos kreskigi manojn kiaj ĉi tiuj.”

Kvankam Maljuna Ĉen ne esperis ke la aliaj havos manojn kiaj la liaj, tamen li sentis fierindaj

siajn proprajn manojn kiuj jam kreskis tiaj. Ili estis ne nur malmolaj sed ankaŭ lertaj. Li ŝatis plekti kaj ofte faris diversajn produktilojn el vergoj de purpura saliko (salix purpurea). Li ankaŭ povis fari diversajn ludilojn el sorgotigoj. Kiam li plektis produktilojn, li ne uzis la kutiman bovkornan splitigilon por laŭlonge fendi la vergojn sed nur fendis unu finon en tri splitojn, enpuŝis la montrofingron inter ilin, kaj split! split! split!... la vergo jam splitiĝis sen ajna vundo sur la malmola haŭto de lia fingro. Kiam li faris delikatan laboron, ĝi estis tiel subtala ke vi ne povis kredi ke ĝi estis farita de tiuj ĉi du manoj. La kaĝoj por cirtofiloj\*,

kiujn li faris el sorgotigoj, havis pordojn kaj fenestrojn kaj malgrandajn suprajn kaj malsuprajn etaĝojn. La latisfenestroj kvadrataj je du koloroj havis diversajn desegnojn, kun aperturoj tiel malgrandaj ke eĉ abelo ne povis trarampi.

Post la agrara reformo, la kamparo antaŭeniris tra la stadioj de interhelpaj grupoj kaj kooperativoj ĝis tiu de la popolkomunumoj, kaj ankaŭ la enspezoj de la familio de Maljuna Ĉen konstante kreskis. En la vintro de 1959, liaj gefiloj kaj genepoj aĉetis por li paron da lanaj gantoj por protekti tiujn manojn tiel pene laborintajn kaj tiel meritplenajn. Transpreninte la donacon, li diris: “Tiuj ĉi manoj ankoraŭ ne ĝuis tian feliĉon antaŭe.” Li provis surmeti ilin. Ili estis ne sufiĉe vastaj ĉe la manplatoj, kaj la fingroj estis tro longaj kaj mallarĝaj. Kiam li fine sukcesis ilin surmeti, la partoj ĉe la manplatoj streĉiĝis kvadrataj, la malsupraj duonoj de la gantfingroj plidikiĝis, dum la supraj duonoj restis malplenaj.

“Ili sidos pli bone post kiam vi uzos ilin por kelka tempo,” diris lia filo Manhong.

La maljunulo pugnigis kaj replatigis la gantitajn manojn kaj diris: “Sufiĉe bone!” Post tio li demeti la gantojn kaj transdonis ilin al la edzino de Manhong, dirante: “Formetu ilin por mi provizore!”

“Surmetu ilin, paĉjo!” diris la bofilino. “Ĉu viaj manoj ne fariĝas malvarma ekstere en la kampoj?”

“Ni konstruas grenejon en la valo. Portante gantojn mi ne povos porti ŝtonojn senĝene!” Tion dirante li demetis ilin kaj eliris. Post la finkonstruado de la grenejo sekvis aliaj laboroj — distranĉi fojnon, purigi ŝafejojn, enkeligi napojn, draŝi maizspikojn . . . . Neniun el la laboroj la maljunulo povis plenumi konvene kun la gantoj. La maljunulo forgesis ke li ankoraŭ havas paron da gantoj.

\* Cirtofilo: kantema insekto (*cyrtophyllus sp.*) simila al grilo, sed verda anstataŭ nigra kaj pli granda.

Iun tagon okazis foiro en la vilaĝo Blanknuba Monto. "La nunaj laboroj ne postulas ke vi instruu multe da tekniko," diris la edzino de Manhong al la maljunulo. "Havu unutagan ripozon kaj plezurpromenu en la foiro." La maljunulo konsentis. Li surmetis novan vatitan jakon kiun li ligis ĉe la talio per nova zono.

"Ĉifoje surmetu viajn gantojn!" diris lia bofilino kaj elprenis por li la gantojn. Li surmetis ilin kaj foriris.

La vilaĝo Muelŝtona Monto estis malgranda kaj tie ne sin trovis filio de proviz-venda kooperativo. Kiam la maljunulo iris tra la strato en siaj novaj vestoj kaj portante siajn gantojn kaj la najbaroj vidis ke li iros al la vilaĝo Blanknuba Monto, multaj petis lin aĉeti aĵojn por ili. Tri uncoj da kuiroleo por tiu familio kaj du ĝin-oj da salo por alia. Sume la aĵoj fariĝis pli multaj ol li povus porti en siaj du manoj, do li prunteprenis malgrandan korbon de iu el la najbaroj.

Alveninte al la vilaĝo Blanknuba Monto, li trapromenis duonon de la ĉefa strato ĝis la proviz-venda kooperativo, kie li aĉetis ĉion kion oni petis lin aĉeti kaj daŭrigis sian promenadon. Kiam li preterpasis la pordon de la popolkomunuma oficejo, li rimarkis ke la vendejo de agrikulturaj instrumentoj ĝuste ricevas frajton da morusarbaj forkegoj kaj la vendistoj okupiĝas en la maŝarĝado el la ŝarĝveturilo. Tiajn forkegojn oni jam ne vidis ĉi tie dum la pasintaj du jaroj. Ĉiu ajn brigado sentis la havatajn jam nesufiĉaj. Li pensis ke la ŝancon oni ne devas preterlasi.

Li ne kunportis kun si monon, sed li ekpensis ke lia filo Manhong kiu estas ĉe kunveno en la popolkomunuma oficejo eble havas monon. Li rapidis tien kaj sciigis tion al li. Manhong diris: "Ha! Tio ja estas trezoro. Tuj jam aĉetu!" Kaj dume li elpoŝigis kaj donis kvindek juan-ojn al la maljunulo.

Maljuna Ĉen tuj rapidis al la vendejo de agrikulturaj instrumentoj kun la mono kaj komencis elekti forkegojn. Li estis tiel elektema pri agrikulturaj instrumentoj ke li neniam toleris iun kun difekto. Li demetis siajn gantojn, ŝovis ilin en la sinon, kaj ekprenis unu forkegon. Li premis la tridentan kapon kontraŭ la tero por vidi ĉu la forkdentoj estas ebenaj kaj fortaj, ĉu la kapo rekta kaj ĉu la tenilo kurba aŭ ne. Sed antaŭ ol li finekzamenis la unuan forkegon, jam venis dekelkaj aliaj klientoj. Ĉiu el ili ekprenis unu por ekzamenado. En palpebruma daŭro la forkeg-aĉetantoj jam multe plimultiĝis. La brigadestroj de la komunumo eĉ interrompis la kunvenon por veni kaj aĉeti forkegojn. Tiuj aĉetantoj ne faris elekton, kaj infomiĝinte pri la prezo ili tuj aĉetis. Rimarkinte ke la situacio fariĝas streĉa, Maljuna Ĉen ne kuraĝis daŭre elekti laŭ sia alta normo kaj rapide prenis kvin forkegojn senelekte, dum la ceteraj estis forkaptitaj de aliaj. Post pago por la aĉetaĵoj li kunligis la forkegojn kaj metis ilin sur la

ŝultron. Tenante la malgrandan korbon en alia mano, li trapuŝiĝis el la homplena vendejo de agrikulturaj instrumentoj. Ĉar li jam kunportis sufiĉe multe da objektoj, li ne plu havis la inklinon trapromeni la alian duonon de la ĉefa strato kaj forlasis la vilaĝon Blanknuba Monto laŭ la sama vojo per kiu li venis.

Elirinte la vilaĝon, li sentis ke la homo ne plu interpuŝiĝas kaj la vojo plilarĝiĝas, kaj nur tiam li metis la manon en la sinon por elpalpi siajn gantojn. Longe li palpatis sed trovis nur unu el ili. Li demetis la korbon kaj la faskon da forkegoj, malligis sian zonan kaj ekskuis sin, sed montriĝis nenia signo de la alia ganto. Li estis certa ke ĝi estis lasita en la vendejo de agrikulturaj instrumentoj.

"Se jam perdita, ĝi perdiĝu!" li pensis. "Ja estas tre malmultaj okazoj por ĝin porti!" Sekve li religis la zonan, surŝultrigis la forkegojn, prenis la korbon kaj daŭrigis la hejmen iradon. Sed post kelkaj paŝoj li pensis: "La infanoj aĉetis ilin por mi kun bonvolo. Estus ne dece se mi lasus ĝin perdiĝi eĉ sen unufoja priserĉo!" Tial li reiris al la vendejo de agrikulturaj instrumentoj ĉe la foiro en la vilaĝo Blanknuba Monto. Feliĉe unu el la vendistoj trovis ĝin kaj lasis ĝin ĉe la kontoro. Tuj kiam li enriis, ili redonis ĝin al li.



Sufiĉe longe poste, Maljuna Ĉen estis denove elektita labormodelo tiujara. Li estis invitita al la guberni-urbo por ĉeesti konferencon de labormodeloj. Nature tio estis alia okazo por li surmeti siajn gantojn. Krom ŝanĝi en novan vatitan jakon kaj ligi ĝin per nova zono, li ankaŭ surmetis la gantojn.

La vilaĝo Muelŝtona Monto estas kvardek li-ojn for de la guberniurbo kaj la vintraj tagoj estas mallongaj. Maljuna Ĉen ekiris tuj post la matenmanĝo

kaj alvenis nur kiam la suno estis subironta post la montoj. Tiu ĉi tago estis nur tempo por sinanonco. Alveninte al la guberniurbo, li iris al la sinanoncejo por enskribi sian nomon, ricevis ĉeesto-karton kaj iris al la gastejo.

Jam dum duonjaro li ne venis al la guberniurbo kaj trovis ke ĝi multe ŝanĝiĝis. Plilarĝiĝis la stratoj, ebenigitaj estis la avenuoj kaj la malnova kaduka gastejo, en kiu ili tranoktis antaŭe kiam ili venis ĉeesti kunvenojn, estis radikale renovigita en vicon post vico da brikaĵoj kun tegolaj tegmentoj. Jam mallumiĝis kiam li eniris la gastejon. Radiis lamplumoj el la apudaleaj fenestroj de la malantaŭaj vicoj da domoj, kio signifis ke tiuj ĉambroj estas jam okupitaj. El la fenestroj de la unuaj tri vicoj da domoj, kelkaj estis lumaj dum aliaj mallumaj. Li iris al la registrejo, subskribis sian nomon, kaj unu el la servantoj kondukis lin al la ĉambro N-ro 5, en la dua vico ĉe la okcidento. Li rimarkis, ke troviĝas lumo nur en la ĉambro N-ro 6, sed la aliaj ĉambroj en tiu vico estas ankoraŭ mallumaj. Subpiede sur la tero li sentis diversajn aĵojn molajn kaj malmolajn. Li ne sciis kio ili estas.

“Zorgu viajn paŝojn, avo!” la servanto lin avertis. “Tiu ĉi domo estas finkonstruita antaŭ nelonge kaj transdonita por uzado nur antaŭ malpli ol semajno kaj la korto ankoraŭ ne estas en ordo. — Pli bone venu ĉi tien. Tie estas kalko-cisterno. — Iru laŭ la muro! Tie kuŝas du grandaj ŝtupoj. . . .”

Alveninte N-ron 5, la servanto malfermis la pordon, eniris la unua kaj eklumigis la lampon. Kaj tiam li petis la maljunulon eniri. La ĉambro estis tre pura. En la forno brulis varma fajro. Antaŭ la fenestro staris unu tablo, du seĝoj kaj unu benko. En la malantaŭo de la ĉambro, apud ĉiu el la flankaj muroj, estis po du litoj. La pordo kaj fenestroj estis ankoraŭ ne ole-kolorigitaj, sed la muroj ŝajnis ĵus stukitaj. Pro la varmo de la forno ili ellasis ian humidan odoron.

Rimarkinte la litojn, Maljuna Ĉen demandis: “Ĉu kvar personoj por ĉiu ĉambro?”

“Jes, kvar,” respondis la servanto.

“Ĉu la gastejo estos plenigita dum tiu ĉi konferenco?”

“Verŝajne jes, kiam ĉiuj alvenos. La malproksimaj ankoraŭ ne alvenis. Iom ripozu. Mi iras alporti al vi akvon por lavo.”

Post nelonge, la servanto venis kun akvo kaj Maljuna Ĉen lavis sian vizaĝon. Ankaŭ la kunvenantoj el pli malproksimaj lokoj venis unuj post aliaj, kaj ankaŭ la ĉambroj en la dua vico ĉe la okcidento estis plene okupitaj. En la ĉambron N-ro 5 enloĝiĝis tri junuloj krom Maljuna Ĉen. Ili sin prezentis unu al la aliaj.

La konferenco daŭris tri kaj duonan tagojn, dum kiuj la maljunulo aŭskultis raportojn, preparis sian

propran paroladon kaj estis ĝenerale okupata kiel ĉiuj aliaj. La konferenco estis finita nur post la gubernia komitato de la Komunista Partio donis la sumigan paroladon en la mateno de la kvara tago. Tiun posttagmezon, tiuj kiuj loĝis sufiĉe proksime al la guberniurbo reiris hejmen; tiuj kies hejmoj estis pli malproksimaj devis resti unu plian nokton. Maljuna Ĉen estis kvardek li-ojn for de la hejmvilaĝo. Kvan-kam ĝi ne estis tre malproksima, tamen ankaŭ ne tre proksima. Se li estus junulo, eble li povus per rapida iro hejmen atingi ĉe noktiĝo. Sed Maljuna Ĉen finfine estis jam grandaĝulo. Li ne ŝatis palp-iri en mallumo. Tial ankaŭ li decidis resti en la gastejo ĝis la sekvanta mateno.

Post la tagmanĝo, preskaŭ ĉiuj kiuj restis emis promenadi sur la stratoj. La maljunulo revenis al N-ro 5 kaj trovis siajn tri junajn samĉambranojn kartludantaj kun iu el la ĉambro N-ro 4.

“Ĉu vi ne iros promeni surstrate?” li demandis al ili.

“Vi iru unue, avo,” unu el la junuloj respondis. “Ni iros post momento.”

Liginte la zonon kaj surmetinte la gantojn, Maljuna Ĉen eliris el la ĉambro. Ĉar la du restigitaj grandaj ŝtupoj en la korto baris la trapason, li devis, preterpasinte N-ron 4, ĉiam iri preme laŭ la muro de N-ro 3, kion li trovis ĝenega.

“Ĉu ne estos pli bone, se la ŝtupoj estos flanken movitaj?” li pensis en si. “Sed kien ili devas esti movitaj?”

Kaŭrante antaŭ N-ro 4, li okulmezuris la lokon. Li trovis ke taŭgas nur sude de la kalkocisterno. Elektinte la taŭgan lokon, li demetis siajn gantojn, metis ilin sur la ŝtupo kaj komencis movi unu el la ŝtupoj. La ŝtupo estis tuberplena restaĵo de arbotrunko

## *Jam Elkreskas Bambuidoĵ de l' Kuranta Jaro*

### Popolkanto de Ji-nacio

*En la pasinteco la malĝoj' de l' Ji-popolo  
estis kvazaŭ neĝo sur la mont' giganta:  
antaŭ fordegelo de l' lastjara neĝtavolo,  
jam aldonas sin la neĝ' de l' jar' kuranta.*

*Sed nuntempe ĝojindaĵoj de la Ji-popolo  
estas kvazaŭ bambuaroj sur deklivoj en  
la valo:  
dum bambuoj pasintjaraj ŝaŭme verdas  
ja ankoraŭ,  
jam elkreskas bambuidoĵ de l' kuranta  
jaro.*

Trad. Laŭlum

kies ambaŭ ekstremoj estis fortrancitaj, dika, mal-longa, kurba kaj plata, tre malfacile rulebla. Kun sufiĉe granda peno li sukcesis ĝin ekruli sed post nur unu rondoturniĝo, ĝi jam falis nerulebla. Por trovi helpanton, li frapis ĉe la pordo de N-ro 4. Sed ĉiuj estis for. Do li revenis al N-ro 5 kaj diris al la junuloj: "Kamaradoj, bonvole helpu min! Ni flanken rulu tiujn du ŝtipojn por plifaciligi la iradon. Kiel vi opinias?"

"Bone! Hieraŭ mi jam provis, sed ne sukcesis movi ĝin," respondis unu el la junuloj kaj dirante li demetis siajn ludkartojn. Ankaŭ la aliaj tri konsentis unuvoĉe kaj ĉiuj stariĝis kaj iris en la korton. Dume la maljunulo malligis sian zonon, metis sian novan vatitan jakon sur la liton kaj elvenis ilin sekvante.

Sed kiam li komencis movi la ŝtipon kun ili, unu el la junuloj lin haltigis, dirante: "Ne faru al vi la klopodon. Ĉu ni ankoraŭ ne sufiĉas por la laboro?" Kvar junuloj jam tute ĉirkaŭis la mallongan ŝtipon, kaj la maljunulo ne povis enmeti siajn manojn. Li havis nenian elekton krom lasi tiun ŝtipon al ili, kaj mem komenci movi la alian. Forrulinte la unuan ŝtipon al la celita loko, la kvar junuloj rimarkis ke la maljunulo klopodas movi la duan. Unu el ili lin haltigis denove: "Ne faru la klopodon, avo! Tiun ĉi ni povas levi kaj forporti." Dume alia junulo alvenis por forporti ĝin kune kun la unua. Tiu ĉi ŝtupo estis iom pli longa ol la alia, sed pli dika ĉe unu fino kaj malpli dika ĉe la alia. La malpli dika fino estis levita, sed la junulo ĉe la pli dika fino ne sukcesis ĝin movi penante ĝin levi.

"Nemoveble! nemoveble!" li diris kaj ĝin lasis. Kiam la junulo kiu tenis la malpli dikan finon, rimarkis ke li ne povis levi la dikan finon kaj estis lasanta la sian, Maljuna Ĉen kriis: "Mi faros tion!" Li sin klinis antaŭen, subtenis la ŝtipon per ambaŭ manoj, kurbigis siajn kruojn kvazaŭ rajdanta sur ĉevalo kaj je eklevo de la ŝultroj levis la ŝtipon glate kaj facile. La junulo kiu unue venis levi la ŝtipon, jetis rigardon al alia junulo kaj montris sian dikan fingron kun admiro. Ili ambaŭ tuj alkuris por lin anstataŭi, dirante: "Vere kapabla vi estas, avo! Sed vi estas altaĝa, do lasu ĝin al ni."


Kiam iu servanto kiu alvenis kun kruĉo por provizi boligitan akvon, vidis kion ili faris, li tuj diris rapide: "Mil dankojn! Lasu tion al ni!"

"Estas nenio!" diris la junuloj.

"Ni sukcesis bonordigi ĉiujn kortojn antaŭ la konferenco escepte tiujn en la antaŭaj tri vicoj. Kiam la konferenco komenciĝis, ni estis tro okupataj por zorgi pri ili," klarigis la servanto. "Post kiam vi foriros morgaŭ matene, ni okupiĝos pri la ordigado, kio povos esti plenumita en malpli ol du tagoj."

"Kial atendi ĝis nia foriro?" demandis Maljuna Ĉen. "Nia konferenco estas finita. Nun estas bona tempo por ni helpi vin bonordigi la korton, ĉu ne?"

"Estas ne bone vin ĝeni," diris la servanto.



"Nenia ĝeno por ni," respondis Maljuna Ĉen kaj la junuloj.

Aŭdinte la interparolon pri kortoordigo, la kamaradoj en la aliaj ĉambroj kiuj ne iris promeni sur la stratoj, ankaŭ elvenis el siaj ĉambroj por montri sian konsenton. La servanto forrapidis por demandi la administranton. Anstataŭ atendi ĝis lia reveno, la aliaj tuj disiris por trovi purigilojn.

Pro tio ke la bonordigado de la unuaj tri vicoj ankoraŭ ne finiĝis, la instrumentoj estis metitaj en la korto de la kvara vico ĉe la oriento. Tie ili trovis multe da ŝoveliloj, balailoj, korboj kaj portvektoj kaj tuj komencis la purigadon. Maljuna Ĉen volis porti korbon per vekto kun aliulo, sed la aliaj rimarkinte lian longan grizan barbon neniel permesis lin porti malgraŭ lia petego. Li do povis nur preni grandan bambuan balailon kaj balai la korton kune kun la aliaj.

Labormodeloj estis finfine labormodeloj. Kiam la postrestantaj gastoj en la aliaj ĉambroj de la unuaj tri vicoj vidis kion la gastoj de la dua vico ĉe la okcidento faras, ankaŭ ili ĉiuj elvenis kaj faris la samon. Post nelonge, la servanto revenis kun la administranto. Kiam la peto de la administranto ke la gastoj ne faru la klopodon montriĝis vana, li estis devigita elvoki ĉiujn oficistojn, kasisojn kaj servantojn de la gastejo en ĝenerala mobilizado kaj la tuta personaro eklaboregis kune kun la labormodeloj.

Dum ĉiuj ŝovelis la dispecigitajn brikojn kaj tegolojn, arbŝelojn kaj segpolvon disjetitajn en la korto, Maljuna Ĉen forbalaadis la rubrestaĵojn ilin sekvante. Komenciĝinte de la muro ĉe la sudokcidenta angulo de la dua vico ĉe la okcidento, li balais norden strekon post streko. Kiam li alvenis al la fenestro de N-ro 6, li vidis kotbulojn kaj rabotaĵojn sur la fenestra sojlo. Li levis sian balailon tien, sed ĉar la sojlo estis tro malvasta, li ne povis ilin forbalai. Do li demetis la balailon kaj purigis la sojlon per siaj negratvundeblaj manoj. Li rigardis al la vico da

ĉambroj orienten kaj vidis ke ĉiu fenestra sojlo estas same malpura. Do li iris laŭ N-ro 6, N-ro 5, N-ro 4... purigante ĉiun fenestran sojlon. Post tio li revenis al la okcidenta parto de la korto kaj daŭrigis la balaadon.

Laboro iras bone kiam vi havas multe da homoj. En ne pli ol unu horo ĉiuj ses kortoj jam estis finpurigitaj, la ruboj amasigitaj ambaŭflanke de la ĉefa aleo kaj la uzeblaj transportitaj ekster la malantaŭan pordon kie oni metis restantajn materialojn kaj forportotaj per ŝarĝaŭto tiunokte. Dum kelka tempo la maljunulo rigardadis la rezulton kun ŝato. Li sentis ke post la purigado oni povas trapaŝi multe pli agrable.

La administranto, la oficistoj, la kasistoj kaj la servantoj ĉiuj alportis akvon por la labormodeloj ke ili lavu siajn manojn kaj vizaĝojn. Post kiam ĉiuj jam sin lavis, kelkaj iris promeni sur la stratoj. Maljuna Ĉen denove surmetis sian vatitan jakon kaj ligis sian novan zonon. Sed kiam li estis surmetonta siajn gantojn, li trovis ke ili perdiĝis refoje.

"Ĉu iu el vi vidis paron da gantoj?" li demandis la junulojn.

"Ne," respondis iu. "Kien vi metis ilin?"

"Sur la pordŝtupon de N-ro 4."

"Mi vidis unu!" diris alia junulo. "Kiam ni kolektis rubon, verŝajne mi vidis ganton plenkovritan de koto en amaso de rabotajoj. Mi supozis ke ĝi estas malnova ganto de iu forjetita."

"Nu! Eble mi ilin kovris per la rabotajoj kiujn mi forskrapis de la fenestra sojlo de la ĉambro N-ro 4. Vi ne vidis ilin kaj miksis ilin en koton!"

Maljuna Ĉen rapidis al la rubamasoj laŭlonge de la aleo. Sed la rubo de la dua vico ĉe la okcidento sole estis sufiĉa por plenigi dekojn da korboj. Kiel li povus tuj ilin trovi?

Iu servanto lin vidis kaj demandis: "Kion vi serĉas, avo?"

"Mia paro da gantoj estis miksitaj en la balaadon!"

"Ĉu vi estas certa?"

"Certa!"

"Do iru promeni sur la stratoj kaj ni trovos ilin por vi."

"Ne faru al vi la klopodon. Tiuj gantoj ne multe utilas al mi." La maljunulo simple forlasis la ideon pri ilia retrovo.

La maljunulo promenis tra kelkaj stratoj. Escepte la novajn konstruaĵojn kiujn li ne vidis antaŭ duonjaro, li ne havis emon rigardi aliajn objektojn. "Mi ne aĉetos ion nek vendos ion," li pensis. "Pro kio ĉirkaŭvagi antaŭ la vendejoj?" Kaj li revenis al la gastejo. Kiam li alvenis tien ankoraŭ ne mallumiĝis kaj la samĉambraj junuloj ankoraŭ ne revenis. Iu servanto malfermis por li la pordon de la ĉambro kaj diris al li ke la gantoj estas retrovitaj. Maljuna Ĉen enpaŝis kaj vidis ke la fajro en la forno estas ankoraŭ vigla kiel antaŭe kaj la gantoj, kiuj estas lavitaj puraj de iu servanto kaj sekigataj sur la apogilo de seĝo apud la forno, fariĝis preskaŭ sekaj.

La sekvintan tagon li revenis hejmen. Post kiam li ŝanĝis la vestojn, li redonis la gantojn al la edzino de Manhong.

"Prefere mi redonu la gantojn al vi," li diris. "Miaj manoj estas neganteblaj!"

---

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KU

---


## Jam Aperis la Anglalingva Tradukaĵo de la Kvara Volumo de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong"

La kvara volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* enhavas 70 el la artikoloj, kiujn kamarado Maŭ Zedong verkis de aŭgusto de 1945 ĝis septembro de 1949, t.e. dum la periodo ekde la finiĝo de la Kontraŭjapana Rezistmilito ĝis la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Tiuj ĉi verkoj, en kiuj kristaliĝis la spertoj de la ĉina revolucio kaj prezentiĝis la grandiozaj sukcesoj kiujn kamarado Maŭ Zedong atingis en solvado de la revoluciaj problemoj de Ĉinio per la sciencaj teorioj de marksismo-leninismo,

respegulas grandiozan disvolvon de la pensoj de Maŭ Zedong (Detalan prezenton pri la enhavo de tiu ĉi volumo oni legu en la 6-a n-ro de nia gazeto, 1960). La angla tradukaĵo de tiu ĉi volumo, nome *Selected Works of Mao Tse-tung volume IV*, jam eldoniĝis antaŭnelonge fare de la Fremdlingva Eldonejo en Pekino kaj ĝia disvendado komenciĝis je la 1-a de majo fare de Guozi Shudian (P. O. Box 399, Peking, China). La bone presita kaj bele bindita libro enhavas 460 paĝojn.

Por ke ankaŭ la eksterlandaj esperantistoj povu konatiĝi kun tiu ĉi verko, Ĉ.E.L. elektis kelkajn el la artikoloj en tiu ĉi volumo, ilin esperantigis kaj eldonos unu post alia en formo de broŝuro. Kaj nun ni jam povas vin informi kun ĝojo, ke du el ili, nome *Pri Popoldemokratia Diktaturo kaj Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong* jam aperis. Oni diras, ke iuj el la artikoloj en tiu ĉi volumo tradukitaj en la anglan, rusan, francan, germanan, hispanan, japanan lingvojn kaj lingvojn de la Oriento, ankaŭ aperos en broŝuroj unuj post aliaj.

# Fragmentaj Interesaĵoj el la 26-a Ĉampionecc- turniro de Tabloteniso



Malferma ceremonio de la 4-a vespero de aprilo

## CELEBRO DE NASKIĜTAGO

—La naskiĝtago de la 17-jara sportistino de Sovetunio, D. Luĉina, koincidis en hazardo kun la inaŭgurtago de la 26-a Tutmonda Ĉampionecc-turniro de Tabloteniso. Tiuvespere, ŝi renkontis Ĉefministron Ĝoŭ Enlaj kaj manpremis kun li, ĉe la festeno okazigita de Vicĉefministro He Long. La fama ĉina tablotenisisto, la lastfoja mondĉampiono en vira unuopa konkurso de tabloteniso Ĵong Guotuan ankaŭ tostis al ŝi pro ŝia naskiĝa datreveno dum la festeno. Ŝi diris, ke tio estas bela momento neniam forgesbla dum ŝia vivo.

## KONKURO DE DU PLEJ JUNAJ SPORTISTOJ

—La 13-jara sportisto de la ghana teamo O. Quaye estas la plej juna el la tuta sportistaro, kaj la 15-jara B. Amarsana la plej juna de la mongola teamo. Tiuj du etuloj hazarde renkontiĝis en konkurso antaŭtagmeze de la 6-a. Kvan-kam malgrandaĝaj ili estas, ta-

men ili rikoltis laŭtajn aplaŭdojn de tempo al tempo ĉe la rigardantaro per sia streĉega batalo.

## SAVI KRIZAN PILKON EKSTER BARTABULOJ

—La angla sportisto I. Harrison, kiu iam venkis la faman japanan veteranon I. Ogimura elsavis multe da kruzaj pilkoj per lertaj kaj sagacaj movoj en sia konkuro kun la ofensiv-stila J. Teran el Jugoslavio. Foje J. Teran forbatis per altprema vipofrapo la pilkon ekster la bartabulojn post sia kunludanto. Harrison rapidis malantaŭen por kapti la pilkon, puŝfaligis 3 bartabulojn, kaj tutkorpe kuŝiĝis sur ilin. Sed li sukcesis resendi la pilkon per svingo de sia batilo, tute neatendite de sia kontraŭulo, kaj gajnis unu poenton.

**RIVALO KAJ AMIKO**—Momentum post kiam la sportistinoj el Svedio kaj Ghano finis sian konkurssludon, ili denove eniris la

arenon brak-enbrake, kaj pozis sin ĉe la ludotablo kaj farigis al si fotografajon memorindan. Ili ja estas "rivaloj sur la areno kaj amikoj ekster ĝi".



**NEBAREBLA** — La usona registaro intencis malhelpi la tablotenisan teamon de Ekvadoro en traivizado. Usona monopola kompanio en Ekvadoro malpermesis al sia laboranto, ekvadora junulo L. Rodrigguz partopreni ĉifojan ĉampionecc-turniron, sed li fine sukcesis atingi Pekinon en la ĝusta

tempo kune kun la ekvadora teamo kaj partoprenis la konkurson.

## LA GEFRATAJ SPORTISTOJ

—En la ghana teamo troviĝis paro de fratoj. Ili estas la plej juna, 13-jara sportisto O. Quaye kaj lia pliĝa frato E. A. Quaye; alia paro de fratinoj partoprenanta la ĉampioneckonkurson estis T. Akueteh kaj ŝia plijuna fratino E. Akueteh. Krome ankaŭ en la nepala teamo troviĝis du paroj de fratoj kaj fratinoj.





*Streĉa kaj decida momento en la aprilo-9a vespero: (Supre) Kiu Ĝonghuj konkuras kun G. Koczian de Ĉeĥoslovakio. (Maldekstre) Ĝuang Zedong konkuras kun N. Hoŝino de Japanio. Foto de Hinhua*

### ARKE SUPRENTURNAN BATON NE POVIS VENKI EĈ VETERANO DE TIU LUDMANIERO

—I. Ogimura, la japana mondĉampiono de vira unuopa konkurso, fama pro sia lerteco en arke suprenturnaj batoj multfoje metis la sovetunian junsportiston N. Novikov en malavantaĝon per apliko de tiaj batoj en ilia konkurado. Tamen foje ankaŭ Novikov subite faris tian baton, kiun Ogimura ne atendis kaj embarasiĝis en rebato. Li faris fuŝan ekbaton, faligis la pilkon kontraŭ la reto kaj mem ekridetis nereteneble.

### LA PLEJ LONGDAŬRA LUDO

—En konkurado de la 7-a de apr., la sovetunia junulo Z. Kalninj rivalis kontraŭ la brazila plenbarba sportisto W. Duarte. Ambaŭ estas lertuloj de defensiva ludmaniero. Tien kaj reen ili batadis la pilkon dum 19 minutoj por fini unu ludperiodon, kio estis rekordita kiel la plej longdaŭra tiutage.

**HONESTECO** — En la unua tago de la kolektiva konkurso, kiam la sportisto Vang Ĉuanĵaŭ de Ĉinio kaj O. Quaye de Ghano estis vigle batalantaj, subite Quaye batis lertan pilkon kiu rapide falis teren tuŝinte la tablorandon. Ne atendente la decidon de la juĝanto, Vang fingre montris la tablon por esprimi ke ĝi bone trafis, kaj la kontraŭulo rajtas gajni poenton. Dum alia kon-

kurado inter la pola sportisto Z. Calinski kaj la sveda sportisto H. Alser, la dua bategis la pilkon celante la mezon, kaj la unua retrorapidis kaj refrapis ĝin tenante la batilon antaŭ sia brusto. La pilko tuŝis angulon de la tablo ĉe la kontraŭa flanko kaj falis teren. El la spektatoroj iuj diris ke ĝi tuŝis, aliaj asertis ke ne, dum la juĝanto estis konsideranta por fari decidon. Tiam Calinski tuj mem mansignis ke li jam duoble frapis la pilkon kaj perdis la poenton.

**12 VIPOFRAPEGOJ** — La plej sensacia sceno dum la vespera konkurado de la 9-a de apr. estis ke la ĉina sportisto Hju Jinŝeng faris 12 sinsekvajn fortajn vipobatojn en sia konkuro kun la japana sportisto N. Hoŝino. La unuaj du ludperiodoj rezultiĝis unu kontraŭ unu poento kaj en la tria decida ludo, Hju, profite de la iom alta pilkopozicio de Hoŝino, komencis sian fortan vipobaton. Sed Hoŝino ne montris sin malforta kaj plurfoje sin savis per altaj pilkoj kontraŭbate. Kaj Hju devis daŭre ataki sian kontraŭulon per 12 fortaj vipobatoj por finfine gajni la poenton. La

tuta spektantaro unuvoĉe kriegis kaj aplaŭdis pro ilia eminenta ludarto.



**Solvoj de la du enigmoj (formiĝas el la komencaj literoj de la versoj): I. PACO, II. MILITO.**





## RAKONTOJ PRI FANTOM-SPITANTOJ

La Popola Literatura Eldonejo publikis la libron *Rakontoj pri Fantom-spitantoj*. Ĝin redaktis la Literatura Instituto de Ĉina akademio de Sciencoj. En la libro estas kolektitaj multe da rakontoj pri fantomspitantoj verkitaj de la ĉinaj antikvuloj. En ĝi troviĝas rakontoj pri ne nur homoj kiuj ne timas fantomojn, sed ankaŭ pri tiuj, kiuj kuraĝas insulti, moki, bati, ĉirkaŭligi kaj eĉ mortigi fantomojn.

Laŭ la redaktoro, la kompilado de tiu ĉi libreto ne celas ekspliki pere de tiuj rakontoj la materialisman ideologion de la antikva Ĉinio, sed konigi ilin al la legantoj kiel fablojn kaj satirajn rakontojn. La rakontoj estas koncizaj, interesaj kaj inspironaj. La Ĉina Esperanto-Ligo ĝin konigos al la esperantista publiko eksterlanda per esperanta eldono.

## ŜENĜEN-REZERVUJO LIVERIS AKVON AL HONGKONG

La rezervujo de Ŝenĝen en Guangdong-provinco finkonstruiĝis lastjare. Ĝia akvo estas pura kaj taŭgas por trinkado. Por liberigi Hongkong el krizo de akvomanko, laŭ la interkonsento de la Popola Komitato de Baŭan-gubernio, Guangdong-provinco, kaj la estraro de Hongkong, Ŝenĝen-rezervujo ĉiujare liveras akvon al Hongkong je ĉ. 5,000,000, 000 galjonoj. Ekde la 6-a de dec. lastjare, oni jam komencis plenumadon de tiu ĉi interkonsento. En la pasintaj jaroj, Hongkong provizis akvon al ĝia loĝantaro nur 4 horojn ĉiutage dum la nuna sezono, sed nun la tempo estas longigita ĝis 10 horoj.

**A**NTAŬ multaj multaj jaroj vivis knabo, kiu ne ŝatis labori. Li pasigis sian tempon nur per manĝo kaj ludo. Eĉ kiam li kreskis ĝis dudek-jara, li ne faris laboron por unu tago en sia vivo. Oni nomis lin Granda Maldiligenta Drako.

Kiam la gepatroj de Granda Maldiligenta Drako mortis, neniu laboris kaj kreskigis manĝojn por li. Li transloĝiĝis en kadukan malnovan templon kaj fariĝis almozulo. Iun tagon, elirante por almozpeti, li tre ĉagreniĝis kaj esploris. Maljunulo portanta en sia mano lagenarion alproksimiĝis.

“Kial vi ploras?” li demandis.

Granda Maldiligenta Drako diris al la maljunulo pri si mem. Kompatinte lin, la maljunulo diris: “Ne ploru. Venu kun mi al mia hejmo kaj helpu al mi kreskigi lagenariojn. Se vi pene laboros, vi havos sufiĉan manĝaĵon.”

Granda Maldiligenta Drako ĝoje iris kun la maljunulo. Kiam ili alvenis al lia hejmo, la knabo vidis multajn homojn laborantajn en lagenaria ĝardeno. Kelkaj el ili estis sarkantaj kaj aliaj estis akvumantaj. Ĉiu prizorgis nur unu plantaĵon. La maljunulo elektis unu plantaĵon kaj diris al Granda Maldiligenta Drako ke tiu estos lia.

Kiam venis la tempo por manĝo, la maljunulo atendis ĝis ĉiuj homoj kunvenis. Tiam li elprenis unu lagenarion kaj metis ĝin sur la tablo, kaj klakigis siajn manojn. Li petis ĝin doni al li rizajon kaj aliajn manĝaĵojn. En unu momento, vaporanta rizajo kaj aliaj varmaj manĝaĵoj ĝuste kiajn li propetis, aperis sur la tablo. “Tiu ĉi devas esti magia lagenario,” pensis Granda Maldiligenta Drako.

“Se vi laboras pene kaj bone prizorgas vian lagenarian planton, vi havos unu similan, kiam ili estos maturaj. Tiam vi povos peti ĝin doni al vi kion ajn vi deziras,” la maljunulo diris al Granda Maldiligenta Drako.

Tio ĝojigis Grandan Maldiligentan Drakon tre multe. Je la komenco li laboris tiel diligente kiel la aliaj. Sed kun la forpaso de tempo, li fariĝis pli kaj pli maldiligenta. Ĉiuj aliaj sarkis sian grundon tri-foje ĉiutage kaj akvumis la lagenarian planton per ses siteloj da akvo post ĉiu sarkado. Ili laboris tiel diligente ke iliaj ŝvito-gutoj falis en la akvositelojn. Sed Granda Maldiligenta Drako sarkis nur du-foje ĉiutage kaj donis al sia lagenaria planto tre malmulte da akvo. Li ne laboris diligente, sekve ne estis eĉ unu guto da ŝvito en la akvo, kiun li alportis al sia lagenaria planto.

Kiam la lagenarioj maturiĝis, tiu de Granda Maldiligenta Drako aspektis tiel granda kiel iu ajn de la aliaj. Kiam ili estis rikoltitaj, la maljunulo donis po unu lagenarion al ĉiu de la homoj kiuj helpis lin kreskigi ilin. Li donis al Granda Maldiligenta Drako la lagenarion, kiun li prizorgis.

Tiutage, je la manĝo-tempo la maljunulo diris: “Nun ĉiu el vi havas vian propran lagenarion. Vi povas peti ĝin por manĝaĵo.”

Ĉiu elprenis sian lagenarion, metis ĝin sur la tablo kaj klakigis siajn manojn. Ja vere, ĉiuj manĝaĵoj kiujn ili petis aperis sur la

# Esperanto Marŝas

## EN SOVETUNIO

**DIMANĈAJ KUNVENOJ EN MOSKVO:** Esperanto-Sekcio ĉe Centra Kulturdomo Medicinista aranĝis dimanĉan kunvenon je la

22-a de januaro kiel la unua de la serio planita por la 1-a kvaronjaro de 1961. En la kunvenoj oni intencas fari konversaciojn, prelegojn, renkontiĝojn kun alilandaj esperantistoj. Funkcios Ekspozicio

tablo. Nur Granda Maldiligenta Drako ne ricevis kion li deziris. Li petis por mola rizajo kaj bongusta manĝajo, sed ĉio kio aperis antaŭ li estis nur maldensa kaĉo kaj rizŝeloj.

La aliaj komencis manĝi. Granda Maldiligenta Drako koleregis kaj manfrapis sian lagenarion ree kaj ree, postulante bonajn manĝaĵojn. Sed ĉio kion li ricevis estis la samaj malbonaj manĝaĵoj. Li kuris al la maljunulo kaj demandis: "Kial mia lagenario ne donas al mi bonan manĝaĵon?"

"Ĉiuj aliaj bone prizorgis siajn lagenariojn," diris la maljunulo. "Ili sarkis trifoje ĉiutage kaj akvumis la planton per ses siteloj da akvo post ĉiu sarkado. Kaj kion vi faris? Vi sarkis nur du foje ĉiutage kaj donis al la planto tre malmulte da akvo. Aliaj homoj laboris tiel diligente zorgante pri siaj lagenarioj ke la akvo kiun ili donis estis kunmiksita kun ŝvito. Kion vi faris? Tion pripensu. Kian rajton vi havas por postuli bonan manĝaĵon de via lagenario?"

Granda Maldiligenta Drako havis nenion por diri. Li devis manĝi la maldensan kaĉon kaj rizŝelojn.



kaj legejo kun konsultado pri esperantaj tradukoj. La dua estas planita okaziĝi je la 19-a de februaro kaj la tria je la 19-a de marto.

**NOVA E-KLUBO EN DNEPRO-PETROVSK:** La 17-an de decembro 1960 okazis inaŭguro de Esperantista Klubo ĉe Kulturpalaco de Studentoj en la ukraina urbo Dnepropetrovsk. Dum la inaŭguro oni celebris ankaŭ la 101-an datrevenon de la naskiĝtago de D-ro L. L. Zamenhof.

Grandan intereson vekis prelego pri kunlaborado de k-doj J. S. Ŝkapa kun A. M. Gorkij, kies multaj eldiroj pri la lingvo Esperanto kaj pri D-ro Zamenhof estis ĉiam tre favoraj kaj plenlaŭdaj.

Poste debutis kelkaj novaj esperantistoj, deklaminte en Esperanto kelkajn poeziaĵojn de A. S. Puŝkin kaj aliaj.

Ĉeestis pli ol 500 personoj, plejparte gestudentoj. Al ĉiuj ĉeestantoj speciale presitaj "memorigiloj" el faktoj pri Esperanto estis disdonitaj.

Samtempe en la sama kulturpalaco estis organizita ekspozicio de esperantaĵoj. Ĝi estis sieĝata de komenco ĝis malfrua horo de la interesiĝintoj. F. Vasilenko (studento de Medicina Instituto) estas elektita ĉefo de la estraro. Estis decidite organizi novajn kursojn en la Kulturpalaco.

Por konstanta ekspozicio la nova Esperantista Klubo bezonas ĉiuspecajn esperantaĵojn (librojn, plakatojn, gazetojn, leterojn, poŝtkartojn k. a.) kies sendontojn la klubo danke rekompencos per ilustritaj poŝtkartoj afrankotaj per novemisiitaj sovetiaj poŝtmarkoj. Ĉion ĉi bonvolu adresi al: Esperantista Klubo ĉe Kulturpalaco de Studentoj, Dnepropetrovsk-27, U.S.S.R.

V. Pimenov

**EN UZBEKSTANO:** Laŭ dulingva (rusa kaj uzbekstana) revuo

aperanta en Taŝkento, Esperanto rapide disvastiĝas en tiu respubliko. Laŭ la gazetoj, Esperantorondoj funkcias en la Domo de Scienculoj, klubo de tramistoj, mezgrada lernejo, teknika instituto kaj en la Televida Centro de Taŝkento.

IGS/456

**EN ĤABAROVSK:** Esperanto bone disvastiĝas en Ĥabarovsk, internacia turista urbo ĉe Ĉinio, Koreio kaj Japanio. En tiu urbo estas organizitaj kaj funkciantaj jam 154 Esperanto-grupoj en oficejoj, lernejoj, bibliotekoj k. c.

Pere de la loka radio okazis du disaŭdigoj pri Esperanto.

*Esp-grupo de la Pedagogia Instituto en Ĥabarovsk*

## EN ĈEĤOSLOVAKIO

**TRITAGA SEMINARIO EN ŜTIRÍN APUD PRAHA:** De la 21-a ĝis la 24-a de oktobro lastjare tritagan seminarion aranĝis Kleriga Instituto en Praha kunlabore kun la Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato en centra lernejo de Ministerio por Publika Instruado kaj Kulturo en Ŝtirín apud Praha.

Ĉirkaŭ 60 kamaradoj partoprenis la seminarion. En la seminario prelegis D-ro Novák, k-do Čihlár, kamaradoj Lukeš, laboranto de la kleriga instituto en Praha, D-ro J. Jermář, prezidanto de ĈEK. La temoj variis de mondpolitika situacio, ekonomiaj problemoj, problemoj de la internacia lingvo ĝenerale ĝis organizaĵoj kaj propagandaj problemoj de esperanta laboro. En sia prelego, D-ro Jermář menciis, ke en Ĉeĥoslovakio nun ekzistas 140 esperantistaj grupoj.

Oni diskutis post la prelegoj, pri la neceso en nuna tempo altigi la nivelon de la grupa laboro kaj eduki en ĉiu grupo kolektivon de ago-kapablaj homoj, kaj la

bezono eldoni lernolibron por progresintoj post la eldono de elementa lernolibro en kuranta jaro.

*Fajrero n-ro 5-6*

**NOVA INFORMILO EL JIHLAVA:** Eldoniĝis antaŭ nelonge la unua numero de nova presita informilo en Jihlava kun titolo "Agado". Ĝi celas informi al la lokaj esperantistoj pri E-movado loka kaj eksterlanda kaj aperigi ankaŭ utilajn legaĵojn.

*Fajrero n-ro 5-6*

## NOVELEKTITA CENTRA KOMITATO DE PEA:

En lasta novembro okazis tutpollanda konferenco de delegitoj de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz, en kiu oni elektis novan estraron. Nova prezidanto de la ĉefa estraro estas s-anino Prof. Halina Szablowska el Varsovio.

## EN HUNGARIO

**"HUNGARA VIVO" ESTAS PRETA:** Laŭ informo de la 2-a n-ro de Hungara Esperantisto, la planita ilustrita esperanta revuo "Hungara Vivo" estas jam preta. Intertempe aperis jam la 2-a eldono de la lernolibro de J. Baghy.

**ESPERANTISTINO SUR HUNGARA POŝTMARKO:** Okaze de la Internacia Tago de Virinoj la Hungara Poŝto eldonis du poŝtmarkojn de 60 fileroj. Sur unu el ili estas la kapo de la hungara batalintino de la laborista movado Kató Hámán, kiu siatempe vigle partoprenis en la iama Laborista Esperantista Societo.

## POR SERVO AL MARISTAJ ESPERANTISTOJ

Por organizi servon al maristaj esperantistoj en la tutmondo, s-ro Kai Henriksen de Danio iniciatas eldonon de adresaro de maristaj esperantistoj, kiuj en sia propra



hejmloko volas partopreni la servadon kaj kiuj ofte estas for de hejma tereno dum longa tempo. Estas petataj ĉiuj interesatoj skribu al: Kai Henriksen, Hoyensgade 19, Kopenhago 9, Danlando, aŭ al: M. Raposo, Poŝtkesto 872, Aw. Pinheiro Chagas, 155, 2º Nº 1, Lorenzo Marques, Mozambiko, Orienta Afriko.

## "CIRKLO ĈIRKAŬ LA MONDO" POR INFANOJ

Por kontaktigi infanojn el ĉiuj mondpartoj, la nederlanda radio-unuiĝo "AVRO" iniciatis serioj da radio-elsendoj por infanoj 8-14-jaraj ĉefe en Esperanto. La elsendo okazas je la lasta mardo de ĉiu monato je la 16.30 horo per ondlongo 298 m. aŭ 402 m. (1007 KC/S aŭ 747 KC/S). La programo temas pri iu ajn lando. Oni povas aŭdi en ĝi infankantojn, -ludojn, deklamadojn, parolitan leteron k. s. en Esperanto kaj parte en la nacia lingvo kun Esperanta klarigo. Je la fino oni petas interŝanĝon de malmultekostaj donacetoj inter infanoj nederlandaj kaj la koncernaj landoj. Estas dezirataj kunlaboroj el ĉiuj landoj, ke oni sendu la bezonatajn materialojn sur sonbendo (rapideco ne gravas, prefere la plej rapidan troveblan de la kunlaboranto) al: s-ro A. M. D. Korff, Hengelolaan 1027, DEN HAAG, Nederlando.



## SUR NIA LIBROBRETO

Castro Alves: **ELEKTITAJ POE-  
MOJ**, tradukis L. H. Knoedt, 188  
paĝoj. Eldonis Universitato de  
Bahia, Brazilo, 1959.

Ĉiam pli gravan rolon ludas  
Latin-ameriko en la internacia  
politiko. Ĝiaj modernaj verkistoj  
okupas eminentan lokon en la  
monda literaturo kaj multe kon-  
tribuas al la kontraŭimperiisma  
kaj porpaca batalo. Neruda, Guil-  
lien, Amady kaj aliaj estas vaste  
tradukitaj, legataj kaj admirataj.  
Sed ĝiaj klasikuloj restas anko-  
raŭ malmulte konataj de la le-  
gantaro, almenaŭ en nia lando.  
La esperanta traduko de *Elektitaj  
Poemoj* de Castro Alves, la nacia  
poeto de Brazilo, vekas mian  
grandan intereson; ĝi jam kom-  
encis ŝtopi tiun manklokton.

La poeto vivis nur 24 jarojn  
(1847-1871), sed per sia literatura  
heredaĵo, li plene meritas lokon  
apud Lermontov aŭ Petöfi. Kiel  
la mallonga biografio noto de la  
libro diris, "brile li vivis sian  
epokon—arda lirikisto unuflanke  
kaj aliflanke socia poeto. Prave  
li ricevis la alnomon Poeto de la  
Sklavoj."

La poemoj estas ĝuste elekti-  
taj, ili reprezentas la multflankan  
genion de la poeto. La kolekto  
entenas erotikajn poemojn, poe-  
mojn pri natura pejzaĝo kaj  
fine poemojn inspiritajn de re-  
voluciaj ideoj. Ĉiu speco de  
tiuj poemoj montras lian eminen-  
tan talenton kaj nobla animo vi-  
bras tra la linioj. Kelkaj pecoj  
restos gemoj en la trezorejo de  
la mondliteraturo. Sed nur kiam  
la muĝanta trumpeto prenis la  
lokton de la sopiranta liro, li estis

sublima. Kvankam li verkis an-  
taŭ 90 jaroj, tamen liaj akuzoj  
kontraŭ la sklavigantoj kaj ba-  
talkrioj pri libero, lumo kaj jus-  
teco restas tute aktualaj hodiaŭ.

La traduko estas konsciencie  
farita, kolorriĉa kaj viveca, ĝi  
meritas multan laŭdon kaj  
taŭgan lokon sur la bretaro de  
ĉiuj poezi-amantoj. Sed la tradu-  
kinto, eble pro troa precizemo (eĉ  
pedanta) al la versformo, iam  
donis nenecesan tordon al la  
lingvo. Abundas inverso de po-  
sedaj formoj aŭ prepozitivaj su-  
plementoj, eĉ post alia prepozicio.  
Li metis kelkfoje ankaŭ la inte-  
rogativon en la mezo de la frazo:

*Giganton kiun rulos mort-  
pluko? (p. 56)*

*Vi serĉas kion trans la hori-  
zontoj?*

*Transpasi kial pintojn de la  
montoj? (p. 69)*

En tiuj kazoj mi preferus gliton  
ĉe la unua piedo. La ankoraŭ pli  
kuriozaj estas la jenaj ekzemploj:

*Laŭ vojo iri fata.*

*El sud', el nord' kaj oriento  
el. (p. 146)*

Mi opinias, ke tio estas kontraŭa  
al la natura vortordo de Esperan-  
to kaj tial evitinda. Cetere la tro  
ofta ellaso de verbo kaj ansta-  
taŭado per sinsekvaj strekoj an-  
kaŭ ĝenas la leganton kaj naskus  
konfuzon. "Eviti ĉiun deflanki-  
ĝon de la bona kaj flua proza  
stilo," jen skribis Dro Kalocsay  
antaŭ ĉirkaŭ 40 jaroj, tamen tiu  
ĉi principo validas eĉ hodiaŭ.

Mi notis ankaŭ ne bone kom-  
prenitan frazon en la traduko:

*Vi kiu funde trempis viajn  
fingrojn  
en dum milit' mortinta av' la  
vundon. (p. 57)*

Ĉu ĝi signifas "en la vundon de  
avo mortinta dum milito"? Se  
estus tiel, la prepozicio "de" ne  
estas ellasebla.

Malgraŭ tiuj manketoj, mi ri-  
petas, la traduko estas tre bona.  
Mi gratulas la brazilan sami-  
deanaron ke ĝi kontribuas al la  
esperanta literaturo per tia grava  
libro kaj atendas ankoraŭ aliajn  
same bonajn eldonaĵojn.

La papero kaj presoj estas  
altkvalitaj. Nur unu preseraron  
mi malkovris: mastron (maston).

**S. J.**

Sylla Chaves: **ANIMO PRIS-  
MA**, eldonita de Kultura Koope-  
rativo de E-istoj, Rio de Janeiro,  
Brazilo. Paĝoj 112. Broŝurita kun  
multkolora kovrilo.

Post la dua mondmilito, kom-  
encis la dua periodo de plen-  
florado de nia poezio. La "kvaro-  
po", M. Boulton kaj aliaj daŭri-  
gas la gloran tradicion de Baghy  
kaj Kalocsay. Tion plene pravas  
la tria parto de la monumenta  
antologio kompilita de Auld.  
Krom la jam vaste konataj no-  
toj ĉiam aperas novaj. Sylla  
Chaves estas unu el la plej talen-  
taj.

*Animo Prisma* estas lia unua  
publikigita volumo de poemoj sed  
kia brilanta juvelaro ĝi jam  
montriĝas! La prezento de Ismael  
Gomen Braga diras al ni, ke la  
poeto jam verkis kaj tradukis  
multajn poemojn ne ankoraŭ  
aperintajn en libroformo, tio  
klarigas la plenan maturecon de  
la entenitaj verkoj.

La libro estas maldika, sed  
riĉenhava. Ĝi dividiĝas en tri  
partojn. La unua parto, *Animo  
Prisma*, ŝajnas la plej grava kaj  
ankaŭ plej interesa. Ĝi konsistas  
el kvar cikloj de poemoj, respek-  
tive titolitaj: *Aspiro, Deiro, Dezi-*

ro kaj Deliro. Tiuj futurismaj poemoj malfermas novan perspektivon por la Esperanta poezio ne nur per sia okulfrape originala formo, sed ankaŭ per sia tre profunda penso. La poemojn stampis la tute individua personeco de la aŭtoro.

*Ĉiu verso gaja kaj malgaja  
kaj ĉiu ajn forfluganta poem'  
estas peceto de mi mem*

La vibrado de sentema koro estas palpebla tra ĉiuj versoj. La penetrante observema kaj elreviĝa pensulo priskribas sian koron kiel "folion dancantan sur la rivero de l' destino". Tra la animo de la serĉanto de vivsublimo kaj sekvanto "post fluganta revo sen atingi ĝin", la vivo prismas ne kun gajaj koloroj. Li vivas inter la ardaĵ aspiroj kaj kruela seniluziigo. La feliĉo estas nur miraĝo kaj malaperas je proksimo. Tiel li ĉiam "side sur la voj'" lasas "ke la vivo preterpasu".

La dua parto entenas dek ok sonetojn kaj tria — kvar aliajn poemojn. Ĉiuj estas verkitaj en klasika formo, sed ilia enhavo estas same pensiga kaj ne tre diferenca de la unua parto. Precipe la lasta soneto, "Eterna krucmilito", montras la noblan animon de la poeto, kiun ĉiam okupas la sorto de la homaro.

*Mi ankaŭ enskribiĝis por  
Krucbatal' ĉiama,  
frenenze atakante per mia  
spado flama  
la beston, kiu loĝas en homa  
korprofund',  
Sed mi vundiĝas meme pro l'  
homa agonio. . . .  
kaj l' glavo ruĝa brulas . . . .  
Mi volas, mia Dio,  
Malbonon dispecigi . . . . sen  
ies ajna vund'!*

Tamen, estas ankoraŭ pridubinda, ĉu la Malbono loĝas en la homa korprofundo aŭ alie. Nu, oni povas ne konsenti kun lia mondkoncepto, sed ne povus ne ĝui tiujn juvelojn kun iliaj profunda penso, frapantaj imagoj kaj kristala lingvo. Multe el la poemoj

restos longe en la memoro de la leganto post unufoja legado.

X.

Marjorie Boulton: **EROJ. Originala Poemaro**, STAFETO: Beletro, 15. J. Régulo, Eldonisto, la Laguno, Tenerifo, Kanariaj Insuloj, 1959. 16 × 22 cm. 368 paĝoj. Prezo: 2,40 usonaj dolaroj, aŭ egalvaloro, plus sendkostoj.


La nomo de Marjorie Boulton estas bone konata. Ŝia unua poemaro, "Kontralto", publikigita 1955, vekis siatempe la admiron de la legantaro kaj certigis al ŝi eminentan lokon inter la poetoj. Post kvar jaroj, jen aperis ŝia dua kolekto de poemoj, eĉ pli abunda ol la unua. Tiu fekundeco de ŝia verka povo estas vere mirinda.

La ĉefaj karakteroj de ŝia lirika talento, kiuj regis en la unua volumo kaj daŭras en tiu ĉi, ne bezonas rekomendon. Sed ĉi tie pli evoluiĝis la interesiĝo pri la sociaj temoj. Tiaj temoj okupas rimarkindan lokon en la volumo, kiu malfermiĝas per ciklo de kvar ambiciaj longaj poemoj kaj aliaj similaj troviĝas tie kaj ĉi tie. Estas nature okupi sin per tiaj gravaj sociproblemoj, kiam oni vivas en tempo, en kiu la homaro jam atingas la krizan momenton. La intenco de la poetino estas klare esprimita en la enkonduko: "Mi eble deziras prediki kelkajn tre ĝeneralajn sintenojn: ke amo kaj karitato estas niaj altaj bonoj; ke niaj seksdeziroj estas esence nekontindaj kaj ke niaj danĝeraj deziroj estas tiuj, kiuj celas potencon, estrecon kaj satigon de malamo; ke la natura kaj homa mondo estas neelĉerpeble interesa kaj ni devas ŝati, protekti ĝin, evoluigi ĝin, ne facilanime detruigi ĝin; ke ĉiuj homoj estas, biologie kaj psikologie, samspecanoj kaj partoprenas bazajn homajn rajtojn." Tiu altflugo de la nobla animo superregas la tutan poemaron kaj meritas ĉies senkondiĉan aprobon. Sed samtempe ĝi memorigas la leganton, ke en nia tempo, la plejmulto el la tuta homaro ne

havas la plej bazan homrajton libere ami aŭ malami, ŝati la homan mondon kaj vivi samspecane kiel la reganta malmulto. Kiam arbitros la volo de Wall Street kaj la Pentagono, la kondiĉoj ne pliboniĝos. Antaŭ nelonge mi legis la poemaron de Sylla Chaves, kiu diris inter aliaj: Mi volas Malbonon dispecigi sen ies ajna vundo. Mi esprimis tiam mian dubon. Se oni volas reakiri la perditan Edenon, oni ne povas ne iom tuŝeti la ekzistantan sociordon. Ho, jam tro malproksime devojiĝas de la poemlibro de Samideanino Boulton!

La poemkolekto estas tre riĉenhava kaj la poetino — multflanke talenta. Ĉiu leganto trovos kion li admiras laŭ sia gusto.

X.



\* **Nataŝa Leoniĉeva** (27j. oficistino) kun ĉinaj, hindaj kaj japanaj gesanoj en E, angla kaj rusa lingvoj; interŝ. librojn, gazetojn kaj bk. adr: USSR, Ĉeljabinsk, poŝta fakoj 3, str. Vasenko 106.

\* **Esperantista Rondo en Jihlava**, Ĉeĥoslovakio, dk. kun Ĉinio kaj Vjetnamio.

\* **Vu Khanh Hoa** (20j.) kun tutmondo pri diversaj temoj; Nha May Det xuong Dien ca A.L. Batan, Vietnamio.

\* **S-ro Erich C. BARTONEK**, Wien P. A. 51 Fach, Aŭstrio kun orientaj landoj pri ĉt.

\* **E-a fervojista grupo** (40 junuloj kaj 10 plenaĝuloj) kun gelernantoj el ĉl. pri ĉt. adr: Esperanta Grupo SNCF, I Rue de Paris, St. Etienne du Rouvray, Seine Maritime, Francujo.

\* **Sokolov V. A.**, USSR. Gorkij-43, prosp. Stalina 15-5 dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj.

# EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

## Enhavo de N-ro 3 (68) 1961

*Bildo sur la kovrilo*—La ĉinaj getablotenisistoj partoprenintaj la kolektivon konkurson Agrikulturo—Bazo de la Nacia Ekonomio La Maj-kvara Movado kaj Fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio Ili Vivas en Amikeco La Pekina Laborista Sporthalo Tablotenisa Sporto en Ĉinio Mi Fariĝis Modelo de Metilernanto Sonrido de la Novedzino Biblioteko en la Popolamason Libroj Memorigo pri Dek Majstraj Pentristoj de Antikva Ĉinio Nova Kanto pri Lhasa Jarfina Vespero Neforgesebla "Revolucia Familio"—Filmo Neordinara La Neganteblaj Manoj Fragmentaj Interesajoj el la 26-a Ĉampioneo-Turniro de Tabloteniso La Magia Lagenario

# La Ĉampionoj de 5 Individuaj Konkursoj

### La viraj unuopaj ĉampionoj:

1-a — Ĝuang Zedon (Ĉinio)

2-a — Li Fujong (Ĉinio)

3-a — Hju Jinŝeng (Ĉinio), Ĝang Hilin (Ĉinio)

### La virinaj unuopaj ĉampionoj:

1-a — Kiu Ĝonghuj (Ĉinio)

2-a — K. Koczian (Hungario)

3-a — Kimiĵo Macuzaki (Japanio), Vang Gian (Ĉinio)

### La viraj duopaj ĉampionoj:

1-a — N. Hoŝino kaj T. Murakami (Japanio)

2-a — Z. Berczik kaj F. Sido (Hungario)

3-a — Ĝuang Zedong kaj Li Fujong (Ĉinio), Ĝou Lansun kaj Vang Ĝiaŝeng (Ĉinio)

### La virinaj duopaj ĉampionoj:

1-a — M. Alexandru kaj G. Pitica (Rumanio)

2-a — Kiu Ĝonghuj kaj Sun Mejĵing (Ĉinio)

3-a — Hu Keming kaj Vang Gian (Ĉinio), Han Juĝen kaj Liang Liĝen (Ĉinio)

### La miksitaj duopaj ĉampionoj:

1-a — I. Ogimura kaj K. Macuzaki (Japanio)

2-a — Li Fujong kaj Han Juĝen (Ĉinio)

3-a — Vang Ĉuanĵaŭ kaj Sun Mejĵing (Ĉinio), N. Hoŝino kaj M. Seki (Japanio)

\* La grupo de Libera Germana Junularo planas eldoni 1961 "Adreslibro por junulara korespondo de socialismaj landoj". Ni eldonos adreslibron en ESPERANTO-ruso-anglo-germano por amikoj kaj lernejoj de socialismaj ŝtatoj. Ni senkoste presos viajn dezirojn. Skribu al: Instruisto S-ro BEIN, Schochwitz b. Halle, mezlernejo-Germanujo-GDR.

\* **AL LA TUTMONDA JUNULARO:** Vi verŝajne jam legis pri la Junulara Forumo en Moskvo ĉi-somere, kiu okazos de 25.7 ĝis 3.8. La Forumo diskutos problemojn, kiuj sendube interesas junularon en la tuta mondo: pri paco, kondiĉoj de laboro kaj studado por junularo en diversaj landoj, pri internaciaj kontaktoj. Estas ege dezirinde ke kiom eble pli da esp-ista junularo partoprenu

tiun internacian Forumon, por Esp-o estu en ĝi plenrajta interkomprenilo. Moskva esp-ista junulara grupo Fajrero petas ĉiujn esp-istojn partoprenontajn en la Forumo anonci sin ĉe la adreso: USSR. Moskvo, K-9, poŝtkesto 1253. Junulara Esperantista grupo Fajrero. Bonvolu indiki vian fakon.

\* **Esperanto-Rondeto** ĉe OB, Kraliky, Ĉeĥoslovakio, aranĝas okaze de fino de kurso en junio 1961 letermonaton. Junaj komencantoj kaj progresintoj serĉas korespondadon pri diversaj temoj.

\* **S-ano Petko Velkov Petkov** dez. kor. politiko kaj turismo kaj interŝ. pk., gazetojn kun ĉinaj, koreaj kaj japanaj k-doj; Bulgario, Vratza, ul. David Todorov 5.


\* **Tigran Ĥaĉatrjan**, Gorno-metal. teĥnikum, Kafan, Armenio, USSR.

\* **Jean ROUVIERE**, "Vista bella" 25 Allees de la Quinguette, AUBENAS (Ardeche), Francio; dez. kor. kun ĉinaj kaj japanaj k-doj pri ĉt.

\* **Inteligentula Klubejo**, Miedzyrzecz Wlkp. Hoj: Lielona Ĝora, Pollando; interŝ. magnetofonajn bendojn, kanzonojn, bk. kaj pm. kun tutmondo (kuracistoj, geoficistoj, librotenistoj, horloĝistoj, frizistoj).

\* **Zreliĥ Dm. Il.** USSR, Kurskaja obl. st. Zolotuĥino, selo Novo-Spasskoje kolektas **abc-lernolibrojn ĉiulandajn** eĉ uzitajn de infanoj. Rekompence mi sendos sovetan lernolibron aŭ sovetajn pm. aŭ revuojn. Mi jam havas tiujn el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Italio, Danio, Japanio kaj Venezuelo.



(Daŭrigo sur 137 p.)



## *La Konkurso por la Individuaj Ĉampionejoj Tutmondaj*

1. La unuaj tri venkintoj de vira unuopa konkurso
2. La unuaj tri venkintoj de virina unuopa konkurso
3. La unuaj tri venkintoj de vira duopa konkurso
4. La unuaj tri venkintoj de virina duopa konkurso
5. La unuaj tri venkintoj de vir-virina duopa konkurso
6. La vira individua ĉampiono kaj la virina individua ĉampiono de Ĉinio Ĝuang Zedong, Kiu Gonghuj

*Fotoj de Hinhua*





Sama Prospero Norde de Huai-rivero Kiel Sude de Janzi-rivero  
Kolora lignogravuraĵo de Laj Saŭki, Ĝang Hong, Ŝi Songling

